


EL POPOLA ĈINIO

N-ro 2 Februaro 1968



Nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lia intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ kaj aliaj gvidantaj kamaradoj akceptas la reprezentantojn de aktivuloj de la pekinaj trupoj de ĈPLA en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, la kamaradojn, kiuj okupiĝis pri akceptado de revoluciaj amasoj en la granda proleta kultura revolucio kaj aliajn reprezentantojn. Kun senkompara ekscitiĝo kaj tenante la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, la akceptatoj laŭte krias: Senfine longan vivon! senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ, la plej plej ruĝa suno en nia koro!

Renkonte al la Plena Venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio

Ĉefartikolo de *Renmin Ribao*, *Hongqi* **kaj** *Jiefangjun Bao*
(*La 1-a de januaro, 1968*)

Alvenas la forte brila jaro 1968.

Ruĝas la oriento, leviĝas la suno. Ĉe la sojlo de la nova jaro, centoj da milionoj da armeanoj kaj civitanoj de la tuta lando, kun senkompare profunda klasa sentimento, kore deziras al nia granda instruanto Prezidanto Maŭ eternan vivon!

Sub la genia gvidado de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la unua granda proletara kultura revolucio en la homa historio jam akiris decidan venkon en 1967. Kaj sub la direktado de la serio da' plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, jam komenciĝis la granda batalo por gajni plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio.

Nun la granda proletara kultura revolucio estas en bonega situacio. La senprecedence vasta kaj profunda revolucia amasmovado estas kontinue disvolviĝanta antaŭen laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Revolucia amasa kritiko estas pluapaŝe disvolviĝanta sur ĉiuj batalfrontoj, kaj la kontraŭrevoluciaj krimagoj de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon inkluzive de la ĉina Ĥruŝĉov estas grandkvante malkaŝitaj de la popolamasoj kaj pro tio oni pli konkrete kaj pli klare komprenis la gravecon de la firmigo de la proletara diktaturo kaj de la prevento de kapitalisma restaŭro. Revoluciaj komitatoj establiĝis unu post alia en provincoj, municipaloj kaj aŭtonoma regiono. La revolucio en edukado kaj la BKR (nome: batali kontraŭ la potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon ĝis ilia kolapsiĝo, kritiki la reakciajn burĝarajn akademiajn "aŭtoritatulojn", kritiki la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj kaj reformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn aliajn partojn de la superstrukturo, kiuj ne respondas al la socialisma ekonomia bazo por faciligi la firmigon kaj disvolvadon de la socialisma sistemo.) sur diversaj batalfrontoj paŝopostpaŝe prezentas novan aspekton. La granda kultura revolucio impulsis la laboron en ĉiuj flankoj. La sukcesaj provoj de telestirata ĵetarmilo kaj hidrogena bombo de nia lando skuis la tutan mondon. La agrikultura produkto akiris senprecedence abundegan rikolton. La tuta lando estas plena de entuziasmo kaj ĉie estas vigla revolucia atmosfero.

La plej grava punkto en la bonega situacio estas: post kiam la vastaj revoluciaj amasoj konis la serion da plej novaj instrukcioj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, aperis ĉe ili entuziasma tajdo de serioza lernado kaj firma plenumado de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ. La kursoj de la penso de Maŭ Zedong, kiuj aperis tra la tuta lando kiel printempaj bambuidoj post pluvo, fariĝis lernejoj por kreive studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong kaj vasta batalkampo por **"kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon"**, kio forte altigis la ideologian konscion de la vastaj revolucia kadraro kaj revoluciaj amasoj. La revolucia granda unuiĝo kaj revolucia "triflanka kombiniĝo" multe plirapidiĝis. La revolucia situacio progresas antaŭen kiel torentega rivero, kaj tio plene pruvis la sciencan antaŭdiron de Prezidanto Maŭ dum lia inspektado, ke **"post kelkaj monatoj, la tuta situacio des pli boniĝos."**

En la nova jaro, la tuta partio, la tuta armeo kaj la tutlandaj proletaraj revoluciuloj kaj popolanoj devas streĉi plene la energion, strebi forte antaŭen kaj kontinue peni por gajni plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio en ideologio, politiko, ekonomio kaj organizo, pli alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj kun la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kiel gvida principo.

Por realigi tiun ĉi grandan strategian celaĵon ni alfrontas jenajn batalajn taskojn:

1) Ankoraŭ pli vaste kaj penetre disvolvi la grandan amasan movadon de kreivaj lernado kaj aplikado de la penso de Maŭ Zedong. Ĝuste kiel vicprezidanto Lin Biaŭ diras: "Kiam la penso de Maŭ Zedong estas posedata de la vastaj amasoj, ĝi povas fariĝi neelĉerpebla forto kaj spirita atombombo kun senkompara potenco." La nova jaro estos jaro en kiu centmilionoj da revoluciaj popolanoj batalgajnos novan grandan venkon, firme tenante en si la penson de Maŭ Zedong.

Gvidantaj kamaradoj ĉe diversaj niveloj kaj ĉiuj revoluciaj organizoj devas doni grandegan atenton al edukado en la penso de Maŭ Zedong, energie fortigi ideologi-politikan laboron, kaj vere bone funkciigi diverstipajn kursojn de la penso de Maŭ Zedong. En kreivaj lernado kaj aplikado de la penso de Maŭ Zedong, oni devas unue lerni kaj apliki bone la serion da plej novaj ekstreme gravaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri la granda proletara kultura revolucio. Ĉiu el ili devas esti plene realigita, tiel ke la brilaj ideoj kaj konkretaj politikoj de Prezidanto Maŭ estu rekte mastrataj de la vastaj popolamasoj kaj fariĝu konscia revolucia agado de centmilionoj da revoluciaj popolanoj. Tio ĉi estas la plej fundamenta garantio de plena venko en la granda proletara kultura revolucio. La plena realigo de la plej

novaj instrukcioj signifas plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio.

Estas necese daŭre disvolvi la marksism-leninisman revolucian lerno-stilon por kiu pledas Prezidanto Maŭ. Estas necese apliki kion ni lernis el verkoj de Prezidanto Maŭ kaj liaj plej novaj instrukcioj. Ni devas ilin kompreni profunde, plenumi firmdecide, kaj konstante ekzameni kaj ĝustatempe resumi kiel ni lernas kaj aplikas ilin. Kiu ajn devias de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj agas kontraŭ lia strategia plano, kiu ajn prenas sin saĝa kaj iras, anstataŭ la ĝustan vojon, vojon eraran, certe perdos sian orienton kaj faros erarojn. Ĉiuj revoluciaj organizoj devas preni la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ kiel la solan orientilon por siaj agadoj. Ĉiuj paroloj kaj agoj ĉu de la dekstro aŭ de la ekstrema "maldekstro", kiuj kontraŭas al la penso de Maŭ Zedong, devas esti firme kontraŭrezistataj kaj oponataj. Ĉiu proletara revolucia batalanto devas fariĝi modelo en lernado, plenumado, propagando kaj defendo de la plej altaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

2) Daŭre profunde disvolvi la revolucian amasan kritikadon, akceli kaj firmigi la revolucian grandan unuiĝon kaj revolucian triflankan kombiniĝon, kaj profunde konduki BKR-on en ĉiu unuo kaj departemento.

En la nova jaro, ni devas pluapaŝe malkaŝi la krimagojn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj la plenmano da aliaj plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj iliaj agentoj, tiel ke ilia malbela vizaĝo kaj intrigaj aktivadoj estu senmaskigitaj en la taglumo kaj ĉiuj iliaj revoj por restaŭro estu plene frakasitaj. Prenante la penson de Maŭ Zedong kiel la armilon ni devas kritiki senkompate kaj en diversaj formoj la reviziisman linion kaj elimini ĝian venenan influon en ĉiu sfero. Tiu ĉi revolucia amasa kritikado devas esti farata kontinue dum longa periodo en kombinado kun diversaj aliaj taskoj.

Prezidanto Maŭ instruas nin: **"La ŝlosilo por formi la revolucian triflankan kombiniĝon, firmigi la revolucian grandan unuiĝon kaj sukcesigi la BKR-on en sia propra unuo estas la korekta trakto al kadroj, kaj tiu ĉi problemo nepre devas esti bone solvita. Tra la stilĝustiga kampanjo en Jan-an, nia partio edukis la vastajn amasojn de kadroj kaj unuigis la tutan partion, kaj garantiis la venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito. Tiun tradicion ni nepre devas disvolvi plue."** En la nova jaro, la vastaj amasoj de proletaraj revoluciuloj devas pene helpi des pli multe da revoluciaj kadroj korekte trakti la amasojn kaj sin mem, kaj kuraĝe elpaŝi por revolucii laŭ la penso de Maŭ Zedong. Oni devas disvolvi la revolucian grandan unuiĝon, atingi solidarecon kontraŭ la malamikoj, oponi senprincipajn frakciismajn disputojn kaj venki grupetismon kaj sektismon. Oni devas energie akceli la establon kaj firmigon de revoluciaj komitatoj ĉe diversaj niveloj, gardi ilian revolucian aŭtoritatecon, helpi ilin en perfektiĝo kaj disvolviĝo, por ke ili povu ludi potencan rolon en gvidado de la vastaj revoluciaj amasoj en la batalo por la plena venko de la granda proletara kultura revolucio.

Tie kie revolucia komitato estas starigita, ĝi nepre devas gvidi la amasojn konduki la BKR-on en siaj propraj unuoj. Estas necese reformi edukon, literaturon kaj arton, reformi la laboron de la publikaj institucioj, la administran laboron kaj ĉiujn branĉojn de la superstrukturo nerespondajn al la socialisma ekonomia bazo. En tia reformo, oni devas preni la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ kiel gvidon, trarompi la reziston de la forto de la malnovaj kutimoj, daŭre sin apogi sur la vastaj amasoj kaj kuraĝe veki ilin, energie subteni la revoluciajn aktivulojn kaj subteni la novajn aferojn kiuj aperas en la revoluciaj amasoj. Tio ĉi estas granda revolucia movado, kaj la partia gvido devas meti la proletaran politikon sur la unuan lokon, bone sukcesigi la ĉiuflankan planadon kaj ekzemplodonajn eksperimentojn, kaj kombini ĝeneralajn alvokojn kun konkreta direktado, tiel ke la BKR glate progresu sur ĉiuj batalfrontoj.

3) Rektifi partian organizon kaj fortigi partian konstruadon.

Prezidanto Maŭ lastatempe instruis nin dirante: **"La partia organizo devas konsisti el la antaŭirantaj elementoj de la proletaro, ĝi devas esti vivecplena kaj viglecplena avangarda organizo, kiu kapablas gvidi la proletaron kaj revoluciajn amasojn en batalo kontraŭ la klasaj malamikoj."** Jen estas nia granda programo por rektifi la Partion kaj konstrui la Partion.

La granda proletara kultura revolucio estas granda partio-rektifa movado. En la nova jaro ni devas, en kombino kun la revolucia amasa kritikado kaj la BKR en ĉiu unuo, fari profundan studon pri la historio de la batalo inter la du linioj interne de la Partio dum la lastaj jardekoj, fari profundan studon pri proletara partio-konstrua linio de Prezidanto Maŭ, ĝisfunde kritiki la reviziisman partio-konstruan linion de la ĉina Ĥruŝĉov, kaj purigi kaj rektifi la partian organizon.

Nombro da elstaraj, antaŭirantaj proletaraj elementoj amase aperintaj en la granda kultura revolucio, devas esti akceptitaj en la Partion; dum renegatoj, spionoj kaj nebonigeblaj obstinaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estos forbalaitaj el la Partio. La malgranda nombro da partianoj, kiuj faris gravajn erarojn, devas fari seriozan memkritikon. Tra la ŝtormo de tiu ĉi granda proletara kultura revolucio, la granda glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio fariĝas des pli pura, forta kaj plena de vigleco kaj viveco. Kun Prezidanto Maŭ, la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko, kiel la gvidanto kaj armita per la penso de Maŭ Zedong, la marksism-leninismo de la nuna epoko, la Komunista Partio de Ĉinio certe povas plenumi sian grandan historian mision daŭrigi la revolucion sub la proletara diktaturo.

Samtempe kun la rektifado de la partia organizo, la Komunisma Junulara Ligo, la ruĝaj gvardioj kaj diversaj revoluciaj amasaj organizoj senescepte devas esti rektifitaj ideologie kaj organize. Ili devas altigi sian politikan konscion kaj purigi sian vicaron, devas konfirmi siajn atingojn kaj venki siajn difektojn, plifortigi sian proletaran partian spiriton kaj nuligi sian burĝaran kaj etburĝaran frakciismon. Ĉu oni povas konscie venki sian frakciismon, estas grava signo montranta ĉu oni volas fariĝi vera proletara revoluciulo en la nova situacio. La propaganda, kultura, eduka kaj aliaj departementoj de la Partio kaj ŝtato devas preni kiel tre gravan taskon la starigon de la proletara klasa vicaro.

4) Pluapaŝe plenumi la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ pri **"subteno al la armeo kaj zorgo al la popolo"** kaj energie fortigi la solidarecon inter la armeanoj kaj popolanoj. Tio estas grava garantio por batalgajni plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio.

La granda Ĉina Popola Liberiga Armeo estas la ĉefa apogilo de nia proletara diktaturo, ŝtala Granda Muro defendanta nian socialisman patrolandon, kaj potenca subtenanto de la granda proletara kultura revolucio. Ĝi faris grandegan kontribuon en tiu ĉi revolucio. Kaj en la nova jaro, ĝi surŝultrigos al si pli multajn kaj pli gravajn taskojn. La vastaj amasoj de la komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo nepre devas daŭre efektivigi la serion da politikoj kaj principoj elmetitaj de vicprezidanto Lin Biaŭ, kiuj emfazas pri konstruado de la armeo en politiko, nome: kreive studi kaj apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ, meti proletaran politikon en la unuan lokon, persisti en la "kvar unua-oj" (t. e., unua loko devas esti donita al homo en trakto de la rilatoj inter homo kaj armiloj; al politika laboro en trakto de rilatoj inter politika kaj diversaj aliaj laboroj; al ideologia laboro en trakto de rilatoj inter ideologia kaj rutinaj laboroj en politika laboro; kaj en ideologia laboro, al la vivaj ideoj en persona menso, kiuj distingiĝas de ideoj en libroj.), pene starigi la "tri-ok" laborstilon (t. e. la tri punktoj: firma kaj korekta politika direkto, penema kaj simpla labor-stilo kaj elaste flekseblaj strategio kaj taktikoj; kaj la ok ĉinaj ideografiaĵoj kun la signifo unuiĝo, strecĉiteco, seriozeco kaj vigleco.), efektivigi demokration en politiko, ekonomio kaj militaj aferoj, kaj disvolvi kampanjon de "kvarbona roto" (t. e., roto kiu estas bona en politika kaj ideologia laboro, en la 'tri-ok'-laborstilo, en milita trejnado kaj en zorgo pri la ĉiutaga vivo.). Ili devas ankaŭ entrepreni profundan edukadon pri la batalo inter la du linioj kaj tiamaniere levi la revoluciigon kaj modernigon de nia armeo al ankoraŭ pli alta nivelo. Ili devas entuziasme respondi la batalan alvokon de vicprezidanto Lin Biaŭ: "Alte tenu la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj faru novajn meritoplenajn kontribuojn en la movado de la granda proletara kultura revolucio." Ili devas pluapaŝe ankoraŭ pli bone subteni la maldekstrulojn, subteni la industrion kaj agrikulturon, kaj efektivigi militan kontrolon kaj konduki politikan kaj militan trejnadon, kaj ankoraŭ pli bone zorgi la popolon. Ili devas firme teniĝi sur la proletara starpunkto, fidi la vastajn revoluciajn amasojn kaj sin apogi sur ili, lerni de la amasoj, serioze plenumi la principon "subteni la maldekstrulojn sed ne la frakciojn", kaj konduki profundan, delikatan kaj paciencan ideologi-politikan laboron. Ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de nia armeo devas centoble altigi sian gardemon, fortigi militpreparadon, fortikigi la nacian defendon kaj esti pretaj je ĉiu momento por frakasi militan provokon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, defendi la grandan patrolandon kaj la grandan proletaran kulturan revolucion.

5) Firme teni revolucion, stimuli la produktadon, laborojn kaj militpreparon.

"La Dekses-punkta Decido" ellaborita sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ montras: **"La granda proletara kultura revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando. La vidpunkto de kontraŭstarigo de la granda kultura revolucio kontraŭ la disvolvo de produkto estas erara."** Stimulate de la granda proletara kultura revolucio, la industria kaj agrikultura produktado de la jaro

1968 certe havos pli grandan disvolviĝon. La gvidantoj de diversaj niveloj senescepte devas meti politikon en komandon kaj, komencante de akcelado de la ideologia revoluciigo de homoj, bone teni la produktan laboron kaj rigardi tion kiel gravan taskon por gajni plenan venkon. La vastaj revoluciaj amasoj devas praktiki ŝparemon en kondukado de la revolucio, protekti ŝtatajn posedaĵojn, konscience plifortigi laboran disciplinon kaj firme kritiki kaj kontraŭrezisti la influaĉon de ekonomiismo. Oni devas klopodi energie por bona funkciado de transportado kaj komunikado. La personaroj kiuj gvidas produktadon ĉe diversaj niveloj nepre devas esti perfektigitaj kaj plifortigitaj, kaj fortaj gvidaj kernoj devas esti rapide formitaj en la gravaj departementoj de produktado kaj scienca esplorado por garantii ankoraŭ pli grandan disvolviĝon de la industria kaj agrokultura produktado.

La supre menciitaj estas la ĉefaj taskoj antaŭ ni. Arda batalado kaj energia strebado estas necesaj por plenumi tiujn glorajn taskojn.

Prezidanto Maŭ diras: **"Ĉiuj reakciaj fortoj senescepte faras furiozan baraktadon ĉe la alproksimiĝo de sia pereo".** La plenmano da renegatoj kaj spionoj sin kaŝantaj en niaj vicoj, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj obstinege rifuzas penti, la diversspecaj demonoj kaj diabloj en la socio (t. e., bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj ankoraŭ ne bone remulditaj), kaj la usona imperiismo, la sovetunia reviziismo kaj iliaj lakeoj neniam volontas akcepti sian pereon. Ili certe ankoraŭ per diversaj formoj faros mensogojn kaj kalumniojn, incitos malakordojn kaj malkonsenton kaj daŭre entreprenos detruadon kaj subfosadon. Eĉ en la bonega situacio restos iuj malhelaj anguloj kie la polvoj ne mem foriĝos sen balaado kaj estas necese plue malfermi la klapegon de klasbatalo. Ni nepre devas teni akran penson pri klasbatalo, nin apogi sur la revolucia singardemo de la vastaj popolamasoj kaj energie plifortigi la proletaran diktaturon. Por garantii la triumfan progresadon de la granda proletara revolucio, ni devas plene veki la amasojn, plene eltrovi kaj firmdecide trakti la plenmanon da klasaj malamikoj, kiuj freneze aktivadas postkulise aŭ publike por subfosi la grandan proletaran revolucion kaj la socialisman konstruadon kaj detrui la socian sekurecon kaj ordon.


Ni nepre devas klare vidi, ke la granda proletara kultura revolucio celas ne nur faligi la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, sed ankaŭ solvi la problemon de la homa mondkoncepto, la problemon de elradikigo de reviziismo. Ju pli antaŭen progresas la revolucio, des pli profunde ĝi tuŝas la animon de la homoj, kaj la konflikto inter la proletara kolektivismo kaj la burĝara egoismo fariĝos ĉiam pli rimarkebla. Ni devas konscience studi kaj apliki la "kvin popularajn artikolojn" (t. e. la "tri popularaj artikoloj" plus *Pri Korektado de Eraraj Pensoj en la Partio* kaj *Opono kontraŭ Liberalismo*), forte batali kontraŭ burĝara egoismo, forte starigi la proletaran kolektivismon kaj remuldi nian mondkoncepton en la ŝtorma klasbatalo. Tio ĉi estas la sola vojo por senhezite kaj sendevie sekvi Prezidanton Maŭ kaj fariĝi veraj **"proletaraj revoluciuloj, kiuj firmdecide kondukos la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino".**

La brilegaj atingoj de la granda proletara kultura revolucio de nia lando donas grandegan inspiron al ĉiuj revoluciaj popoloj en la mondo kaj pezege batas la usonan imperiismon, la modernan reviziismon de Sovetunio kaj iliajn lakeojn. Ĉiaj mensogoj kaj kalumnioj faritaj de ili kontraŭ la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio estas komplete superitaj de la orienta vento de la granda venko de la ĉina popolo kaj trafis hontindan bankroton. Lasu tiujn sinjorojn kriegi malespere! Ni daŭre unuiĝos kun la tutmondaj marksist-leninistoj, kun la vastaj revoluciaj popoloj tra la tuta mondo, kondukos ĝis la fino la batalon kontraŭ imperiismo, la moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj kondukos ĝis la fino la grandan proletaran kulturan revolucion. Sub la direktado de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la ĉina popolo gajnos grandajn sukcesojn en la nova jaro, kiuj certe pli impete vekos la tutan mondon.

Vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj, komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, junaj ruĝgvardiaj batalantoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj! Ni pli alten levu la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, disvolvu la proletaran spiriton de ĝisfunda revolucio, nin gardu kontraŭ fieraĉo kaj malpacienco, forte strebadu senĉese, unuiĝu unuanime, pene luktu kontraŭ malfaciloj kaj faru novajn meritoplenajn kontribuojn por la patrolando kaj la popolo por marŝi renkonte al la plena venko de la granda proletara kultura revolucio!

Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la plena venko de la granda proletara kultura revolucio!



Plej Grandaj Subteno

kaj Instigo

Prezidanto Maŭ akceptas la tutan personaron de la japana teatra trupo "Dentrado". Tio estas plej grandaj subteno kaj instigo al la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de Japanio kaj ankaŭ al tiuj de la tuta mondo.



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lia intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj fotiĝas kune kun la tuta personaro de la japana teatra trupo "Dentrado".



Gratula Telegramo de Prezidanto Maŭ al Prezidanto Nguyen Huu Tho

JE la 19-a de decembro, 1967, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong sendis telegramon al Prezidanto de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto Nguyen Huu Tho por esprimi la plej varmajn gratulojn pro la 7-a datreveno de la fondiĝo de la Fronto. La telegramo tekstas jene:

Prezidantaro de la Centra Komitato de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto

Prezidanto Nguyen Huu Tho:

Okaze de la 7-a datreveno de la fondiĝo de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto, mi esprimas en la nomo de la ĉina popolo la plej varmajn gratulojn al la batalanta popolo de suda Vjetnamio.

Ja bonege vi batalas! Sub ekstreme malfacilaj kondiĉoj, vi apogas vin sur la propraj fortoj kaj batas la usonan imperiismon, la plej ferocan en la mondo, tiel ke ĝi trovas por si neniun elirejon kaj estas en plena embaraso. Tio estas granda venko. La ĉina popolo salutas vin.

Via venko ankoraŭfoje montras ke ĉiu lando, granda aŭ malgranda, povas venki ĉiun ajn potencan malamikon, nur se ĝi plene mobilizas sian popolon, firme apogas sin sur sia popolo kaj faras popolan militon. Per sia nacisava milito kontraŭ la usona imperiismo sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh, la vjetnama popolo starigis brilan ekzemplon por la subprematai popoloj kaj subprematai nacioj de la tuta mondo batalantaj por sia liberiĝo.

La tagoj de la usonaj agresantoj en Vjetnamio restas ne multaj. Sed, baldaŭ pereonte, ĉiuj reakciaj fortoj ĉiam faras antaŭmortajn baraktojn. Ili nepre sin turnas al milita aventuro kaj politika trompo per ĉiuj rimedoj por savi sin el pereo. Kaj la revoluciaj popoloj ankaŭ neeviteble renkontas diversspecajn malfacilojn antaŭ sia fina venko. Tamen, ĉiuj tiuj malfaciloj estas venkeblaj, kaj neniu malfacilo povas malhelpi la antaŭenmarŝon de la revoluciaj popoloj. Persisto signifas venkon. Mi profunde konvinkiĝas, ke persistante pri longdaŭra militado la vjetnama popolo certe povos forpeli el sia lando la usonajn agresantojn.

Ni firme subtenas vin. Ni estas najbaraj landoj kun intima rilato kiel tiu inter lipoj kaj dentoj. Niaj du popoloj estas fratoj dividantaj inter si feliĉon kaj malĝojon. La frata sudvjetnama popolo kaj la tuta frata vjetnama popolo povas esti certaj, ke la batalo via estas ankaŭ nia. La sepcent-miliona ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas ilia fidinda postfronto. Antaŭ la solida batala unuiĝo de niaj du popoloj, ĉiuj militaj aventuroj kaj politikaj trompoj de la usona imperiismo estas destinitaj al fiasko.

Venko definitive apartenos al la heroa vjetnama popolo!

Maŭ Zedong

La 19-an de decembro, 1967



Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong ***kaj aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ eldonitaj de nia lando en diversaj lingvoj***

La Trezoraj Libroj de Prezidanto Maŭ en la Tuta Mondo

LA pasinta pli ol unu jaro depost la disvolviĝo de la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio estis jaro, en kiu verkoj de Prezidanto Maŭ vaste disvastiĝis tra la tuta mondo. En tiu ĉi periodo, la distribuo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la tuta mondo estis senprecedence granda ĉu en kvanto ĉu en skalo.


Laŭ unuapaŝa statistiko, en la lasta pli ol unu jaro, pli ol 4,600,000 ekzempleroj de fremdlingvaj eldonoj de verkoj de Prezidanto Maŭ estis distribuitaj de Guozi Shudian (Internacia Librejo) de Ĉinio kaj presitaj en 25 lingvoj, nome: la vjetnama, birma, taja, indonezia, hindia, japana, urdua, persa, araba, nepala, mongola, svahilia, hispana, albana, angla, franca, rusa, germana, itala, portugala, norvega, nederlanda, haŭsa, korea kaj esperanta. Tiu sumo superis la totalan kvanton de verkoj de Prezidanto Maŭ distribuitaj eksterlanden en la 17 jaroj depost la fondiĝo de nia respubliko.

Krome, laŭ nekompleta statistiko, verkoj de Prezidanto Maŭ estis tradukitaj meminiciate en 55 landoj kaj regionoj. Ili aperis

en 65 lingvoj kaj 845 eldonspecoj. Inter ili estis 43 specoj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj *Elektitaj Militaj Verkoj de Maŭ Zedong*, 802 specoj de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, la "tri popularaj artikoloj", kompilitaj kaj apartaj verkoj de Prezidanto Maŭ. Kaj ne kalkuleblaj estas la verkoj kaj poemoj de Prezidanto Maŭ kaj liaj deklaroj kaj paroloj en la lastaj jaroj pri la subteno al la revoluciaj bataloj de la tutmondaj popoloj publikigitaj sur ĵurnaloj kaj gazetoj.

La verkoj de Prezidanto Maŭ eldonitaj de Ĉinio en diversaj lingvoj nun jam estas disvastigitaj en 148 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj. La verkoj de Prezidanto Maŭ jam fariĝis libroj plej bonvenigataj de la vastaj popolamasoj en multaj landoj. Kiam trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ atingis iujn librejojn, antaŭ ol oni trovis tempon por ilin elmontri, ili ofte tuj estis forventitaj en kelkaj horoj, eĉ en kelkaj minutoj. Preskaŭ ĉiutage amasoj da personoj atendas antaŭ iuj librejoj. De tempo al tempo aĉetantoj venas al ili por pridemandi kiam oni ekvendos la trezorajn librojn. Aŭdinte la alvenon de la verkoj de Prezidanto Maŭ, oni tuj ekklopodas por sciigi tion unu al alia kaj svarmas en vicoj al librejo. Tuj post kiam la novaĵo pri la aperigo de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en fremdlingvaj eldonoj disflugis eksterlanden, amase venis al Ĉinio leteroj kaj telegramoj por mendo el diversaj lokoj de la mondo. Sennombraj leteroj de legantoj esprimis unu komunan deziron: plej rapide akiri la ruĝan trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Librejoj en multaj landoj senĉese sendas leterojn por urĝigo kaj plia mendo, kaj la mendokvantoj ĉiam kreskas.

La vasta dissemado de la penso de Maŭ Zedong tra la tuta mondo skuas la terglobon. La revoluciaj popoloj de la mondo varme huraas pro la vasta disvastiĝo de verkoj de Prezidanto Maŭ tra la tuta mondo, ĉar ĝi "faris grandan kontribuon al la internacia komunisma movado kaj antaŭenpuŝis la revolucian aferon de la tutmondaj popoloj". La teoriaj verkoj de kamarado Maŭ Zedong faris la marksism-leninisman sciencon orientilo de revolucio por centoj da milionoj da popolanoj ĝis la grado neniam antaŭe konata, kaj metis "en tagordon la problemon pri la posedo de marksism-leninismo en la laboranta popolo".




La revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de Albanio feliĉe ricevas la ruĝan trezoran libron Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong *en albana lingvo.*


La verkoj de Prezidanto Maŭ "formis mejloŝtonon en la disvolviĝo de marksism-leninismo kaj markis ke jam alvenis nova erao de marksism-leninismo — la erao de la penso de Maŭ Zedong". La verkoj de Prezidanto Maŭ estas "klasikaj verkoj de marksism-leninismo plej alt-nivelaj en la nuna epoko", "plej akra kaj plej potenca ideologia armilo" de la subpremataj popoloj de la tuta mondo, kaj "ĉiam lumanta lampo" sur la vojo de ilia batalo por la libero kaj emancipiĝo. Tial, la revoluciuloj de multaj landoj prenas la studon kaj disvastigon de la penso de Maŭ Zedong kiel sian ekstreme gravan taskon, ili fervore kaj kuraĝe propagandas ĝin spite malfacilojn kaj vivdanĝeron. Ili firme decidis starigi, tra la tuta mondo, la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong. Antaŭ nelonge, tri ordinaraj revoluciuloj kun malsamaj naciecoj estis arestitaj de britaj policanoj en Londono pro vendo de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* antaŭ la enirejo de Hyde-parko — la tiel nomata "montroŝranko de demokratio" de la brita imperiismo. Tiuj tri revoluciuloj sin prezentis neordinare aplombaj, kuraĝaj kaj neŝanceleblaj antaŭ la faŝista perforto. Kiam la juĝisto minacis ilin per monpuno kaj enkarcerigo, ili, plenaj je sentimo kaj justeco, refutis la senbazan juĝon. Fine, en la juĝejo ili laŭte kriis kun levita brako "Vivu Prezidanto Maŭ!" kaj aliajn revoluciajn sloganojn, kio konsternis la reakciulojn. La farsaĵo ludita de la brita instanco antaŭ Hyde-parko kaj ĝia faŝista perfortaĵo en la juĝejo ne nur ne povas malhelpi la disvastigon de la penso de Maŭ Zedong, sed male, vekis pli kaj pli da revoluciaj amasoj al la batalo por ĝin propagandi kaj defendi. La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong nepre puŝos la revolucian batalon de la mondaj popoloj al impeta disvolviĝo, kaj la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong nepre flirtos super ĉiuj lokoj de la mondo.

La japanaj geamikoj konkure aĉetas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.





La popolo de Kongolando (B.) soife studas verkon de Prezidanto Maŭ.



La arabaj junuloj konkure petakiras Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.



La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ

Revoluciaj Esperantistoj Amas la Trezoran Libron


LA revolucia trezora libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, delonge soifata de la revoluciaj esperantistoj de la tuta mondo, eldoniĝis pasintjare en Esperanto. Post la apero, ĝi ĝuas tre varman bonvenigon de esperantistoj en diversaj landoj. De ili venis al ni por mendado leteroj post leteroj, en kiuj ili laŭdegas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la brilan penson de Maŭ Zedong kaj esprimas sian varman gratulon al ni pro la apero de la ruĝa libro.

Longe antaŭ la apero de la ruĝa libro, multaj revoluciaj geesperantistoj jam soife deziris akiri la libron, demandis per leteroj pri la tempo, kiam ĝi aperos, kaj forte postulis, ke oni eldonu la revolucian trezoran libron kiel eble plej rapide. Nelonge post la komenco de la granda kultura revolucio en 1966, iu belga leganto skribis al ni sian sinceran peton por la trezora libro, dirante: "Antaŭ kelkaj tagoj, mi vidis en la televido la grandan amasiĝon de la 'Ruĝaj Gvardianoj' en la stratoj de Pekino. Mi rimarkis ke preskaŭ ĉiuj posedas ruĝan libreton kiu, oni klarigis al mi, entenas la pensojn de Maŭ Zedong. Kun miro vidinte la entuziasmon kreitan de tiuj pensoj, mi ŝatus koni kelkajn el tiuj. Ĉu estas eble ke vi sendu al mi iom da en Esperanton tradukitaj pensoj, . . ." Iu usona leganto skribis en sia letero kun forta deziro, ke se aperos *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ni tuj sciigu al li.

Ricevinte la ruĝan libron, ili esprimas sian plej emocian senton ĝenerale per simpla lingvo. Iu angla esperantisto skribis en sia letero: "Mi tutkore dankas vin pro tiu ruĝa libreto — *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Tiu ĉi libro estas eterna ĝojo por mi. Mi kun fiereco donas ĝin al miaj amikoj, konatoj kaj parencoj legi." Iu hungara leganto, vivanta sub la regado de la reviziisma kliko, malfacile akiris la trezoran libron. Per aludo li sin esprimis en letero: "Mi bonorde ricevis tiun ruĝan libron, via sendaĵo ĉiam ĝojigas min." Ricevinte la ruĝan libron, iu franca esperantisto skribis al ni: Pro tiu ĉi sendaĵo (*Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*) bonvolu akcepti miajn plej korajn kaj varmajn dankojn. Kiel vi skribas, la penso de Maŭ Zedong estas la plej potenca armilo por oponi imperiismon. Ĝi esprimas la plej puran veron de marksism-leninismo; ĝi prilumas, kiel ruĝa suno, la ĝustan revolucian vojon; ĝi estas la diamanta roso al kiu sopiras la subpremataj amasoj, la lampo, kiu gvidas nin el la tenebro de kapitalismo, la brila lumturo, kiu malkaŝas la perfidajn ondegojn de reviziismo kaj kuraĝigas la korojn de veraj revoluciuloj sturmbatataj de reakcia ŝtormo."

La revoluciaj esperantistoj alte taksas la gravan signifon de la apero de *Vortoj de Perzidanto Maŭ Zedong* en Esperanto. Ili opinias, ke tio ege akcelos la ideologian revoluciigon de la esperantistoj, kaj estas ankoraŭ pli granda subteno por la esperantistoj, kiuj sin okupas pri revolucia laboro. Iu finlanda leganto skribis al ni: "Vi jam faris tre elstaran laboron. Mi opinias, ke la apero de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas afero grandioza." Iu esperantisto skribis en sia recenzo pri la ruĝa libro: "Tiu ĉi 'ruĝe brila libro' kiu estas la 'revolucia trezoro' estas plej ŝatata ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de la revoluciaj popoloj de la mondo.... *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas interesa legaĵo por tiuj kiujn pensigas la monda politiko." Iu 90-jara sveda esperantisto skribis al ni: "Kun granda intereso mi nun tralegis la libron de via ŝatata Prezidanto: *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Estas tre bona libro, kie la subpremata proletaro en la tuta mondo povas ĉerpi instruon por sia liberiga batalo kontraŭ ĉiu burĝara kaj imperiisma subpremanto."

La apero de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en Esperanto ja estas la plej ĝojiga informo por esperantistoj.



Parto el la jus eldonitaj verkoj de Prezidanto Maŭ

Amasa Eldonado de Verkoj de Prezidanto Maŭ en Esperanto

DEPOST la granda proletara kultura revolucio en Ĉinio la Fremdlingva Eldonejo en Pekino jam eldonis en esperanta traduko la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj grandan nombron da liaj aliaj verkoj en apartaj broŝuretoj. Iliaj specoj plimultiĝis je unu oblo kaj duono ol tiuj de la esperantaj eldonoj de verkoj de Prezidanto Maŭ eldonitaj en Ĉinio dum dek ses jaroj antaŭ la granda kultura revolucio. Inter ili troviĝas la verkoj multe legataj de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo, nome, liaj "tri popularaj artikoloj", kvar famaj, brilaj filozofiaj verkoj (*Pri Kontraŭdiro, Pri Praktiko, Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj *De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?*) kaj la gravaj verkoj *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio, Daŭrigu la Revolucion ĝis la Fino, Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro, Kvin*

Dokumentoj de Prezidanto Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong, Pri Popoldemokratia Diktaturo k. *a.*

Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj aliaj eldonitaj verkoj supre menciitaj trovas tre varman akcepton ĉe la vastaj amasoj de esperantistoj, kiuj nomas tiujn trezorajn librojn la "plej valora donaco" kaj amase mendas ilin letere. Ĝis la fino de 1967, en la periodo de unu jaro kaj duono, la distribuita kvanto de la verkoj de Prezidanto Maŭ en Esperanto kreskis jam ĝis pli ol duoblo de la totala kvanto distribuita dum la dek ses antaŭirintaj jaroj.

La revoluciaj esperantistoj tra la mondo alte taksas la penojn, kiujn la Fremdlingva Eldonejo en Pekino faris en propagando de la penso de Maŭ Zedong. Uzi Esperanton por grandkvante eldoni la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj propagandi lian penson estas novaĵo en la esperantista rondo kaj havas tre grandan signifon. Ili rigardas la eldonadon de tiuj verkoj kiel netrotakseble gravan aferon. Ĝi faris, antaŭ ĉio, gravan kontribuon por klare komprenigi al la vasta amaso de esperantistoj la reakcian naturon de la imperiistoj, reviziistoj kaj ĉiuj reakciuloj, por ke ili aktive partoprenu revoluciajn batalojn kontraŭ tiuj malamikoj, defendu la mondpacon, kaj iru la vojon de la ĉina revolucio. Krome, ĝi puŝas antaŭen ankaŭ la disvolviĝon de la lingvo Esperanto mem. Iu esperantisto en Svedio diris: "Sen revolucia teorio ne povas esti revolucia movado. Ni dankas la Fremdlingvan Eldonejon pro tio ke ĝiaj valoraj eldonaĵoj armas nin per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong." Iu angla esperantisto skribis kun fiero, ke nun li povas studi verkojn de Maŭ Zedong rekte per Esperanto.

La amasaj eldonado kaj distribuado de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj liaj aliaj verkoj rezultiĝis el tio ke la revoluciaj kamaradoj de la Fremdlingva Eldonejo firme batalas kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov kiel ilia ĉefo. En la pasinteco, pere de siaj agentoj en la eldona rondo, la ĉina Ĥruŝĉov ĉiel sabotis kaj malhelpis la disvastigon de la penso de Maŭ Zedong kaj energie reduktis la eldonan kaj distribuan kvantojn, dume ili ellasis eksterlanden amasojn da venenaj verkaĉoj de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo por venenigi la legantojn tra la mondo kaj krei internacie publikan opinion por sia restaŭro de kapitalismo en Ĉinio.

En la senprecedenca, granda movado de kultura revolucio, la revoluciaj kamaradoj de la Fremdlingva Eldonejo kun senlima amo, senlima adoro kaj senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉiam metas sur la unuan lokon en siaj laboroj la eldonadon de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la propagandon de lia penso. En siaj laboroj ili ĉiam memoras la plej altan instrukcion de Prezidanto Maŭ pri la esperanta laboro: **"Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."** Ili diris decideme, ke la penso de Maŭ Zedong estas la plej altnivela marksismleninismo en la nuna tempo, la plej potenca ideologia armilo por batali kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj. La penso de Maŭ Zedong ja estas la plej alta vero. Ni devas preni Esperanton kiel formon kaj peni disvastigi la penson de Maŭ Zedong por ke ĝi ruĝe brilu tra la tuta mondo.

En la preparado de eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj liaj aliaj verkoj, esperantistoj en diversaj landoj alsendadis unu post alia leterojn kun senlima kredo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ por peti liajn verkojn kaj kuraĝigi la revoluciajn kamaradojn en la Esperanta Fako de la Fremdlingva Eldonejo, tiel ke la lastaj laboris tage kaj nokte por kiel eble plej rapide liveri la trezorajn librojn al la eksterlandaj esperantistoj.

Nun, la revoluciaj kamaradoj en la Esperanta Fako de la Fremdlingva Eldonejo decidis teni pli alte la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj peni en la daŭra kunlaborado kun la revoluciaj kamaradoj de la frataj institucioj por pli multe kaj pli bone eldoni la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj propagandi la penson de Maŭ Zedong!



VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

(en Esperanto)

358 P. 9 x 13 cm.

En poŝformato kun ruĝa plasta kovrilo prezo: £. 0-2-0

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinio

Aĉetu ĉe niaj perantoj en via lando aŭ rekte ĉe ni —— Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio. Katalogo laŭ peto.

Ho Vivu, Onklo Maŭ!

NGUYEN VAN KHAI (Vjetnamio)

Vizaĝe al la suno en matena horo,
Baniĝas mi en dolĉa gajhumoro.
Mi tenas ambaŭmane Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong,
Kaj kantas en interno mia tuta koro!

Ho, kiom multe al ĝi kuntorentas sang' bolanta!
Ĉar tie staras alte la figur' giganta.
Ĝi estas Prezidanto Maŭ, l' espero de l' tutmonda proletar' kaj la gvidanto granda.

Ho, kia feliĉego en mi ridas vere,
Kiam eldiron de la Prezidant' ellernas mi parkere!

Ĉu eblas esti esprimata per ĉi-poemeto amo mia
Al onklo Maŭ? Ja ties nobla kor' stimulas min ĝis plena bol'!
El orient' la suno donas fortan lumon al la voj' revolucia!

"Proletoj de la tuta mondo, unuiĝu!"
Antaŭen marŝu brave, kun ruĝflago alte en l' aero!
Apliku l' grandan penson de Maŭ Zedong!
Frakasu tute la katenojn, luktu por libero!

Proletoj de Azio, de Afriko kaj de Latinameriko,
Jam unuiĝu kaj frakasu la sistemojn de l' demonoj,
Leviĝu brave por revolucia praktiko!
La vol' de onklo Maŭ ja estas volo de centmilionoj!



La popolo de Hanojo rigardas la portreton de Prezidanto Maŭ kun senkompara feliĉo kaj fiero.

Kontraŭ Usono ni rezistas sur la frontlinio,
Kaj ĉiujn agresantojn ni kun plena energio
Nepre ekstermos en batalo nia de revolucio!

De l' Amikec-pasej' ĝis Kamaŭ-promontoro,
Nian integran patrolandon regas sama volo.
Se vi intrigas ĝin dividi, agresantoj!
Longdaŭran rezistadon faros la tuta popolo
Kun la eldir' de Prezidanto Ho ĉizita en la koro!

Miaj paperoj ne sufiĉas ja por skribi la altan amikan senton!
Ni ĝoje kriu: Vivu l' granda Ĉina Kompartio!
Brilege venku l' granda proletkultura revolucio de Ĉinio!

Ho vivu, onklo Maŭ!
Ho vivu, onklo Maŭ!

La Batalo inter la Du Vojoj en la Ĉina Kamparo

Redakcioj de *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*), *Hongqi* (**gazeto** *Ruĝa Flago*) **kaj** *Jiefangjun Bao* (**jurnalo** *Liberiga Armeo*)

NUN bonega estas la situacio en la kamparo. Centoj da milionoj da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, same kiel la vastaj revoluciaj amasoj en la urboj, estas plene mobilizitaj. Direktate de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, **kontraŭbatalante egoismon kaj kritikante reviziismon,** ili ege altigis sian socialisman konscion. La granda revolucia movado alportis novan leviĝon de produkto. Ĉijare, la agrikultura produkto akiris grandan riĉrikolton. En la kamparo ĉie montriĝas prospera aspekto.

Pluapaŝe penetre kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov rilate al la kamparo kaj likvidi ĝian venenan influon estas grava batala tasko nuntempe por disvolvi la grandan proletaran kulturan revolucion en la kamparo.

Ĉinio estas granda lando kun pli ol kvincent milionoj da kamparanoj. Ĉu oni povas ĝuste solvi la kamparanan problemon, estas ŝlosila punkto koncernanta la venkon de la demokratia revolucio de nia lando kaj ankaŭ tiun de la socialisma revolucio de nia lando. Ĉu konduki la ĉinan kamparanaron al socialismo aŭ al kapitalismo post la venko tra la tuta lando decidas la sorton de la proletara diktaturo kaj tiun de la socialisma sistemo.

Ĝuste sur tia problemo kun unuagrada graveco ĉiam ekzistas intensa pint-kontraŭpinta batalo inter la du vojoj kaj la du linioj dum dekkelkaj jaroj depost la Liberiĝo.

Antaŭvespere de la tutlanda liberiĝo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris: **"Serioza problemo estas la edukado de la kamparanoj". "Sen socialigo de agrikulturo, ne povas esti kompleta, firma socialismo".**

Nia granda direktilisto Prezidanto Maŭ ellaboris marksism-leninisman linion por la

socialisma revolucio en la kamparo. Ĝi estas linio por ekstermi kapitalisman ekspluaton en la kamparo kaj realigi kolektivigon de la agrikulturo, estas linio por ĝisfunde plenumi la socialisman revolucion sur la agrikultura fronto kaj konduki la kamparanojn suriri la larĝan vojon de socialismo.

Tamen, kion faris en dekkelkaj jaroj tiu plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, la ĉina Ĥruŝĉov, pri la agrikultura problemo?


Antaŭ la fundamenta plenumo de la socialisma agrikultura transformo, li plenforte protektis kaj disvolvis kulakan ekonomion, oponis kontraŭ la socialisma kolektivigo de agrikulturo; post la fundamenta plenumo de la socialisma agrikultura transformo, li ege entreprenis kapitalisman restaŭran aktivadon, disintegrigis la socialisman kolektivan ekonomion, freneze subfosis la socialisman revolucion en la kamparo kaj oponis kontraŭ la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li praktikis centpocentan kontraŭrevolucian reviziisman linion, kiu vane provas efektivigi kapitalisman restaŭron en la kamparo, t. e., en esenco, restaŭron de bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj.

Sisteme kaj ĝisfunde kritiki kaj refuti tiun ĉi kontraŭrevolucian reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov per la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ havas ekstreme gravan praktikan signifon por persisti en la socialisma vojo, solidigi la proletaran diktaturon kaj elfosi la radikon de reviziismo.

LA ĈINA ĤRUŜĈOV ESTAS FEBRA DISTRUMPETANTO PRI KULAKA EKONOMIO

La fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko markas la fundamentan finiĝon de la demokratia

La kamparanoj amase iras kun ruĝaj flagoj kaj sloganoj por partopreni la fondiĝan kunvenon de kooperativo en Kaŭgan, Dejang-gubernio, Siĉuan-provinco, 1955.



revolucio kaj la komencon de la socialisma revolucio en nia lando.

En marto, 1949, en sia raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Prezidanto Maŭ jam montris: **"Post la tutlanda venko de la ĉina revolucio kaj la solvo de la agra problemo", la enlanda fundamenta kontraŭdiro estas "la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la burĝaro."**

Prezidanto Maŭ montris ankaŭ: **"La disigitaj individuaj ekonomioj agrikultura kaj metia, kiuj okupas 90% de la totala produktvaloro de la nacia ekonomio, povas kaj devas esti prudente, paŝon post paŝo kaj tamen aktive kondukataj por disvolviĝi en la direkto de modernigo kaj kolektivigo, kaj la vidpunkto lasi ilin iri sian propran vojon estas erara."**

Laŭ tiu ĉi marksism-leninisma ideo de Prezidanto Maŭ pri kontinua revolucio, t. e. la ideo de seninterrompa transiĝo de la stadio de la burĝara demokratia revolucio al la stadio de la proletara socialisma revolucio, post la agrara reformo, oni nepre devas forĝi feron dum ĝi estas varmega, ĝustatempe disvolvi interhelpan kaj kooperan movadon, paŝo-post-paŝe establi socialismajn produktajn rilatojn en agrikulturo, konduki la kamparanojn iri la socialisman vojon kaj limigi kaj ekstermi kapitalismon en la kamparo.

Pint-kontraŭ-pinte al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la ĉina Ĥruŝĉov tuj elsaltis por febre prediki kapitalismon kaj frenezege oponi kontraŭ socialismo, reprezentante la interesojn de la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj.

La fondiĝa kunveno de la altgrada agrokultura-paŝta produkta kooperativo "Ora Stelo" fondita en 1955 sub la gvido de la tutlanda labormodelo Li Ŝunda, en Higoŭ de Pingŝun-gubernio, Ŝanhi-provinco





Kamparanoj legas la raporton de Prezidanto Maŭ pri la problemo de agrokultura kooperigo, afiŝita sur la strato de Gianggin-gubernio, Siĉuan, en la tempo kiam la alta tajdo de socialisma transformo en agrokulturo vaste leviĝis en la kamparo de la tuta lando, 1955.

Nur iom pli ol unu monaton post la fermiĝo de la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, tiu ĉi ĉina Ĥruŝĉov kuris al Tiangin, senhonte laŭdegis la kapitalistojn kaj elmetis famaĉan teorion "ekspluato estas merito".

Tuj post la Liberiĝo de la tuta lando, ĉi tiu ĉina Ĥruŝĉov energie distrumpetis pri disvolvo de la kulaka ekonomio. En januaro de 1950, en sia nigra "instrukcio" al granda perfidulo An Ziven, li diris absurde: "Nun ekspluato ja savas homojn kaj malpermeso de ekspluato estas dogmismo. Nun ekspluatado estas necesa kaj devas esti bonvenigata."

Rekte kontraŭante la tezon, ke la agrikultura kaj metia ekonomioj ne devas esti lasitaj preni sian propran vojon, elmetitan de Prezidanto Maŭ en la raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina Ĥruŝĉov diris: "Dungado de laboristoj kaj individua terkulturado devas esti lasitaj preni sian propran vojon", "estas bone se iom da kulakoj emerĝas el tio". Li propagandis ankaŭ, ke oni "ne limigu" dungadon de laboruloj por terkulturo, asertante, ke tio estas "laŭleĝa" kaj "ankaŭ utila por malriĉuloj".

Li ankaŭ furioze blekis: "En la venontaj kelkaj jaroj, la tipo de kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro devas disvolviĝi ĝis okdek pocentoj de la tuta kamparana familiaro."

En sia parolado farita en junio de la sama jaro, li diris ankaŭ: "La politiko konservi la

kulakan ekonomion" "estas longtempa politiko".

El tiaj hurloj de vampiroj, ni povas vidi, per kiaj avaro kaj frenezo propraj al la ekspluataj klasoj la kapitalismaj fortoj en la kamparo vane klopodis por engluti socialismon. Tio estas de la kapo ĝis la piedoj kanibala filozofio de la burĝaro!

"Ekspluato savas homojn"! "Dungado de laboristoj estas laŭleĝa"! Ĝi "savas" la homojn el la burĝaro, kaj estas "laŭ" kapitalisma leĝo. Ĉu ne estas kristale klare, kia nigra ŝlimo estas kaŝita en la viscero de tiu enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, kiu tiel febre prikantis la ekspluatan sistemon kaj priskribis kiel "paradizon" la damnindan sklavigismon de dungitaj laboristoj?!

"Disvolvi la tipon de kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro"! Ĉiuj, kiuj havas eĉ iom da komuna scio, scias, ke en la vasta kamparo, tia kamparana familio kia kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro, absolute ne estas mezkamparana sed kulaka. La tiel nomata disvolvo de la tipo de kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro ĝuste signifas disvolvi kulakan ekonomion, ke kapitalismo okupu la kamparan pozicion, ke la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj denove falu en tragedian staton esti subpremataj kaj ekspluatataj, subfosi la aliancon de laboristoj kaj kamparanoj, subfosi la diktaturon de proletaro.

"Ne devas limigi"! La febra laŭdo farita de tiu ĉi potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon pri la kulaka ekonomio ĝuste celas "limigi" kaj strangoli la aktivecon de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj iri la socialisman vojon, kaj tamburante malfermi vojon por la kapitalismaj fortoj. Tio, pri kio li kriaĉis "ne devas limigi", estas nenio alia ol kapitalisma ekspluatado. Tio ja estas la klasa enhavo de lia tiel nomata "libero"!

Por trompi la amasojn, la ĉina Ĥruŝĉov eĉ nomis nigron blanko kaj inverse asertante: "Nur en la estonteco kiam 70% el la kamparaj familioj posedos po 3 ĉevalojn, estu starigataj kolĥozoj."

Grincigante la dentojn kun malamo li kalumniis la malriĉkamparanojn: "Ne opiniu kolektivisto ĉiun oponanton kontraŭ individua mastrumado."

Tio estas ofendego kontraŭ la malriĉkamparanoj, estas monstra distordo de la socialisma agrikultura kolektivigo! Prezidanto Maŭ montris, ke la vasta malriĉa kamparanaro kaj malsupera mezkamparanaro havas **"ekstreme grandan socialisman aktivecon".** En la pasinteco ili estis kruele ekspluatataj de la bienuloj kaj kulakoj, tial ili estas saturitaj de venĝemo kaj malamo kontraŭ la ekspluata sistemo. Post la agrara reformo, kvankam ilia vivo estis certagrade plibonigita aŭ ege plibonigita ol en la pasinteco, tamen la ekonomia pozicio de multaj restas tre malfacila (por la malriĉkamparanoj) aŭ ne riĉa (por la malsuperaj mezkamparanoj), tio decidas, ke ili firme oponas kontraŭ individua mastrumado, firme batalas kontraŭ la kapitalisma ekspluata sistemo kaj aktive postulas iri la socialisman kolektivigan vojon. Ili estas la apoga forto de la Partio en la kamparo kaj la ĉefa forto de la kampara socialisma revolucio. Doni baton al la malriĉkamparanaro signifas baton al revolucio kaj oponon kontraŭ socialismo; starigi "kolĥozojn" per sinapogo sur la kulakoj signifas neniom da socialismo sed nur centprocentan kapitalismon.

La absurda tiel nomata "teorio" ke oni povas entrepreni kolektivigon "nur en la estonteco kiam 70% el la kamparanaj familioj posedos po 3 ĉevalojn" estas nenio alia ol figfolio al la nuda kapitalisma ekspluatado. Tio estas plena trompo kaj tute neebla, ke 70-80% el individue kulturantaj kamparanoj fariĝu kulakoj kaj estas konate al ĉiu ajn, ke la tago kiam la kulaka ekonomio superkontrolos la kamparon estos la horo kiam la pli ol "70%" el la kamparanoj denove falos en senhavan mizeran vivon sub la subpremado fare de la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj. Jen tio estas la tiel nomata "utilo" de la ĉina Ĥruŝĉov al "malriĉuloj".

La ĉina Ĥruŝĉov resumis tiun kompleton da kontraŭsocialismaj teorioj en unu programon



En la lasta tagdeko de aŭgusto, 1958, fondiĝis la unua popola komunumo "Ruĝa Flago" en Ĉangping-gubernio, Pekino.

neantan la socialisman revolucion: "Nun batalu por firmigi la nov-demokratian sistemon."

La tiel nomata "firmigo de la nov-demokratia sistemo" celas ĝuste defendi la interesojn de la burĝaro kaj disvolvi kapitalismon en urboj kaj la kamparo. Ĝisfine dirite, tio celas tiri la liberigitan Ĉinion ree al la malnova vojo duonkolonia kaj duonfeŭda.

Tiu reakcia programo estis severe refutita de Prezidanto Maŭ. En junio de 1953, en sia parolado Prezidanto Maŭ pint-kontraŭpinte montris, ke **tia formulado estas malutila.** Li penetre montris: **la transira periodo estas plena de kontraŭdiroj kaj bataloj. Nia nuna revolucia batalo estas eĉ pli profunda ol la pasinta armita revolucia batalo. Tio estas revolucio por komplete enterigi la kapitalisman sistemon kaj ĉiujn aliajn ekspluatajn reĝimojn. La ideo "starigi definitive la nov-demokratian socian ordon" ne konformas al la stato de la aktuala batalo kaj malhelpas al la disvolviĝo de la socialisma afero.**

La proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ radikale malkovris la reakcian esencon de la linio de la ĉina Ĥruŝĉov por disvolvi kapitalismon kaj klare montris la direkton por la granda socialisma revolucio. Komenciĝis granda socialisma revolucio en kiu partoprenas kelkcent milionoj da kamparanoj! Komenciĝis batalo des pli akra, des pli intensa, inter la du vojoj!


LA ĈINA ĤRUŜĈOV ESTAS LA POTENCTENANTO N-RO 1 IRANTA LA KAPITALISMAN VOJON, KIU SUFOKIS AGRIKULTURAN KOOPERIGON

Ke la proletara revolucia partio gvidas la kamparanojn iri la vojon de kooperigo, estas fundamenta principo de marksism-leninismo, estas konsekvenca penso de Prezidanto Maŭ. En 1943, Prezidanto Maŭ jam faris la grandan alvokon **"organiziĝu"**, kaj penetre montris: **"Inter la kamparanaj amasoj, individua ekonomio regis dum miloj da jaroj, ĉiu familio formis produktan unuon. Tia disigita individua produkto estas la ekonomia bazo de feŭda regado kaj igis la kamparanojn mem resti en ĉiama malriĉeco. La sola rimedo por ŝanĝi tian staton estas iom-post-ioma kolektivigo; kaj la sola vojo por tion efektivigi, laŭ Lenin, estas tra kooperativoj."**

Post la Liberiĝo de la tuta lando, sekve de la plenumo de la agrara reformo kaj sub la direktado de la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ, la agrikultura interhelpa kaj koopera movado estis disvolvita al nova stadio.

En 1951, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Ŝanhi kaj aliaj lokoj elmetis la postulon levi la interhelpajn grupojn al pli alta nivelo, tio estas, prove starigi agrikulturajn kooperativojn. Tio ja estis granda revolucia agado. Tamen la ĉina Ĥruŝĉov en iu raporto malice faris jenan ferocan rimarkan noton post la dorso de Prezidanto Maŭ: "Post la agrara reformo, en la kamparo la spontaneaj fortoj de la kamparanoj kaj klasa distavoliĝo jam komencis sin manifesti en la ekonomia disvolviĝo. En la Partio jam troviĝas iuj kamaradoj, kiuj timas tiajn spontaneajn fortojn kaj klasan distavoliĝon kaj intencas ilin bari aŭ eviti. Ili revas atingi la celon bari aŭ eviti tian tendencon per la rimedo funkciigi laborajn interhelpajn grupojn kaj provizajn kaj disvendajn kooperativojn. Iuj jam elmetis tian opinion: Oni devas paŝpostpaŝe skui, malfortigi kaj eĉ nei la bazon de privata posedsistemo kaj altigi agrikulturajn produktajn interhelpajn organizaĵojn al la nivelo de agrikulturaj produktaj kooperativoj, kaj preni tion kiel novan faktoron por 'venki la spontanean faktoron de la kam-

En aŭgusto de 1958, fondiĝis la unua popola komunumo en Ĝaŭĝoŭ-gubernio, Hejlonggiang. Por ĉeesti la fondiĝan kunvenon komunumanoj ĝojplene alveturas de malproksimeco.



paranoj'. Tio estas erara, danĝera kaj utopia ideo de agrikultura socialismo."

Vidu, kiel malamegas la aktivecon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj iri la socialisman vojon la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, kiu strangolis agrikulturan kooperigon.

Tiu "rimarka noto" de la ĉina Ĥruŝĉov estas memkonfeso pri lia opono kontraŭ Prezidanto Maŭ, kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj de lia ekstrema malamo kontraŭ la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li eĉ aŭdacis kalumnii la socialisman linion de agrikultura kooperigo kiel "revon"; li eĉ aŭdacis kalumnii kiel "danĝeran utopion" la nove naskitan socialisman aferon disvolviĝintan en la aktuala vivo, rompintan la kapitalismajn fortojn. Ĉi tie lia kontraŭsocialisma, kontraŭrevolucia burĝara starpunkto jam estas plenplene malkaŝita! Ni eĉ povus aŭdi lian dentgrincadon pro malamo kontraŭ socialismo!

Vidinte tiun rimarkan noton, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kun ekstreme granda indigno donis firman refuton al tia absurdaĵo. Prezidanto Maŭ kreive disvolvis la ekstreme kompletan teorion de marksism-leninismo pri efektivigo de agrikultura kooperigo sub la proletara diktaturo kaj persone ellaboris la unuan rezolucion de la Centra Komitato de la Kompartio pri interhelpo kaj kooperado de agrikultura produktado kaj triumfe gvidis la movadon de agrikultura kooperigo antaŭen disvolviĝi. Bankrotis la intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov.

En 1953, post kiam la nacia ekonomio estis fundamente restarigita kaj la agrara reformo de la tuta lando fundamente plenumita, Prezidanto Maŭ elmetis la ĝeneralan linion kaj la ĝeneralajn taskojn de nia partio dum la transira periodo. Li montris: **Post la sukceso de la demokratia revolucio iuj restas ankoraŭ en siaj originalaj pozicioj. Ili ne komprenas la ŝanĝon de la revolucio en la karaktero kaj ankoraŭ daŭre entreprenas sian "novan demokration" kaj ne faras socialisman transformadon. Tio kaŭzos eraron de dekstra devio. Rilate agrikulturon, la socialisma vojo estas la sola vojo por agrikulturo de nia lando. Disvolvi la interhelpan kaj kooperan movadon kaj senĉese altigi la produktajn fortojn de agrikulturo estas la centro de la laboro de la Partio en la kamparo."**

Lumigate de la brila lumturo de la ĝenerala linio por la transira periodo, senprecedence altiĝis la socialisma entuziasmo de la vasta kamparanaro kaj rapide disvolviĝis elementaj agrikulturaj kooperativoj kun duonsocialisma naturo kiel printempaj bambuidoj post pluvo. Fronte al tia bonega situacio, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon kaj liaj kunuloj estis panik-frapitaj. Ili haste faris ordonon kaj bruadis pri "opono kontraŭ riskema antaŭeniro" por devigi la aliĝintajn al kooperativoj kamparanojn "retiriĝi el la kooperativoj kaj sin turni al interhelpaj grupoj". Pro tio, nombro da elementaj agrikulturaj kooperativoj ĵus establitaj estis strangolitaj.

En 1955, sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, estiĝis alttajdo de agrikultura kooperigo tra la tuta lando. Sed profitante la ŝancon, ke Prezidanto Maŭ forestis de Pekino, la ĉina Ĥruŝĉov ankoraŭfoje planis kriman aktivadon "kontraŭ riskema antaŭeniro". En majo de la sama jaro, en konspiro kun alia plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, li ellaboris la reakcian orientilon de "haltigo", "redukto" kaj "reĝustigo", kaj persone sankciis planon por grandnombre likvidi kooperativojn. Nur en iom pli ol du monatoj, pli ol ducent mil kooperativoj en la tuta lando estis forhakitaj.

Ĝis nun, la ĉina Ĥruŝĉov ankoraŭ obstine rifuzas konfesi sian krimon. Tamen, ĝin li povas neniel nei antaŭ la abundaj nerefuteblaj atestaĵoj. Ĉia sofismo fare de la ĉina Ĥruŝĉov povas nur pli plene malkaŝi lian nerebonigeblan reakcian vizaĝon de damnindaj krimoj.

Por serĉi "teorian" argumenton por sia opono kontraŭ la movado de agrikultura kooperigo, la ĉina Ĥruŝĉov elprenis la eluzitan armilon de la "teorio de produktaj fortoj" el la reviziisma rubejo de liaj gentpatroj Bernstein, Kaŭcki, Buĥarin kaj similaj. Li distrumpetis, ke "nur la ŝtatigo de industrio povas provizi al la kamparanoj grandan kvanton da maŝinoj, kaj nur tiam estos eblaj la ŝtatigo de tero kaj la kolektivigo de agrikulturo."



En novembro 1955, la 63-jara kamparano Li Liangtian kaj lia edzino en la vilaĝo de Hinĉeng, Tajjuan, Ŝanhi, ornamas sian bovon per ruĝa silkrubando por aliĝi al la kooperativo.

Lia tia "teorio" de "mekanikigo antaŭ kooperigo" jam antaŭlonge bankrotis hontinde en la movado de agrikultura socialisma transformado. Li neis la grandan revolucian rolon de la popolamasoj, la plej ĉefa kaj plej aktiva faktoro en la produktaj fortoj. Ĉe li, la granda stimula rolo ludata de la produktaj rilatoj kaj la superstrukturo al la produktaj fortoj ktp. estis komplete forĵetita ekster la mondon. Laŭ lia tia "teorio", en landoj kun malpli disvolviĝintaj produktaj fortoj, la proletaro kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nek havas la rajton nek devas ĝustatempe turni la demokratian revolucion en la socialisman revolucion post gajno de la venko de demokratia revolucio, sed nepre devas unue doni liberon al disvolvo de kapitalismo. Sen maŝinoj, ili nature devas esti ekspluatataj de la kapitalistoj kaj kulakoj.

Se oni vere agus laŭ lia "teorio", do certe estus ruinigita tiel la socialisma agrikultura kooperigo de nia lando kiel ankaŭ la socialisma industriigo.

Se oni vere agus laŭ lia "teorio", ĉu la afero de la socialisma revolucio ne estus ruinigita antaŭlonge? ĉu nia ŝtato de la proletara diktaturo ne fariĝus antaŭlonge ŝtato de la burĝara diktaturo?

Estas kristale klare, ke la tiel nomata "teorio" de "mekanikigo antaŭ kooperigo" estas nur preteksto uzita de la ĉina Ĥruŝĉov por oponi kontraŭ la agrikultura socialisma transformo kaj la socialisma revolucio. Lia krima celo ĝuste estas disvolvi kapitalismon en la kamparo de nia lando, permesi la bienulojn, kulakojn, kontraŭrevoluciulojn, malbonajn elementojn kaj dekstrulojn restariĝi kaj igi la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj esti ŝarĝbestoj de la bienuloj kaj kulakoj.

En la momento, kiam la agrikultura kooperiga movado alfrontis strangolon fare de la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la faman raporton *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* kaj poste skribis antaŭparolon kaj enkondukajn notojn al la libro *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo.* En tiuj ĉi geniaj, epokfaraj grandaj dokumentoj Prezidanto Maŭ science, sisteme kaj komplete solvis la problemon kiel konduki la socialisman transformadon de agrikulturo, ege riĉigis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj teorie kaj praktike ĝisfunde frakasis la furiozan atakon fare de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj kunuloj.

Prezidanto Maŭ alte laŭdis la socialisman iniciativon de la vastaj amasoj de kamparanoj kaj kun grandega entuziasmo prikantis: **"Nun en la kamparo tra la tuta lando, la socialisma faktoro kreskas ĉiutage kaj ĉiuhore. La vastaj amasoj de kamparanoj postulas organizadon de kooperativoj. El la amasoj ŝprucis grandnombro da saĝaj, kapablaj, justaj kaj aktivaj gvidantoj. Tio ja estas tre ĝojiga."**

Prezidanto Maŭ forte kondamnis la oportunismon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj similaj vane klopodi por bari la historian tajdon, kaj akre kaj trafe montris: Ili ĉiam **"pensas pri la interesoj de malmultaj personoj, starante ĉe la pozicio de burĝaro, kulakoj aŭ bonhavaj mezkamparanoj kun spontanea tendenco al kapitalismo."**

Prezidanto Maŭ profunde eksplikis la dialektikan rilaton inter agrikultura kolektivigo kaj socialisma industriigo kaj kritikis la absurdan "teorion" de "meĥanikigo antaŭ kooperigo" de la ĉina Ĥruŝĉov. Prezidanto Maŭ montris: **"... sub kondiĉoj en nia lando, devas esti unue kooperigo kaj poste la uzo de grandaj maŝinoj (en la kapitalismaj landoj oni kapitalismigas agrikulturon)." "Ni neniel devas rigardi industrion kaj agrikulturon, socialisman industriigon kaj la socialisman transformadon de agrikulturo kiel du aferojn, apartigeblajn kaj izoleblajn unu de la alia, kaj ni neniel devas emfazi unu flankon kaj neglekti la alian."**

La saĝa tezo de Prezidanto Maŭ solvis la gravan problemon kun universala signifo: En landoj kun subevoluinta industrio, post la venko de la demokratia revolucio gvidata de la proletaro, estas necese kaj eble ĝustatempe turni la demokratian revolucion en la socialisman, apoge sur la potenca proletara diktaturo efektivigi la socialisman transformadon de posedsistemo de produktaj rimedoj kaj akceli la impetan disvolviĝon de sociaj produktfortoj; sub la kondiĉo, ke industrio ankoraŭ ne povas provizi grandnombron da agrikulturaj meĥanikaĵoj, estas eble kaj necese mobilizi la socialisman entuziasmon de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, unue efektivigi la socialisman kolektivigon de agrikulturo kaj disvolvi agrikulturan produktadon, kaj per tio malfermi vastan vojon por la socialisma industriigo kaj agrikultura meĥanikigo.

La herezo de oportunismo estis faligita kaj la sana spirito de socialismo leviĝis. Sub la direkto de la brila teorio de Prezidanto Maŭ, kelkdek milionoj da familioj de kamparanoj ekagis. La muĝantaj ondoj de la granda socialisma revolucio de kelkcent milionoj da kamparanoj rapide frakasis kaj forbalais la reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov kun la plenmano da diabloj kaj monstroj. Ilia dekstra oportunisma fizionomio estas klare spegulita en la ondegoj. La granda amasa movado de la agrikultura kooperigo kun senprecedence furioza rapideco disvolviĝis antaŭen. Nur pasis iom pli ol unu jaro post la dua duono de 1955, en la tuta lando jam antaŭdate efektiviĝis la agrikultura kooperigo kaj estis fundamente plenumita la socialisma transformado de agrikulturo. En la batalo inter la du linioj, la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ gajnis ekstreme grandan venkon.

LA ĈINA ĤRUŜĈOV ESTAS LA ĈEFA RADIKO DE LA NIGRA VENTO DE "TRI PLIIGOJ KAJ UNU FIKSO"

Post kiam la socialisma transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj estas fundamente plenumita, la sociaj produktaj fortoj de nia lando havis grandegan disvolviĝon. En 1958, sub la brila lumigo de la ĝenerala linio de la Partio por socialisma konstruado persone ellaborita de Prezidanto Maŭ, aperis en la nacia ekonomio la situacio de arda kaj vigla antaŭensaltego, kaj en la vasta kamparo de nia lando ŝprucis tute nova formo de socia organizo—la popola komunumo. La efektiviĝo de popolkomunumigo ebligis la agrikulturan kolektivigon antaŭenimpeti al nova stadio kaj rapidigis la pereon de la kapitalismaj fortoj en la kamparo.

Tamen la klasaj malamikoj ne volontas akcepti sian malvenkon. Ili dentgrincige malamegas la novan venkon de socialismo en la kamparo kaj eĉ en sonĝo revas restarigi kapitalismon.

Ĝuste en la tempo, kiam nian nacian ekonomion trafis portempaj malfaciloj kaŭzitaj de la subfosado de la renegata Ĥruŝĉov-kliko kaj naturaj katastrofoj dum tri sinsekvaj jaroj, kiam imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj levis grandan kontraŭĉinian ĥoron, la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov ĉe la kapo pensis, ke venas tempo por fari "renverson", tial ili direktis siajn lakeojn grandajn kaj malgrandajn por lanĉi ĉiuflankan frenezan atakon kontraŭ socialismo sur la politika, ekonomia, ideologia, kultura kaj aliaj frontoj.

La enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon senskrupule atakis la popolajn komunumojn dirante, ke "la kamparanoj gajnis neniajn profitojn el la kolektiva ekonomio dum la lastaj jaroj." Rezulte de lia demagogio, en la kamparo de nia lando ekblovis la nigra vento de "tri pliigoj kaj unu fikso" (t. e., pliigo de liberaj merkatoj, pliigo

de terpecoj por privata uzo, pliigo de etaj entreprenoj memrespondecaj pri propraj profitoj aŭ perdoj kaj fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado). Tio estas granda manifesto de lia vana klopodo por disintegri la popolajn komunumojn kaj efektivigi kapitalisman restaŭron.

Li eĉ senkaŝe kriaĉis: "Oni ne devas timi la senbridan inundon de kapitalismo", "la liberaj merkatoj devas esti daŭre entreprenataj", kaj "oni devas regresigi en sufiĉa grado tiel industrion kiel ankaŭ agrikulturon, inkluzive de la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado kaj permeso al individua mastrumado!"

Pri tiu punkto, alia plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon esprimis des pli figure. Li diris: "Individua mastrumado estas permesata, se nur tio povas pliigi produktadon. Ĉiuj katoj, ĉu blankaj ĉu nigraj, estas bonaj, se nur ili kaptas musojn."

Tiuj du plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ankaŭ ĉien sendis siajn konfidatojn kaj lakeojn por "enketi" la tiel nomatajn "spertojn" de "fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado", vane klopodante por kolekti "obusojn" por ataki la proletaran revolucian linion de nia granda instruanto Prezidanto Maŭ.

Sub la preteksto "pliigi produktadon", efektive disintegri la kolektivan ekonomion de socialismo, restarigi individuan mastrumadon, lasi kapitalismon senbride inundi en la kamparo — jen estas la reakcia esenco de la "tri pliigoj kaj unu fikso" elmetita de ili.

Kiel aroganta kaj fiera aspektis la ĉina Ĥruŝĉov siatempe, kiam li donadis "instrukciojn" kaj faradis "raportojn" por antaŭenpuŝi la "tri pliigojn kaj unu fikson"! Sed nun tiu "granda persono", kiu "memkulturis" perfekte, eĉ senhonte malkonfesis pretendante, ke li "ne atakis" la popolan komunumon dum la tri jaroj de portempaj malfaciloj.

La faktoj restas nerefuteblaj, sed li ankoraŭ volas nei. Kiel senhontege!

La "tri pliigoj kaj unu fikso" distrumpetita de la ĉina Ĥruŝĉov flatis la bezonojn de la kapitalismaj fortoj en la kamparo, kuraĝigis la spontanean kapitalisman tendencon de la bonhavaj kamparanoj kaj lumigis la verdan signalon por spekulaciistoj kaj novemerĝintaj burĝaraj elementoj. En tiuj nemultaj lokoj, kie laŭ la nigra instrukcio de la ĉina Ĥruŝĉov, "fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado" estis perforte efektivigita, aperis ĉiuj specoj de elpensaĵoj por kapitalisma restaŭro, kiaj "respondecaj terpecoj", "la asignado de tero al la individuaj familioj" kaj "la respondeca sistemo de produkta kvoto" kaj aliaj. Tio serioze influis kaj malfortigis la kolektivan ekonomion.

Dum certa tempo, en kiu blovis la nigra vento de "tri pliigoj kaj unu fikso", la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj kovataj de la ĉina Ĥruŝĉov vere ekstazis opiniante, ke en malespero, fine estas trovita bela rimedo por kapitalisma restaŭro. Memkontente balancante siajn kapojn, ili diris: "Montmuroj, ŝajne fino de la vojo kaj l' rivero; sed salikombroj, brilaj floroj, jen plu vilaĝ-belo."

Ĉio ĉi tio plene montris, ke la "tri pliigoj kaj unu fikso" distrumpetita plenenergie de la ĉina Ĥruŝĉov estas nigra vento de kunigado de kapitalismaj fortoj de la urboj kaj la kamparo por fari frenezan atakon kontraŭ la socialisma pozicio en la kamparo. Tio celas detrui la kolektivan ekonomion de la popolaj komunumoj, subfosi la socialisman bazon kaj turni la ruĝan Ĉinion en nigran. Tio estas granda penado de kapitalisma restaŭro por fari preparon por ilia uzurpo de la Partio kaj la ŝtatpotenco.

Tio ne estas sola sed havas bonan prototipon. Kio distrumpetita de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas neniom malsama ol tio farita de Ĥruŝĉov kaj liaj heredantoj Breĵnev, Kosigin kaj similaj en la sovetunia kamparo.

La ĉefoj de la renegata kliko de la sovetunia reviziismo senbride praktikas la "principon de libera vendo de produktaĵoj" kaj malpermesis per ordono la "administran ĝustigon" de merkataj prezoj. Ili deklaris: "La nivelo de



La reprezentantoj de aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la ĉina mararmeo kunvenas por kondamni la krimojn de strangolado de la agrokultura kooperigo faritajn de la ĉina Ĥruŝĉov.

profitgajno devas esti la bazo por la objektiva takso de la funkciado de la kolĥozoj kaj ŝtataj kultivejoj." Ili foje kaj refoje malstreĉis la limigojn de "terpecoj por privata uzo", instigante private dividi publikan teron. Ili asignis terpecojn al grupoj kaj familioj en granda skalo, senkaŝe fiksis "leĝe" la ŝtatigitajn terojn al la grupoj por longtempe kulturi, kaj unu familio, kiu havas pli ol du aŭ tri laborkapablajn homojn, povas formi tian grupon.

Ĝuste sub la regado de tia kontraŭrevolucia reviziisma linio, en la sovetunia kamparo, la individua ekonomio senbride inundas, la socialisma ekonomio tute kolapsis kaj socia distavoliĝo pliintensiĝas tagon post tago, la riĉuloj fariĝas pli riĉaj dum la malriĉuloj pli malriĉaj, kaj kapitalismo jam ĉiuflanke restaŭriĝis.

Pripensu, kamaradoj, kia bildo aperus en nia kamparo, se efektiviĝus la intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov!

GRANDA LUKTO ĈIRKAŬ LA SOCIALISMA EDUKA MOVADO

En aŭtuno de 1962, ĝuste ĉe la kriza momento kiam la kapitalismaj fortoj reprezentataj de la ĉina Ĥruŝĉov lanĉis furiozan atakon kontraŭ socialismo, Prezidanto Maŭ persone kunvokis kaj prezidis la Dekan Plenan Sesion de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kun granda historia signifo. Prezidanto Maŭ akre kritikis kaj refutis la dekstran oportunisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov kaj haltigis la de li incititan nigran venton de kapitalisma restaŭro.

Ĉe tiu sesio, Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon al la tuta partio kaj la tuta popolo **"neniam forgesu klasan batalon"** kaj elmetis la grandan taskon **"nepre konduku socialisman edukadon"**, klarionante ĉiuflankan rebaton de la proletaro kontraŭ la burĝaro. Simile al subita tondro, ĝi konsternis ĉiujn monstrojn kaj demonojn.



Kamarado Vu Ĉen, antaŭa sekretario de la partia filio de Taŭjuan-a brigado, kiu estis elpelita el la Partio kaj etikedita kiel malbona elemento de Vang x x dum la movado de socialisma edukado, nun estas rehonorigita de la revoluciaj amasoj en la granda proletara kultura revolucio. Kune kun sia filino li studas vortojn de Prezidanto Maŭ.

La socialisma eduka movado en la kamparo disvolvita laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ estas revolucio sur la politika kaj ideologia frontoj, estas pli profunda disvolviĝo de la socialisma revolucio en la kamparo sub novaj historiaj kondiĉoj. Ĉirkaŭ tiu ĉi granda revolucia amasa movado ankoraŭ disvolviĝis intensa lukto inter la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov.

La proletara revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ koncentre esprimiĝis en du grandaj marksism-leninismaj dokumentoj ellaboritaj sub persona prezido de Prezidanto Maŭ. Ili estas: *La Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri Kelkaj Problemoj en Nuna Kampara Laboro* (t. e., la Dekpunkta Decido) kaj *Pri Kelkaj Problemoj Nun Elmetitaj en la Socialisma Eduka Movado en la Kamparo* (t. e., 23-punkta Decido).

Laŭ tiu ĉi linio de Prezidanto Maŭ, oni devas **"ekpreni la klasan batalon kiel la ĉefĉeneron, ekpreni la batalon inter la vojo de socialismo kaj tiu de kapitalismo kiel la ĉefĉeneron", por solvi "la kontraŭdiron inter socialismo kaj kapitalismo".**

Laŭ tiu ĉi linio de Prezidanto Maŭ, oni devas **"sin apogi sur la laborista klaso, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la revoluciaj kadroj, la revoluciaj intelektuloj kaj aliaj revoluciuloj, kaj doni atenton al la unuigo de pli ol 95% el la amasoj kaj pli ol 95% el la kadroj", "por fari akran pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la kapitalismaj kaj feŭdaj fortoj, kiuj nin furioze atakas."**

Laŭ tiu ĉi linio de Prezidanto Maŭ, **"La gravita punkto en ĉifoja movado estas batalo kontraŭ tiuj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon." "El tiuj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, iuj agas sur la scenejo dum aliaj post la kulisoj." Tiuj, kiuj subtenas tiujn potenctenantojn, "el la pli altaj niveloj estas kontraŭsocialismaj elementoj laborantaj en la organizoj de la popolkomunumoj,**

distriktoj, gubernioj aŭ subprovincaj regionoj, kaj eĉ en la provincaj kaj centraj departementoj."

Tiu ĉi marksism-leninisma linio pikis la doloran punkton al la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estrataj de la ĉina Ĥruŝĉov kaj rompis ilian belan sonĝon pri kapitalisma restaŭro. Trovante la situacion malfavora, ili sin turnis al kontraŭrevolucia duvizaĝa artifiko kaj transpreninte la sloganon de la socialisma eduka movado elĵetis burĝaran reakcian linion "maldekstran" en formo sed dekstran en esenco.

Tiu kiu la unua elsaltis estis alia plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Tiu ĉi kanajlo ĉiam koluziis kun la ĉina Ĥruŝĉov en oponado kontraŭ la socialisma revolucio en la kamparo. De grandnombra forhakado de kooperativoj li prenis sian parton kaj de distrumpetado pri la "tri pliigoj kaj unu fikso" prenis sian parton ankaŭ li. Kaj en tiu ĉi fojo elsaltis denove li. Nur ĉirkaŭ kvar monatojn post la publikigo de la "Dekpunkta Decido" de la granda socialisma eduka movado li jam kun senpacienco haste elbakis la "Duan Dekpunktan Decidon" (projekto) rekte oponantan kontraŭ la "Dekpunkta Decido".

Ludante la kontraŭrevolucian artifikon forigi brullignon el sub la kaldrono, la "Dua Dekpunkta Decido" (projekto) forstrekis la fundamentan enhavon de la batalo inter la du klasoj kaj inter la du vojoj, kaj komplete flankenĵetis la linion, orientilon kaj politikojn rilate al la socialisma eduka movado eksplicite formulitajn de Prezidanto Maŭ en la "Dekpunkta Decido". Sub la ŝildo fari klaran "limigon en efektivigo de konkretaj politikoj", ĝi ĉiamaniere absolvis la kapitalismajn fortojn en la kamparo, ligis la manojn kaj piedojn de la vastaj amasoj kaj plenforte patronis la agentojn de la burĝaro interne de la Partio. Kun la preteksto "konduki socialisman edukon", li direktis la lancpinton de batalo kontraŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Elĵetante tiun monstran venenan herbegon, la alia plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon vane provis apliki la burĝaran reakcian linion por estingi la furiozan revolucian flamon de la socialisma eduka movado kiun Prezidanto Maŭ persone bruligis. Tio estas unu el liaj inferaj krimoj oponi socialismon kaj restaŭri kapitalismon.

Tuj poste, la ĉina Ĥruŝĉov aranĝis por sia edzino Vang X iri malsupren kaj "labori ĉe elektita punkto" kaj tie elfabrikis la famaĉan "sperton de la Taŭjuan-a produktbrigado". Poste li senhonte reklamis tiun ĉi "sperton" kaj mem ĝin kolportis kaj fanfaronis tra la tuta lando. Farinte poluradon al la "Dua Dekpunkta Decido" (projekto) surbaze de tiu "sperto" li eĉ produktis "reviziitan projekton". Tio estas reprezenta verkaĵo de la burĝara reakcia linio, "maldekstra" en formo sed dekstra en esenco, estas reakcia programo por oponi kontraŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Ke la ĉina Ĥruŝĉov elĵetis tiun ĉi burĝaran reakcian linion "maldekstran" en formo sed dekstran en esenco, intrigis ĝuste por uzurpi la gvidantecon de la socialisma eduka movado kaj tiel deviigi tiun ĉi grandan revolucian movadon sur eraran vojon. Tio estas granda konspiro de la ĉina Ĥruŝĉov por kruele subpremi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj kapti potencon el la manoj de la proletaro. Dum iu periodo, en certaj lokoj sub lia kontrolo, nemalmulte da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis kondamnitaj kiel "kontraŭrevoluciuloj" kaj senigitaj je la potenco sub la venena influo de tiu ĉi linio "maldekstra" en formo sed dekstra en esenco. Serioza damaĝo pro tio estis farita al la granda frukto de la socialisma eduka movado kondukita sub la gvido de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La ĉina Ĥruŝĉov plenforte klopodis por eviti la plej fundamentan problemon de la kontraŭdiro inter socialismo kaj kapitalismo, multe parolante, ke la esenco de la socialisma eduka movado estas "kontraŭdiro inter kvar purecoj kaj kvar malpurecoj koncerne politikon, ekonomion, organizon kaj ideologion", kaj "la interplektiĝo de la kontraŭdiroj interne kaj ekstere de la Partio, aŭ la interplektiĝo de la kontraŭdiroj inter la malamikoj kaj ni mem unuflanke kaj la kontraŭdiroj interne de la popolo aliflanke", kaj tiel plu. En ludado de tia "okulvuala artifiko", la ĉina Ĥruŝĉov vane provis unue fari la revolucian popolon

forgesi la klasan batalon de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj la proletaran diktaturon, kaj due direkti la lancpinton kontraŭ la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kontraŭ la granda nombro da bonaj kaj kompare bonaj kadroj kaj tiamaniere patroni la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon for de malkaŝado. Tio estas ekstreme malica intrigo.

La ĉina Ĥruŝĉov ekstreme timis, ke la vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj estas vere mobilizitaj kaj posedas la proletaran revolucan linion de Prezidanto Maŭ kaj la orientilon kaj politikojn de la Partio, kaj sekve malkaŝos liajn lakeojn. Tial, li sin turnis al kuomintanga metodo de "politika kuratoreco" por subpremi la amasojn, bati la revoluciajn kadrojn kaj malvigligi la movadon, intencante krampi la kovrilon de klasa batalo kaj fari la socialisman edukan movadon "nura ŝajnigo".

La agadoj de la ĉina Ĥruŝĉov kaj lia bando, ĉu neado de la batalo inter la du vojoj, ĉu subpremado de la amasoj, ĉu bato al la revoluciaj kadroj, en la fina analizo, ĉio ĉi tio celis ŝlimigi la akvon, konfuzi la klasan fronton, turni flanken la celtabulon de la batalo kaj ataki la multajn por ŝirmi la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon inkluzive ilin mem.

La "maldekstra" en formo sed dekstra en esenco burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov estis linio por konduki la socialisman edukan movadon sur la orbiton de kapitalisma restaŭro, linio por disintegri la proletaran diktaturon kaj turni ĝin en la burĝaran.

Tuj kiam tiu linio estis elmetita, ĝi renkontis bojkoton kaj oponon de la vastaj revoluciaj amasoj kaj kadroj. La publiko de la "23-punkta Decido", la dokumento kun granda historia signifo persone ellaborita de Prezidanto Maŭ, proklamis la bankroton de tiu ĉi burĝara reakcia linio. Direktate de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la socialisma eduka movado rikoltis grandan sukceson. La kapitalismaj fortoj en la kamparo suferis pezan baton. La popolaj komunumoj estis pluapaŝe firmigitaj kaj la pozicio de socialismo en la kamparo estis pluapaŝe fortigita. Kaj la sekvanta granda proletara kultura revolucio puŝis antaŭen la socialisman revolucian movadon en la kamparo al tute nova etapo.

KUN "BATALO KONTRAŬ EGOISMO KAJ KRITIKO AL REVIZIISMO" KIEL ĈEFĈENERO, KONDUKI ĜISFINE LA BATALON INTER LA DU VOJOJ EN LA KAMPARO

Strikte sekvante la grandan direktiliston Prezidanton Maŭ, la kvincent milionoj da kamparanoj de nia lando trapasis dekokjaran brilan batalan historion laŭ la socialisma vojo, ĉirkaŭirinte rifojn kaj danĝerajn malprofundejojn, venkinte diablajn ventojn kaj densajn nebulojn.

La historio de la batalo inter la du vojoj kaj inter la du linioj en la kamparo dum la pasintaj 18 jaroj donis al ni ekstreme riĉajn spertojn. Inter ili la plej gravaj estas:

Unue: "Socialisma socio estas sufiĉe longa historia etapo. En tiu ĉi historia etapo de socialismo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo, ekzistas la batalo inter la du vojoj — socialisma kaj kapitalisma, kaj ekzistas la danĝero de kapitalisma restaŭro." En la kamparo, la klasa batalo ĉiam estas tre komplika, tre akra kaj tre intensa en ĉiu historia turniĝa momento pro tio, ke la renversitaj bienuloj kaj kulakoj ne volontas esti pereigitaj kaj ĉiam klopodas por restaŭriĝi, pro tio, ke en la socio ankoraŭ ekzistas la influo de la burĝaro kaj la kutimaj fortoj de la malnova socio, kaj pro tio, ke ekzistas spontanea kapitalisma tendenco de etproduktantoj. La batalo inter la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la burĝara reakcia linio de la ĉina Ĥruŝĉov rilate al la problemo pri la socialisma revolucio en la kamparo ĝuste estas la koncentrita respegulo de tiu batalo en la Partio. Por persisti sur la socialisma vojo la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la revoluciaj kadroj devas ĝisfunde konduki la batalon inter la du linioj en la Partio, devas ĝisfunde kritiki la burĝaran reakcian linion de la ĉina Ĥruŝĉov kaj likvidi ĝian venenan influon.

Due: La fundamenta problemo de revolucio estas tiu pri ŝtatpotenco. La batalo inter la du vojoj kaj inter la du linioj, analizite ĝis la fino, estas batalo inter firmigo de la proletara diktaturo kaj renverso de la proletara diktaturo. Sub la nova historia kondiĉo de la proletara diktaturo, por atingi sian kriman celon renversi la proletaran diktaturon, la klasaj malamikoj alprenas diversajn molajn kaj malmolajn taktikojn kiaj korupto kaj senmoraligo, dispartigo kaj disintegrado kaj eltirado de niaj kadroj kaj enŝteliĝo por trovi siajn agentojn interne de la Partio. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas la plej ĉefaj kaj plej danĝeraj malamikoj de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La ĉina Ĥruŝĉov estas ilia ĉefa postkulisa mastro. Ke li obstine praktikis la burĝaran reakcian linion en la kamparo, estas la ekstreme grava konsistiga parto de lia kontraŭrevolucia konspiro por efektivigi en Ĉinio la kapitalisman restaŭron kaj turni la proletaran diktaturon en la burĝaran. Se ni lasus la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon uzurpi la ŝtatpotencon, ni do irus returne al refoja mizero.

Trie: Post la efektivigo de la agrikultura kooperigo ankoraŭ ne finiĝas la socialisma revolucio sur la ekonomia fronto. La batalo inter la firmigo de la socialisma kolektiva posedsistemo kaj la subfosado de la socialisma kolektiva posedsistemo restas tre elstara problemo. Energia entreprenado de la "tri pliigoj kaj unu fikso" estas unu el la gravaj rimedoj de la klasaj malamikoj por korupti kaj disintegri la socialisman kolektivan posedsistemon. La proletaro, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj devas uzi la potencajn fortojn de la proletara diktaturo por firmigi kaj disvolvi la socialisman kolektivan posedsistemon kaj iri la vojon de komuna riĉeco.

Kvare: La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas la socia bazo en la kamparo por konstrui socialismon, estas la apoga forto por praktiki la proletaran diktaturon en la kamparo. Por praktiki la kapitalisman restaŭron en la kamparo la ĉina Ĥruŝĉov ĉiam persistas en la burĝara klaslinio, sinapogante sur la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj por bati la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Agante kontraŭ li, ni devas persisti en la proletara klaslinio de sinapogo sur la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj unuiĝo kun la mezkamparanoj dum la tuta historia periodo de socialismo, por ke la regpotenca sigelilo estu firme tenata en la manoj de tiuj kiuj persistas ĉe la socialisma vojo.

Kvine: "Serioza problemo estas la edukado de la kamparanoj." "La fundamenta tasko de la politika laboro" de la Partio en la kamparo "estas senĉese inokuli al la kamparanaj amasoj la socialisman ideon kaj kritiki la kapitalisman tendencon". La ĉina Ĥruŝĉov tamen ĝismorte batis la socialisman aktivecon de la kamparanoj, energie praktikis politikon de materia stimulado, plenforte tentis kaj utiligis la spontanean kapitalisman tendencon por servi al la kapitalisma restaŭro. Tio estas serioza batalo por kapti la ideologian gvidantecon super la kamparanoj. La vastaj amasoj de la kamparanoj kaj la revoluciaj kadroj nepre devas elstarigi la proletaran politikon, persisti ĉe komandado per la penso de Maŭ Zedong kaj, samtempe kun la forta kritikado de la reviziismo de la ĉina Ĥruŝĉov, forte lukti kontraŭ burĝara egoismo kaj paŝopostpaŝe elfosi la reviziisman radikon.

De 18 jaroj, obstine persistante ĉe la burĝara reakcia starpunkto, la ĉina Ĥruŝĉov prenis la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel malamikojn, subfosis, malsukcesis, denove subfosis, denove malsukcesis kaj fine trafis kompletan pereon en ĉifoja granda proletara kultura revolucio. Ankaŭ lia burĝara reakcia linio rezistanta kontraŭ la socialisma revolucio en la kamparo estas forbalaata en la historian rubejon.

Nepre konduku ĝisfine la batalon inter la du vojoj kaj inter la du linioj en la kamparo. La granda proletara kultura revolucio en la vasta kamparo estu nepre kondukata ĝisfine laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

Alte flirtu, eterne flirtu la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong super la kamparo de la patrolando!



Speciala montrejo de dazibaŭoj por la amasa kritiko starigita de Liuĝuang-brigado de Kilijing-komunumo en Hinhiang, Henan-provinco

La Revolucia Amasa Kritiko en la Kamparo de Ĉinio

NIA RAPORTISTO

SUR nia vasta lando, de Hejlonggiang ĝis Hajnan-insulo, de la orienta marbordo ĝis Kinghaj-Tibeta Altebenejo, centmilionoj da malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj nun levas grandiozan movadon de revolucia amasa kritiko por pli profunde kritiki la kontraŭrevolucian reviziismon linion de la ĉina Ĥruŝĉov en la kamparo. Prenante la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel ideologian batalilon, lige kun la realo de siaj lokoj, ili faris ĝisfundan kritikadon kontraŭ serio da kontraŭrevoluciaj kaj absurdaj tezoj distrumpetitaj de la ĉina Ĥruŝĉov kiaj "estingiĝo de klasbatalo", "ekspluato estas merito", "disvolvo de kulaka ekonomio", "kvar liberoj"*, "tri pliigoj kaj unu fikso"*, "Taŭjuan-sperto"* k. a. Tiu granda amasa kritiko envolvanta la tutlandan kamparon ne nur multe plialtigis la klasan konscion de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsupraj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj, sed ankaŭ alportis bonegan situacion al nia kamparo, pluapaŝe plifortigis la proletaran diktaturon kaj firmigis la socialisman kolektivan ekonomion.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tutlande konata Daĝaj-brigado plej aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ. Ili faris pintkontraŭ-pintan batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la ĉina Ĥruŝĉov kaj akiris serion da venkoj. Gia Gincaj, ĝia brigadestro, diris ke la ĉina Ĥruŝĉov ĉiam freneze oponis nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj lian revolucian linion, kun aroganta celo restarigi kapitalismon. Liaj krimoj amasiĝis kiel granda monto. La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de nia brigado profunde komprenas, ke **"nur socialismo povas savi Ĉinion"**. Ni ĉiam antaŭenmarŝos triumfe laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Ŝaŭŝan-a Popola Komunumo en Hunan, la hejmloko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, forte riproĉis la ĉinan Ĥruŝĉov en la amasa kritiko pri lia ĝisĉiela krimo de restarigo de kapitalismo en la kamparo. Zuo Guangfu, malriĉkamparano de Ŝaŭŝan-brigado, diris: Post la Liberiĝo, du vojoj kuŝas antaŭ ni, unu estas socialisma vojo de kolektivigo montrita de Prezidanto Maŭ, la alia — kapitalisma vojo de disvolvo de kulaka ekonomio distrumpetita de la ĉina Ĥruŝĉov. La unua estas vojo luma, kaj la dua — kapitalisma vojo senelira. En la tempo tuj post la Liberiĝo, kvankam ni ricevis teron, tamen la kamparanaro denove dividiĝis en du ekstremajn tavolojn pro tio, ke la individua mastrumo ne povis elteni katastrofojn. Iuj malriĉkamparanoj devigite vendis la ricevitan teron, kelkaj eĉ siajn infanojn. Prezidanto Maŭ plej zorgas pri ni kaj alvokis nin iri vojon de kolektivigo. Tiel, ni starigis interhelpajn grupojn kaj poste kooperativojn, kaj la agrikultura produkto ĉiam leviĝis paŝo post paŝo. Sed, la ĉina Ĥruŝĉov malpermesis al ni fari interhelpon kaj kooperadon, kriante ke "la nuna ekspluato savas homojn kaj estas laŭleĝa". Ni volas demandi: Homojn de kiu klaso vi savas? Leĝon de kiu klaso vi aludas?

En la libro *Socialisma Alta Tajdo en la Kamparo de Ĉinio*, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ rekomendis Hongki-brigadon de Giantukiaŭ-komunumo, Kiongŝan-gubernio, Hajnan-insulo. La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de tiu produkta brigado rememoris en la amasa kritiko la batalon inter la du vojoj en sia brigado. Ili diris: Kiam la ĉina Ĥruŝĉov elsaltis por senbride distrumpeti pri "tri pliigoj kaj unu fikso", al tio respondis aktive plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj ĉiuspecaj demonoj. Ili malice intencis malorganizi nian Hongki-brigadon, dividi kaj formanĝi la kolektivan havaĵon. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unuiĝis unuanime, kuntordis nin en fortan ŝnuregon, kaj firme repuŝis tiun diablan venton de kapitalismo. Ĉiu venko de nia brigado estas la venko de la teorio de Prezidanto Maŭ pri klasoj kaj klasbatalo. Ni nepre tenos firme en nia kapo la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ por neniam forgesi klasbatalon.

Vu Ĉen, antaŭa sekretario de la partia filio de Taŭjuan-brigado, Luvangĝuang-komunumo, siatempe suferis kruelan persekuton de la reakcia burĝara linio de la ĉina Ĥruŝĉov. En kritika kunveno, li forte riproĉis la ĝisĉielajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov pri lia malica intenco kontraŭstari la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ per sia reakcia burĝara linio, restarigi kapitalismon kaj igi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn retroiri kaj retrasperti

Diversnaciecaj membroj de iu brigado en Huišuj, Gujĝoŭ-provinco, kunvenas por kritiki la Ĥruŝĉov de Ĉinio pri liaj krimoj de restaŭro de kapitalismo en la kamparo.




la malnovan amaraĵon. Li certigis: Ni absolute ne permesos al la ĉina Ĥruŝĉov realigi sian intencon, ni nepre tenos pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj, kun **"batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko de reviziismo"** kiel ĉefĉenero, kondukos la grandan proletaran kulturan revolucion en la kamparo ĝis la fino!

La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Ĝuantang-komunumo de Hangĝoŭ indigne akuzis la krimon de la ĉina Ĥruŝĉov, kiu grandkvante forhakis agrikulturajn kooperativojn. Ili diris, ke flirtigante la nigran flagon de "opono kontraŭ trorapideco", la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj siatempe forhakis unufoje 37 el la 47 kooperativoj en ilia loko. Tiun konton ni nepre likvidos kun ili! Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rapide starigis altgradajn kooperativojn. Tiamaniere, la kooperigo realiĝis en mallonga tempo. La socialisman vojegon ni iras definitive! Se iu kuraĝis nin malhelpi, ni batalos kontraŭ li ĝis la fino!

La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de la provinco Anhuj indigne akuzis la ĝisĉielajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj pri perforta praktikado de la sistemoj de "prirespondaj kampoj"* kaj "fikso de produkta kvoto ĝis familioj". Ili diris, ke jam estus aperinta granda historia regreso en la kamparo de nia provinco, se nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ siatempe ne estus reĝustiginta la navigan direkton. Ni devas komplete frakasi la reviziisman nigran varon de la ĉina Ĥruŝĉov, per la potenca penso de Maŭ Zedong, disvolvante la spiriton solide bati plue la hundon faligitan en akvon.

La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj, lige kun la amasa kritiko kaj sia persona spertaĵo, serioze studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ pri la socialisma revolucio en kamparo kaj la artikolon *La Batalo inter la Du Vojoj en la Kamparo de Ĉinio* publikigitan en la lasta tagdeko de novembro 1967. Post la studo ili pli varme amas la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj pli malamas la kontraŭrevolucian reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov. Ili prave diris: La socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ estas la unika luma vojo por liberiĝo, suprenturniĝo kaj feliĉo por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La vojo distrumpetita de la ĉina Ĥruŝĉov estas vojo, kondukanta al dividiĝo de la kamparanoj en du ekstremajn tavolojn, al enpotenciĝo de la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj, al denova suferado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj al restaŭro de feŭdismo kaj kapitalismo. Se ni ne plene ŝtopas la nigran vojon de la ĉina Ĥruŝĉov, ni devas denove fariĝi jardungitoj, alpreni almozulan bastonon aŭ kulturi farmitajn kampojn, kaj nia granda patrolando ŝanĝos sian koloron. Cent-milionoj da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tra la tuta lando plej firme esprimas, ke sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ili nepre kondukos la batalon inter la du vojoj kaj du linioj kaj la grandan proletaran kulturan revolucion en la kamparo ĝis la fino!

* *Vidu "Enciklopedieton" p.71.*



La membroj de Hiaŭlan-komunumo de Gianghi-provinco kritikas la Ĥruŝĉov de Ĉinio por forigi la venenajn influojn de lia reakcia linio en tiu komunumo.

VANG GUOFAN:

Ni Sekvas Prezidanton Maŭ sur la Vojo de Socialismo

LA publikigo de la grava artikolo *La Batalo inter la Du Vojoj en la Ĉina Kamparo* komplete malkovris la abomenindan vizaĝon de la ĉina Ĥruŝĉov, kiu obstine persistis ĉe la reakcia burĝara starpunkto kaj intrigis por restarigo de kapitalismo, kaj plue montris al ni la direkton de batalo. Bonega estas tiu artikolo! Ĝi eldiras kion ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj volas diri.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"De miloj da jaroj nur individua ekonomio estas praktikata ĉe la kamparanaj amasoj kaj ĉiu familio formas produktan unuon. Ĝuste tia disa individua produktado estas la ekonomia bazo de la feŭdisma regado kaj dronigas la kamparanojn mem en ĉiaman mizerecon. La sola rimedo por ŝanĝi tiun staton estas paŝopostpaŝa kolektivigo; kaj la sola vojo, kiu kondukas al kolektivigo, laŭ Lenin, iras tra kooperativoj."** Firme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ, frue en 1951 ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hipu-brigado de Gianming-komunumo en Zunhua-gubernio jam organizis 11 interhelpajn grupojn, tiel ke la agrikultura produkto ricevis unuan antaŭenpuŝon, kaj la pomua produktkvanto de greno leviĝis de pli ol 70 ĝinoj ĝis pli ol 200 ĝinoj. Tamen, la interhelpaj grupoj estis fonditaj sur la bazo de privata posedsistemo, tial ili ankoraŭ ne povis malhelpi la distavoliĝon en riĉan kaj malriĉan. Ĉu resti ĉe la interhelpaj grupoj kaj rigardi senfare la distavoliĝon, aŭ levi la interhelpajn grupojn por transformi ilin en agrikulturajn produktajn kooperativojn laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ? Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj iris la vojon de kooperigo. Tuj en la vintro de 1952, niaj 23 malriĉkamparanaj familioj starigis la unuan agrikulturan produktan kooperativon en nia vilaĝo. Tio elvokis la maltrankvilon kaj insulton de klasaj malamikoj. La bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj fiuloj aŭ mokis nin vizaĝe al vizaĝe aŭ kalumniis post nia dorso por semi malakordojn kaj provis per ĉiuj rimedoj subfosi nian novan kooperativon. Ili asertis, ke ni starigis "malriĉulan kooperativon", kaj ke "nun

Vang Guofan estas vizitata de la revoluciaj junuloj.



kuniĝis la ĉefaj ricevantoj de ŝtata helpgreno kaj pli aŭ malpli frue disiĝos pro malriĉeco". Unuj kantas, aliaj akompanas; la ĉina Ĥruŝĉov kaj tiuj fiuloj ĥore kalumniis, interrespondante unu al aliaj de supre kaj malsupre, la socialisman novnaskitaĵon, kiu disvolviĝis trarompante kapitalisman forton, kiel ion "danĝeran" kaj "utopian". Ĉu ne estas tute klare, por kiu klaso li proparolis?

Sed, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, staris firme kontraŭ la atako de la klasaj malamikoj. Malgraŭ la malhelpo de la ĉina Ĥruŝĉov, ni venkis vicon da malfaciloj kaj persistis ĉe nia kooperativo. Per la proletara revolucia spirito de "malriĉuloj", ni akiris grandan riĉrikolton en la unua jaro de nia kooperativo. La pomua produktkvanto de greno pliiĝis je pli ol 100 ĝinoj kompare kun tiu en la tempo de interhelpa grupo. Ĝuste en tiu jaro, per niaj du manoj, ni hakis brullignojn sur montoj, kaj per la mono ricevita el forvenditaj brullignoj ni aĉetis unu bovon, unu azenon, dek naŭ ŝafojn, unu ferradan ĉaron kaj nombron da malgrandaj agrikulturiloj. La fakto pruvis, ke nia kooperativo ne nur ne disfalis, sed fariĝis ĉiam pli prospera, kaj tio forte refutis la absurdajn dirojn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj.

La vigla disvolviĝo de la movado de agrikultura kooperigo tra nia lando teruris la ĉinan Ĥruŝĉov. Profitante la oficon de li uzurpitan li kolektis ĉirkaŭ si kunulojn, por levi la kontraŭfluon de "opono al riskema antaŭeniro" kaj devigi la kamparanojn aliĝintajn al kooperativoj "forlasi ilin kaj retroiri al interhelpaj grupoj". Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj klare travidis la malican intencon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj kaj bone komprenis, ke "opono al riskema antaŭeniro" signifas malpermesi al ni antaŭenmarŝi laŭ la socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ kaj retiri nin al la kapitalisma vojo. Ni firme staris kontraŭ tiu kontraŭfluo, tiel ke nia kooperativo ne nur ne "transformiĝis en interhelpan grupon", sed eĉ rapide disvolviĝis kaj plifortiĝis sub la lumo de la ĝenerala linio de la Partio en la transira periodo, kiun elmetis Prezidanto Maŭ. En 1953, nia kooperativo disvolviĝis de 23 familioj al 83 familioj, kaj en 1954 efektiviĝis la agrikultura kooperigo de nia tuta vilaĝo.


La ĉina Ĥruŝĉov, tamen, ne volontis malvenki. En 1955 li kaj liaj kunkrimuloj levis siajn tranĉilojn kaj senbride forhakis 200,000 kooperativojn en la tuta lando. Ilia kontraŭrevolucia agado atingis la gradon de frenezeco! Kiam la agrikultura kooperigo alfrontis la danĝeron esti sufokota de la ĉina Ĥruŝĉov, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la raporton titolitan *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo* kaj mem skribis antaŭparolon kaj notojn por la libro *Socialisma Alta Tajdo en la Ĉina Kamparo*. En unu el la notoj Prezidanto Maŭ alte taksis nian kooperativon. Li diris: **"En la kooperiga movado en Zunhua-gubernio sin trovis Vang-Guofan-Kooperativo formita el 23 malriĉkamparanaj familioj, kiu posedis nur tri gambojn de azeno, kaj estis nomata 'Malriĉula Kooperativo'. Tamen, per sia propra penado en tri jaroj, ili 'prenis de montoj' amason da produktaj rimedoj, tiel ke iuj vizitantoj estis kortuŝitaj ĝis larmo. Mi opinias, ke tio estas la figuro de nia tuta lando. Ĉu 600 milionoj da malriĉuloj ne povas per sia propra penado ŝanĝi ĝin en socialisman landon riĉan kaj potencan?"** La granda instruo de Prezidanto Maŭ multege kuraĝigis nin malriĉkamparanojn, malsuperajn mezkamparanojn kaj multnombrajn kooperativanojn. Ni elkore kriis: Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ! Ni ĵuris, ke ni nepre sekvos la instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj decideme iros la socialisman vojon, lin sekvante. En januaro de 1956, ni unuiĝis kun kvar najbaraj vilaĝoj por formi altgradan kooperativon, kaj en 1958, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, ni plue levis la altgradan kooperativon organize al popola komunumo. Tio multe stimulis la produktadon kaj kondukis nin sur la oran ponton al komunismo.

Kiam ni retrorigardas nian trairitan vojon, ni povas rimarki, ke ĉiu paŝo farita en disvolviĝo kaj plialtiĝo rezultis el la efektivigo de la instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tio estas nepreco de historio kaj konformas al objektiva leĝo. La provo de la ĉina Ĥruŝĉov bari la fluon de historio estas nenio alia ol fantazio kaj ĥimero.

La ĉina Ĥruŝĉov ankaŭ senbaze babilaĉis: "Unue mekanikigo kaj poste kooperigo." Tio estas centprocente mensogo kaj trompo. Je la fondiĝo de nia kooperativo, ni ne nur ne havis maŝinojn, sed eĉ ne havis sufiĉe da malgrandaj agrikulturiloj, kaj la tuta kooperativo posedis nur tri gambojn de azeno. Tamen, ni havis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kaj la proletaran revolucian spiriton de "malriĉuloj". Dank' al tiuj nevenkeblaj fortoj, ni disvolvis la socialisman kolektivan ekonomion kaj malfermis larĝan vojon por mekanikigo de la agrikulturo. Nun nia brigado jam havas unu traktoron kaj 14 maŝinojn por draŝado kaj aliaj celoj. Estas certe, ke rapide plimultiĝos niaj agrikulturaj maŝinoj kun la paso de la tempo. La fakto plue donos pezajn vangfrapojn al la ĉina Ĥruŝĉov!

GENG ĈANGSUO:

La Socialisman Vojon Ni Iros Definitive!



Geng Ĉangsuo

POST la studado de la artikolo *La Batalo inter la Du Vojoj en la Ĉina Kamparo*, niaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Vugong-brigado de Vugong-komunumo, Ĵaŭjang-gubernio, unuanime opiniis, ke tiu artikolo diris tion, kio estas en iliaj koroj, kaj senmaskigis la reakcian naturon de la ĉina Ĥruŝĉov. Ĉiuj diris, ke ni nepre devas ĝisfunde kritiki kaj elimini la reviziisman venenon disfluigitan de la ĉina Ĥruŝĉov tra la kamparo, per la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, strikte sekvante Prezidanton Maŭ, la penson de Maŭ Zedong kaj la grandan strategian planon de Prezidanto Maŭ, kaj firme sekvos la vojon montritan de Prezidanto Maŭ ĝis komunismo.

En la jaro 1943, kiam Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon **"organiziĝu"**, ĝin tuj respondis la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia brigado kaj organizis "Kunkulturan Grupon" en novembro de la sama jaro. De tiam, nia brigado iris sur la socialisma vojo por tutaj dudek kvar jaroj. Dum tiuj pli ol dudek jaroj, ja okazis ĉielrenversa ŝanĝiĝo en nia brigado. Prenu la produktkvanton de greno kiel ekzemplon. En la malnova socio, nia pomua produktkvanto estis nur ĉirkaŭ 100 ĝinoj; kaj nun, ĝi jam atingis 700 aŭ 800 ĝinojn. Nia brigado ankoraŭ deponas pli ol 300,000 ĝinojn da greno krom superplenumo de la venda tasko al la ŝtato en ĉiu jaro. En la malnova socio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj eĉ ne povis satigi sin en vintro, tamen nun, ili ne nur ne ĉagreniĝas pro manĝaĵoj kaj vestaĵoj, sed plejmulto el ili eĉ havas superfluan grenon kaj ŝparmonon. Kaj krome, nun ni havas elektrajn lampojn por lumigado, maŝinojn por irigaciado, traktorojn por plugado kaj fabrikon por tritikmuelado... Tiuj aferoj ja estis neimageblaj por ni en la malnova socio. Ĉio ĉi tio estas la rezultato ke ni senhalte antaŭenmarŝas sur la socialisma vojego laŭ la direkto montrita de la granda direktilisto Prezidanto Maŭ.

Sed, la ĉina Ĥruŝĉov havis ekstreman malamon kontraŭ la kolektivigo de agrikulturo, tiu socialisma vojo. Per ĉiaj rimedoj li subfosadis la kolektivan ekonomion, protektis kulakan, pledante por la "disvolvo de la tipo de kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu veturilo". Dum la provizora malfacila periodo de nia nacia ekonomio, li diris sensencaĵon ke "oni devas malantaŭenigi en sufiĉa grado tiel industrion kiel ankaŭ agrikulturon". Li pledis por fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado kaj praktiko de individua mastrumo. Ĉio kion praktikis la ĉina Ĥruŝĉov estas nenio alia ol tio, ke li volis retroigi la historian radon, restaŭri kapitalismon en nia lando kaj redronigi nin la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en amaron suferitan en la malnova socio. Sed, prenante la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel la plej akran armilon, ni neniam lasos sukcesi la lupan ambicion de la ĉina Ĥruŝĉov!

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Nur socialismo povas savi Ĉinion."** La socialisman vojon montritan de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj iros definitive!

HONG LIU:

Familia Kunsido por Kontraŭbatali Egoismon kaj Kritiki Reviziismon

LA granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: "**Ne boneta sed bonega estas la situacio de la granda proletara kultura revolucio. La tuta situacio estas pli bona ol iam ajn antaŭe. La grava signo de la bonega situacio montriĝas en tio ke la popolamasoj estas plene mobilizitaj. Ja neniu el la antaŭaj amasmovadoj atingis tian vastecon kaj tian profundecon en mobilizado kiel la nuna.**"

Lastatempe, iuj fremdlandaj amikoj kiuj interesiĝas pri la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio, skribis al ni: Multaj vivaj faktoj raportitaj en via gazeto pruvas la verecon de la saĝa aserto de Prezidanto Maŭ, ke bonega estas la situacio de la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio, kie la centmilione nombra popolamaso zorgas pri la ŝtataj aferoj, kaj ĉiuj familioj sinĵetis en la gigantan torenton de la granda proletara kultura revolucio. La legantoj de El Popola Ĉinio certe estos tre kontentaj, se ili povos informiĝi, kiel oni kritikas la ĉinan Ĥruŝĉov en la familioj de kamparaj popol-komunumanoj kaj de laboristoj.

Por kontentigi tiujn, kiuj volas koni la staton de la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio en ĉiuj flankoj, ni publikigas speciale la protokolon pri la kunsido de la tri generacioj de la familio de komunumano Liu Ĝenghi por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon.

La kunsidon prezidis Liu Juan-gjun, la dua filo de Liu Ĝenghi. Li unue gvidis la tutan familion voĉlegi el la libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* la jenajn plej altajn instrukciojn:

"Reviziismo, aŭ dekstrema oportunismo, estas burĝa pensfluo kiu estas pli danĝera ol dogmismo."



La familio de Hju Joŭlan (meze), membro de Honggingbrigado de Ŝaki-komunumo en Tajĉang-gubernio, Giangsu-provinco, kunsidas por lukti kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon.

"Nun unu el niaj gravaj taskoj sur la ideologia fronto estas disvolvi kritikadon kontraŭ reviziismo."

Liu Juan-gjun: La familia kunsido iru kiel la daŭrigo de la lastavespera. Nun ni komencu kritikadon.

Liu Ĝenghi: Bone, mi diros plie la amaron kaj suferojn, kiujn suferis ni malriĉuloj en la malnova socio! Tiam, mi vivis kiel dungito. Mi laboris kvazaŭ ĉevalo kaj bovo kaj ricevis manĝon de porko kaj hundo. Tiuj amaraj tagoj premas mian koron eĉ hodiaŭ, kiam mi rememoras ilin. En la jaro de la Liberiĝo, kiam mi fiŝis sur boato, kuomintangaj banditoj kaptis min al Hijing-monto. Ili min batis kaj insultis, forrabis miajn fiŝojn, detruis mian fiŝboaton kaj eĉ batfaligis miajn dentojn kaj vundis mian talion. Tiam tute mankis al la malriĉuloj rimedoj por pasigi la tagojn. Kiel ni malriĉuloj povus havi la nunajn feliĉajn tagojn, se Prezidanto Maŭ ne gvidus nin revolucii! Sed, la ĉina Ĥruŝĉov freneze oponas kontraŭ Prezidanto Maŭ, intencante tiri nin ree al la morta vojo. Mi absolute ne permesos tion, eĉ se mi devos riski mian vivon! (Ekkrio de la okjara nepino: "For la ĉinan Ĥruŝĉov!") Li diris ke "ekspluatado estas merito". Tio estas pura sensencaĵo. Li estas vere fidela ido de la bienula klaso. Ekspluatado estas ja nur krimo, krimo meritanta mil mortojn, Ni komencis havi bonajn tagojn, nur kiam Prezidanto Maŭ gvidis nin iri la vojon de kolektivigo. Trinkante akvon, oni ne devas forgesi la putofosinton. (La malgranda nepino gvidas ĉiujn krii: Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!)



Ĝang Ŝukin, laboristino de la Pekina Trikota Fabriko, kaj ŝiaj familianoj en la familia kunsido por lukti kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon

Liu Juangin (la unua filo): La ĉina Ĥruŝĉov, kiu ĉiam kaj ĉie oponas kontraŭ Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, estas ja vere morta malamiko de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li distrumpetis cetere "teorion pri estingiĝo de klasbatalo", publike oponante kontraŭ la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: **"Post kiam la malamikoj kun armiloj estas ekstermitaj, restas ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn."** Prenu nian brigadon kiel ekzemplon. Klasaj malamikoj ankoraŭ restas kaj ne forlasis la intencon por sin restarigi; ili ĉiam faras detruadon kaj subfosadon. El la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj fiuloj en nia vilaĝo iuj volas mortigi niajn homojn eĉ en siaj sonĝoj kaj aliaj detruis bovojn kaj arbojn de la komunumo kaj ŝtelis telefonajn dratojn. Ĉu en tio estingiĝis klasbatalo? Estas tre evidente, ke la malica intenco de la ĉina Ĥruŝĉov, kiu ĉiurimede neas la ekziston de klasbatalon, estas nenio alia ol malstreĉi nian singardemon kaj faciligi lian restaŭron de kapitalismo.

Liu Lancuj (la dua bofilino): Por atingi sian celon de restaŭro de kapitalismo, la ĉina Ĥruŝĉov krome inside atakis la tri ruĝajn standardojn kaj oponis la popolkomunumon, kriaĉante ke trofrue oni fondis la popolkomunumojn. Jen intence dirita sensencaĵo! Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Ja estas bona la popolkomunumo." "Nur socialismo povas savi Ĉinion."** Post la fondiĝo de la popolkomunumo, en nia brigado plene elmontriĝis la giganta forto de kolektiva ekonomio. Ja vere estas multaj la opinioj, alta la varmeco, kaj granda la entuziasmo, kiam estas pli da homoj. Precipe de la lastaj kelkaj jaroj, kiam ni elstarigas politikon, energie studas kaj aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, disvolvante la revolucian spiriton de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn, ni rapide ŝanĝis la naturan fizionomion de nia vilaĝo. Sinsekve ni konstruis kontraŭondan digon en longeco de pli ol

600 metroj, pli ol kvardek muojn da bonaj agroj, kontraŭventan muron en longeco de pli ol 2,000 metroj kaj pumpilan stacion por surmontigi akvon. En fiŝado, ni ekipis nin per dek unu novaj motorizitaj velŝipoj ekde la jaro 1963. Niaj retoj nun estas ĉiuj de nilono. La fiŝistoj akiris riĉajn rikoltojn de jaro al jaro. Ĉu tio ne estas supereco de la popolkomunumo? Ĉu ni povus permesi al la ĉina Ĥruŝĉov disigi la kolektivan ekonomion de la popolkomunumo, por ke ni retroiru? (Liu Ĝenghi intermetis: Ne, ccrte ne!) La ĉina Ĥruŝĉov elmetis ankoraŭ la sloganojn de "stimulo per materio" kaj "laborpoentoj kiel komandanto" por tromplogi nin kaj disvastigis la aserton ke la kamparanoj terkulturas por akiri laborpoentojn kaj manĝon. Tiam en mia kapo regis sufiĉe serioza egoismo. Tial, mi trovis lian vorton prava kaj ĉiam marĉandis unue pri laborpago antaŭ ol akcepti labortaskon. Se la laboro donis multajn poentojn, mi do akceptis, alie, ne. Ja estas dolore nun por mi rememori ĉi tion! Lastatempe Prezidanto Maŭ alvokis nin **kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon.** La radikoj de niaj eraroj troviĝas en la ĉina Ĥruŝĉov. Ni nepre devas elradikigi egoismon el nia kapo per la penso de Maŭ Zedong, la plej forta armilo, kaj ŝanĝi ĝin per kolektivismo de **"kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem"**, kaj enradiki firme la penson de Maŭ Zedong en nian kapon. Tiamaniere, ni povos ĝisfunde faligi la ĉinan Ĥruŝĉov kaj por ĉiam premi lin sub la piedoj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. (Liu Ĝenghi gvidis ĉiujn krii: For la ĉinan Ĥruŝĉov!)

Liu Junĝi (la plejaĝa nepo): La ĝenerala postkulisa apoganto de restaŭro de kapitalismo en la kamparo estas la ĉina Ĥruŝĉov. Ni devas decideme lin kritiki, ĝis li estos faligita kaj senkreditigita, kaj elimini lian venenan influon en nia brigado kaj niaj kapoj. Ankaŭ mi havas egoismon en mia kapo kaj mi pretas daŭre batali kontraŭ ĝi. Ni ankoraŭ suferus malriĉecon kaj malsaton kaj servus al bienuloj kiel bovo kaj ĉevalo, se Prezidanto Maŭ ne gvidus nin iri la vojon de kolektivigo. Dank' al la proletara kultura revolucio, klariĝis al mi, ke la ĉina Ĥruŝĉov intencis konduki nin al la kapitalisma vojo. Tio estas vojo retroira. Ni devas agi firme laŭ la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon, strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ por fari revolucion dum la tuta vivo.

Liang Jumej (la unua bofilino): En la jaro 1962, kiam ni malfacile vivis pro la naturaj katastrofoj, mian penson okupis tiam nur nia privata parcelo, sed malofte la kolektivaj aferoj. Mi ja komprenas nun la kaŭzon, ke la ĉina Ĥruŝĉov gvidis nin retroiri. De nun mi nepre sekvos Prezidanton Maŭ. Mi plenumos ĉion kion diras Prezidanto Maŭ.

Liu Juan-gjun: La kunsido iris bone, kaj nun ni fermas ĝin.

La kunsido de la tri generacioj de la familio de Liu Ĝenghi finiĝis en kuna kantado de *Marnavigo dependas de stiristo.*

KURANTAJ AFEROJ

ALIA KRANIA FOSILIO DE ĈINA SIMIO-HOMO ESTAS TROVITA EN NIA LANDO

En la fame konata Ĝoŭkoŭdian de Pekino, ĉinaj laboristoj kaj junaj sciencaj laborantoj denove trovis kranian fosilion de ĉina simio-homo (*sinanthropus pekinensis*), kio estas ekstreme valora materialo por studo pri la orgino de la homo.

La ĉina simio-homo estis grava ĉenero en la frua periodo de la evoluado de la homo. En 1929, oni trovis ĉe Ĝoŭkoŭdian la unuan kranian fosilion de la ĉina simio-homo kaj poste oni trovis sinsekve multan alian materialon pri ĝi. Sed en la malnova Ĉinio, la elfosado, konservado kaj pristudo de tiu valorega materialo estis sub la mastrumado de usonaj imperiistoj; kaj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, la fosilioj de la ĉina simio-homo ĉiuj estis forrabitaj de ili.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, niaj laboristoj kaj junaj sciencaj laborantoj eliminis la superstiĉajn kredojn al fremduloj, komencis fari esploradon apogante sin sur la propraj fortoj kaj atingis rimarkindajn sukcesojn. Ili trovis sinsekve ŝtonajn instrumentojn kaj fosiliojn de dentoj, mandiblo, membroostoj, kaj bestoj samtempaj kun la simio-homo.

Tiu ĉi fosado ĉe Ĝoŭkoŭdian okazis dum la granda proletara kultura revolucio. La ĉifoje trovita fosilio de kranio de la ĉina simio-homo inkluzivas la fruntoston kaj okcipitoston, kaj kune oni trovis ankaŭ ŝtonajn instrumentojn el kvarco kaj siliko kaj fosiliojn de grandkorna cervo (*Euryceros pachyosteus*), rinocero, hieno kaj aliaj mambestoj. Tiuj fosilioj estas tre valora materialo por pliapaŝa studo pri la fizika formo kaj vivado de la ĉina simio-homo.



Patrolado por defendi la landlimon de la patrolando











Ruĝa Fortikaĵo

—“Politiko-modela Limgardanta Roto” de Iu Trupo de ĈPLA

Dum la lastaj dekkelkaj jaroj, tiu roto gardanta la sudokcidentan landlimon de la patrolando, ĉiam firme alttenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj elstarigante la proletan politikon, solide starigis en si la penson “preni la limregionon kiel hejmon kaj penigan laboron kiel gloron”, bonege plenumis diversajn taskojn en defendado kaj konstruado de la landlimo, kaj konstruis la landliman regionon en fortikan ruĝan fortikaĵon.

Supre maldekstre: Landlimaj gardantoj studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kune kun lokaj ruĝgvardianoj.

Supre dekstre: La armeo amas la popolon kaj la popolo subtenas la armeon. La revoluciaj popolanoj prezentas por batalantoj programerojn prikantantajn la penson de Maŭ Zedong.

Sube: La gardantoj kaj popolanoj kune falĉas tritikon.



Landlimaj gardantoj en patrolo

KINBING:

Batalionestro Liu Tiange, Kiu Tutkore Dediĉas Sin al la Revolucio



K-do Liu Tiange

LA plej granda, plej nobla amo en la mondo estas la varma amo de revoluciaj amasoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La plej sincera, plej profunda amo en la mondo estas la amo inter klasaj fratoj.

Al la ĉina popolo, neniuj vortoj estas pli noblaj kaj pli intimaj ol la supraj. Tamen, por iuj el niaj eksterlandaj amikoj tiuj vortoj eble ne estas tute facile aŭ tute profunde kompreneblaj.

Bonvolu legi tiun ĉi artikolon, kiu helpos vin kompreni la veran sencon de tiuj vortoj.

LA REVOLUCIO KAJ KLASAJ FRATOJ ĈIAM OKUPAS LIAN PENSON

Batalionestro Liu Tiange estas aktivulo en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ el la pekinaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li havas senlime varman amon por Prezidanto Maŭ kaj senlime varman koron por siaj klasaj fratoj. Por savi siajn klasajn fratojn li ne domaĝas sian vivon. Kia penso regas lin, ke li tiel agas? Oni trovas la plej bonan respondon en lia taglibro:

Kvazaŭ sunlumo, pluvo kaj roso, la penso de Maŭ Zedong min kreskigas; kvazaŭ en grundo kaj aero, mi enradikiĝas kaj burĝonas en la popolamaso.

En 1945, la hejmloko de Liu Tiange liberiĝis. Kun granda, profunda malamo al la klasaj malamikoj li aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo por decide revolucii dum la tuta vivo, sekvante la grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ. La klasa amo kaj klasa malamo instigis lin brave lukti kontraŭ la malamikoj, kaj tiel li estis trifoje honorita pro siaj grandmeritaj agoj por la popolo. En sia batala vivo de pli ol 20 jaroj, dum kiuj li ofte trovis sin ĉe la rando de morto, tio kio okupis lian kapon, estis ĉiam la revolucio kaj klasaj fratoj, sed neniam la konsidero pri sia persono mem.

Kiam li estis ordinara batalanto, foje mangrenado falis apud la piedojn de du aliaj kamaradoj. Li alsturmis, kaptis la tuj eksplodontan mangrenadon, ĵetis ĝin en la apudan lageton, kaj tiel savis siajn batalamikojn.

Poste li fariĝis subplotonestro. Foje, kiam la trupo marŝis suden trans rivero, subite altorentis monta akvego. Li savis tri batalamikojn el danĝero, mem riskante esti forportata de la torento al abismo.

Kiam li servis kiel stabano, li foje vidis ke iu batalanto malatente tuŝtiris la ŝnuron jam fiksitan al eksplodigilo kaj tiu falis sur la amason de centoj da aliaj kaj tuj kaŭzos eksplodon. Li fluge alrapidis kaj ĵetis foren la jam fuzigitan eksplodkapsulon.

Kiam li funkciis kiel rotestro, la trupo foje laboris en konstruejo. Ŝtonego peza je dekoj da kilogramoj ruliĝis malsupren laŭ la montdeklivo kaj estis baldaŭ atingonta la batalantojn troviĝantajn sube. Li tuj enbrakigis la ŝtonon haltigante ĝin plenforte per sia korpo.

En la tempo, kiam li servis kiel fakestro, li brave saltis en riveron por savi dronantan knabon, kvankam li mem ne sciis bone naĝi.



K-do Liu Tiange konatigas sian sperton en batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko de reviziismo al la aktivuloj de studado de verkoj de Prezidanto Maŭ el la tria roto.

Kaj nun li estas jam batalionestro. Kaj refoje li sekurigis siajn batalamikojn ne domaĝante sian vivon.

La afero okazis en la posttagmezo de la 3-a de septembro 1966, kiam pluveto falis sur la bordo de la maro Bohaj. Sub la persona gvido de batalionestro Liu Tiange, dekoj da rekrutoj faris je la unua fojo la ekzercon de ĵeto de veraj mangrenadoj.

La ŝirmejo troviĝis sur la digdeklivo. Kun ĝisosta malamo al la usona imperiismo kaj la klasaj malamikoj, la rekrutoj penis sin ekzerci por mastri la teknikon, prenante la ekzercejon kiel batalkampon. Flugis okcidenten unu mangrenado post alia rekte al la celo kaj eksplodis kun tondroj.

Sed, okazis akcidento, kiam venis la vico de rekruto Miaŭ Favang. Li volis ĵeti per sia tuta forto la mangrenadon pli foren, sed pro sia tro granda korpoturniĝo kaj tro malfrua ellaso de la grenado, la grenado flugis en malĝusta direkto kaj falis sur la digdeklivo nur iom pli ol du metrojn for maldekstre.

Fumante la mangrenado ruliĝis returne laŭ la glata deklivo. Granda danĝero minacis kvin batalantojn, kiuj staris nur 2-8 metrojn for de la mangrenado!

Liu Tiange tiam troviĝis en ŝirmejo dekstre de Miaŭ Favang.

Ĝuste en tiu kriza momento, la agon de Liu Tiange direktis la granda instruo de Prezidanto Maŭ: **"La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan."**

"Kuŝu teren!" kriegis li. Dume li mem forte eksaltis el la ŝirmejo kaj sin ĵetis antaŭ la minacatajn batalantojn rekte al la fumanta mangrenado. Por ŝirmi la batalantojn per sia korpo li movis sin ankoraŭ unu paŝon antaŭen, kaptis la mangrenadon kaj tutforte ĵetis ĝin trans la digon.

Tamen, kun bruego, la mangrenado jam eksplodis en la aero, tuj post kiam li elĵetis ĝin. Kaj li falis svene teren. Lia tuta korpo estis trafita de 80 mangrenadaj fragmentoj kun grava vundo sur la kapo, sed la kvin batalantoj restis nevunditaj sub lia ŝirmo.

La granda komunisma batalanto armita per la penso de Maŭ Zedong posedas heroan naturon dediĉi sin tutkore al la revolucio kaj la kolektivo. Oferi la propran vivon por savi aliajn estas ago nekomprenebla por tiuj, kiuj havas animon plenan de egoismo. Jen kontrastas en tio ĝuste la tute malsamaj mond- kaj viv-konceptoj kulturitaj de la du tute malsamaj socioj de socialismo kaj kapitalismo.

Karaj legantoj! La trajtoj de grandaj komunismaj batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong, finfine, trovas sian radikon en kolektivismo. Liu Tiange estas unu el miloj kaj miloj da komunismaj batalantoj animitaj per kolektivismo.

ĈIAM TENI EN LA KORO LA KLASAN MALAMON

De pli ol 20 jaroj post sia aliĝo al la armeo, Liu Tiange ĉiam prenas la instruojn de Prezidanto Maŭ kiel la orientilon de siaj agoj kaj ĉiam tenas en sia koro la grandan, profundan klasan malamon.

Liu Tiange naskiĝis en malriĉkamparana familio en Hajlong-gubernio, Gilin-provinco. En la damninda malnova socio, lia familio vivis mizeran vivon eĉ nekompareblan kun tiu de ŝarĝobrutoj. De sia deka jaro, li devis paŝti porkojn por bienulo. Estante 14-jara, li jam laboris kiel jardungito de bienulo, same kiel plenaĝulo. Tiel, li baraktis 19 tutajn jarojn en amara vivo. 19 jaroj plenaj de sango kaj larmoj!

Ne povante plu toleri la ekspluaton kaj subpremon de la bienulo, Liu Tiange fuĝis iun vesperon el sia hejmvilaĝo. Li venis al Fuŝun kaj laboris en karbominejo. Tie la laborĉefo ofte turmentis lin per vipo aŭ piedbatoj, tiel ke li neniel povis resti plu, kaj revenis al sia hejmvilaĝo. Estis neatendite ke apenaŭ eskapinte el la infero, li tuj falis en la manojn de satano. La japana agresa armeo kaptis lin kiel kulion. Kiel kulio, li estis turmentita de la japanaj rabistoj preskaŭ ĝis morto. Iun tagon, profitante la malatenton de la malamikaj gardistoj, li forkuris per sia tuta forto al sia hejmvilaĝo. Alveninte al la hejmo, li trovis ke lia 9-jara fratino estas devigata de bienulo fariĝi infan-

fianĉino. Pro tio lia patro mortis de forta indigno kaj ĉagreno en la muelĉambro. En la malluma malnova Ĉinio, kiam la lando apartenis al imperiismaj rabistoj, bienuloj kaj kapitalistoj, troviĝis neniu loko kie la malriĉuloj povus plendi pri la ricevitaj maljustaĵoj.

Kompreneble, en tiu tempo, ne sole lia familio trafis tian sorton, kaj inter la subprematoj kaj ekspluatataj malriĉuloj, ĉiu homo kaj ĉiu familio havis sian doloran historion kun sango kaj larmoj.

Dum sia armea vivo de pli ol 20 jaroj, Liu Tiange neniam forgesis siajn suferojn en la malnova socio. Li ofte edukis la batalantojn per sia propra historio kaj tiuj de multnombraj aliaj klasaj fratoj, plenaj de sango kaj larmoj, por veki kaj altigi la klaskonscion de siaj batalamikoj.

Liu Tiange studas en la hospitalo la verkon Servu al la Popolo *kune kun Miaŭ Favang, la batalanto, kiun li savis.*



Iu rekruto nomata Guo Ging-ju forte esperis lerni teknikon post sia enarmeiĝo. Sed, ekster sia supozo, li estis asignita al iu roto, kies tasko estis produktado. Tiel formiĝis tubero en lia penso. Informiĝinte pri tio, Liu Tiange turnis sin al Guo Ging-ju por interbabili. Unue li rakontis la historion de Ĝang Side* pri lia produktado de lignokarbo kaj, poste, sian familian historion. Kun varmaj larmoj en la okuloj, li diris al juna Guo per sinceraj vortoj kun zorgema koro: "Ni ne devas forgesi la pasintan amaron, nek nian devenon! Ĉu ni povus havi hodiaŭan socialisman patrolandon, se ne estus Prezidanto Maŭ kaj miloj kaj miloj da martiroj, kia kamarado Ĝang Side, kiuj heroe oferis sian vivon por la revolucio? Farante revolucion, ni devas sekvi la ekzemplon de Ĝang Side por plenumi ĉion, kion la Partio asignas al ni, kaj dediĉi nian tutan vivon al la revolucio de Ĉinio kaj de la mondo."

Liaj vortoj tuŝis la klasan senton de juna Guo. Ĉi tiu diris kun larmoj: "Batalionestro, mi nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, neniam forgesos la pasintan amaron dum mia tuta vivo, kaj batalos por la liberiĝo de la homaro, sekvante la ekzemplon de Ĝang Side!"

Post duonjaro, juna Guo jam estis akceptita en la Komunisman Junularan Ligon kaj titolita kiel modela batalanto kun kvin bonoj.

De multaj jaroj, pere de klaskonsciiga edukado, Liu Tiange jam faris multajn kamaradojn konsciaj revoluciaj batalantoj de la proletaro, kiuj komprenas, ke ĉiuj laboruloj estas kukurboj kreskantaj sur la sama tigo. Sen la revolucio de malriĉuloj sub la gvido de Prezidanto Maŭ, ne estus hodiaŭ ilia liberiĝo. Kaj la laboranta popolo povus denove fali en



K-do Liu Tiange interparolas kun la batalantoj pri sia kompreno pri la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

la abismon de mizero, se ili ne gardus la socialisman regpotencon per siaj sango kaj vivo. Tial, en kriza momento, kiam ili trovas necese oferi sian vivon por la interesoj de la popolo, ili povas spiti danĝeron, elpaŝi brave kaj fordoni sian vivon al la kolektivo.

Karaj legantoj, jen kion signifas la klaskonscio de revoluciaj batalantoj de la proletaro armitaj per la penso de Maŭ Zedong, kiaj Liu Tiange kaj miloj kaj miloj da aliaj.

ĈIAM MEMORI LA INSTRUOJN DE PREZIDANTO MAŬ

Kiel paŝtbubo de porkoj en la malnova socio, Liu Tiange kreskis en konscian batalanton de la proletaro, en komandanton de bataliono kun batalsperto de pli ol dudek jaroj. Tio rezultis tute el la edukado de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Liu Tiange plej ŝatas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, plej aŭskultas liajn vortojn kaj senlime amas lin.

En aŭtuno de 1966, kiam li jam kuŝis en sveno tri tagojn pro la grava vundo, ricevita dum li savis siajn batalamikojn, lin vizitis la armeaj gvidantoj, liaj kolegoj kaj batalantoj kaj multaj junaj ruĝgvardianoj ĉiuj kun ekscitiĝo kaj maltrankvilo. Sed tion li tute ne povis scii. Iumatene, ŝajnis al li ke iu vokas lin intime:

"Batalionestro! Rapidu! Malfermu viajn okulojn kaj vidu! Prezidanto Maŭ ridetas al vi!"

Ŝajnis ke la doloro tra lia tuta korpo foriĝis je la momento. Li senprokraste deŝovetis la bandaĝon sur sia kapo kaj penis malfermi siajn

okulojn por rigardi. Jen la portreto de Prezidanto Maŭ sur la muro antaŭ li ja rigardas lin kun rideto! Varma fluo de feliĉo ekvenis al li en la koron kaj disvastiĝis tra la tuta korpo.

"Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Vi estas la plej plej ruĝa suno en nia koro! Ekpensante pri vi, mi tuj havas neelĉerpeblan forton por venki ĉion!"

Kuŝante sur la malsanula lito Liu Tiange kriis per sia tuta forto: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Kaj poste li ekkantis mallaŭte:

"*Ruĝas la oriento, leviĝas la suno,*

En Ĉinio aperas Maŭ Zedong . . ."

En la taglibro de Liu Tiange oni povas legi jenajn vortojn:

La bonfaro de Prezidanto Maŭ al ni estas pli alta ol la monto kaj pli profunda ol la maro. Ĉio mia estas donita de Prezidanto Maŭ. La penso de Maŭ Zedong estas mia vivradiko, mia animo, la movforto de mia progresado kaj fonto de miaj fortoj. Mi volas ke la penso de Maŭ Zedong direktu ĉiun mian nervon.

Dum multaj jaroj, li ja tiel agis laŭ sia ĵuro.

En 1960, la gvida instanco decidis transpostenigi lin el institucio al roto kiel ĝian estron. Pri tio li diris nenion, sed pensis en si: "Mi funkciis kiel kadro de rotestra nivelo jam 7-8 jarojn. Kial mi ankoraŭ restas rotestro post transposteniĝo?"

La ekfulmo de tiu penso tuj vekis lian atenton. Kun tiu problemo li studis *Servu al la Popolo*. Kiam li atingis la liniojn **"Nia Komunista Partio kaj sub ĝia gvidado la Okavoja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo"**, subite venis al li en la kapon la figuro de lia intima batalamiko kamarado Ĝaŭ Caj.

Tio okazis antaŭ 20 jaroj, kiam ili militiris suden. Liu Tiange kaj Ĝaŭ Caj kune trapasis multajn sangajn batalojn kaj skribis siajn nomojn sur la sama ĵurskribo por "daŭrigi la revolucion ĝis la fino". Nelonge poste, Ĝaŭ Caj grave vundiĝis en batalo. Kiam Liu Tiange venis antaŭ lin, tiu ĉi diris forte premante la manon de Liu Tiange: "Subplotonestro! Mi ne povas finplenumi la taskon, kaj tio tre ĉagrenas min. Volu ĉiam memori nian ĵurskribon kaj 'daŭrigi la revolucion ĝis la fino'!" Antaŭ ol Liu Tiange povis fari respondon, kamarado Ĝaŭ Caj jam forlasis por ĉiam siajn batalamikojn.

Rememorante tiun okazintaĵon, Liu Tiange rigore riproĉis sin pro la konsidero pri sia oficrango. En tia ideo sin kaŝas ja individuismo de la burĝaro. Li do publike eldiris en la roto sian egoismon elmontriĝintan en tiu ekfulmo kaj faris profundan memkritikon.

Liu Tiange ĉiam sin tenas kiel ordinara laborulo kaj ordinara soldato, sed traktas sin tre rigore. En milita trejnado kaj en konstrua aŭ produkta laborado, li estas ĉiam inter la batalantoj kaj same kiel ili rampas, saltas, kuras kaj portas. Kaj kie estas plej peniga laboro aŭ plej granda danĝero, tien li alrapidas.

Iun fruan matenon en marto de 1966, kiam siblis frosta vento kaj glaciiĝis la supraĵo de akvo, la direktoro de la produkta oficejo de la regimento Ĝeng Kjuanhing venis al la konstruejo. Tie li vidis de malproksime ke iu elfosas ŝlimon per ŝovelilo starante en la akvo. "Kiu komencas labori tiel frue spite al la frosto? — li pensis en si — vera bravulo plena de energio!" Kiam li alproksimiĝis, li trovis ke tiu estas batalionestro Liu Tiange, kies nudaj kruroj estas jam ruĝaj pro la frosto.

"Maljuna Liu, tio ja ne konvenas al via sano!" diris Ĝeng Kjuanhing.

"Hodiaŭ nia trupo venos ĉi tien por elfosi la riverŝlimon. Mi volas unue fari provon." Respondis Liu Tiange kun rideto.

"Tiel frosta estas la vetero, kaj vi estas preskaŭ 40-jara, kiel vi povas kompari vin kun la junuloj?" Ĝeng Kjuanhing ankoraŭ provis admoni sian batalamikon.

Sed Liu Tiange respondis: "Maljuna Ĝeng! Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke ni devas mem gustumi la piron, se ni volas scii ĝian guston. Se mi mem ne provus unue, mi ne povus havi certecon. Se mi mem ne

gustumus la malfacilojn de la batalantoj, mi ne povus scii ilian koron! Kiel mi povus tiam komandi miajn batalantojn?"

Liu Tiange ĉiam bone memoras la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Partoprenante kolektivan produktan laboron, ili (la kadroj) tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon."** Li ja ĉiam agas laŭ tiu instruo de Prezidanto Maŭ.

Depost la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio, en la granda batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, li firme staras ĉe la flanko de la proletaraj revoluciuloj kaj ĵuris defendi per sia vivo la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj kaj konduki la grandan proletaran kulturan revolucion ĝis la fino!"**

Li profunde komprenas el siaj propraj spertoj en la longdaŭra batala 'praktikado ke por revolucii oni ne devas kontentiĝi pri siaj antaŭaj meritoj. Kiu kontentas pri siaj antaŭaj meritoj, ne povas revolucii ĝis la fino. Por tiu, kiu volas revolucii ĝis la fino, la plej plej baza afero estas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, kontraŭbatali la egoismon, kritiki la reviziismon, lerni de la amaso kaj firme sekvi Prezidanton Maŭ dum la tuta vivo!

La ĵuro de Liu Tiange kaj centmilione nombra revolucia amaso, senlime fidela al Prezidanto Maŭ, montras la altan kredon de la ĉina popolo kaj la mondaj revoluciaj popoloj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Ne nur la venko de la ĉina revolucio sed ankaŭ tiu de la monda revolucio dependas de la penso de Maŭ Zedong. Kiel la ĉina popolo kaj la mondaj popoloj povus ne kriegi milfoje kaj dekmilfoje: "Marnavigo dependas de stiristo! Konduko de revolucio dependas de la penso de Maŭ Zedong! Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!" "Vivu! Longe vivu! Longe longe vivu Prezidanto Maŭ!"

---

* *Pri Ĝang Side oni legu EPĈ, n-ron 4 de 1967.*

KURANTAJ AFEROJ

PLIPRODUKTO DE JUTO KAJ RUĜA KANABO JE PLI OL DEKONO

En 1967, ni havis ĝeneralan pliprodukton de juto kaj ruĝa kanabo (Atocynum lancisolium) en iliaj ĉefaj produktaj regionoj de nia lando, nome Guangdong, Ĝegiang, Giangsu, Ŝandong, Siĉuan, Hubej, Fugian kaj Guanghi. La totala produktokvanto en 1967 estis dekonon pli granda ol tiu en 1966.

PLI BONA RIKOLTO DE SUBTROPIKAJ EKONOMIAJ PLANTOJ

Dank' al stimulo de la granda proletara kultura revolucio, en la lasta jaro, la plantareo kaj produktokvanto de subtropikaj ekonomiaj plantoj en Hajnan-insulo, kiu estas la ĉefa kultivejo de subtropikaj ekonomiaj plantoj de Ĉinio, multe superis tiujn de ĉiu ajn antaŭa jaro. La produktokvanto de la fama ruĝa teo de Vuĝi-monto kreskis ĉirkaŭ je 100% kompare kun tiu de la jaro 1966. La plantareo de pipro en 1967 superis la totalan plantareon en la pasintaj dekkelkaj jaroj post la Liberiĝo.

MEZURAPARATO DE MARAKVA TRAVIDEBLECO PRODUKTITA

Post pli ol 500-foja eksperimentado, la Fabriko de Optikaj Instrumentoj "1-a Aŭgusto" de Ginan, Ŝandong-provinco, sukcesis produkti la unuan mezurilon de marakva travidebleco de nia lando en la vintro de 1967. Diversaj provoj kaj ekspertizado pruvis, ke la kvalito de la instrumento plene atingis la postulatan normon kaj povas esti uzata en oceanografiaj esploroj k. a. de nia lando.

NOVA REKORDO EN KAPTADO DE TRIKIUROJ POST LA LIBERIĜO

Ĝis la 29-a de novembro, 1967, en la fiŝejo de Ŝengsi, Ĝegiang-provinco, oni kreis novan rekordon de 82,000 tunoj en trikiurkaptado post la Liberiĝo, kaj tiu kaptokvanto estas dekonon pli granda ol tiu en la sama periodo de 1966.

HIANG KJUN:

Varme Helpi Kadrojn Revolucii super Si Mem

Ni informas al niaj legantoj en tiu ĉi artikolo, kiel la proletaraj revoluciuloj de Kingdaŭ-a Ŝtalfabriko varme helpis la sekretarion de la partia komitato de la fabriko reveni al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ĝi helpos niajn fremdlandajn amikojn pli bone scii, kiamaniere la revoluciaj amasoj de nia lando distingas la kadrojn per la penso de Maŭ Zedong, kaj kiel ili, sekvante la direktivon de Prezidanto Maŭ **"unuiĝo — kritiko — unuiĝo"** kaj lian politikon **"lerni el pasintaj eraroj por eviti la estontajn, kuraci la malsanon por savi la homon"**, faras kamaradecan helpon al kadroj kiuj faris erarojn, tiel ke iuj el ili sukcesis reveni al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

—Noto de la Red.

Sub la helpo de la PLA-anoj por subtenado de la maldekstruloj la proletaraj revoluciuloj de Kingdaŭ-a Ŝtal-Fabriko firme kaj korekte plenumis la politikon de Prezidanto Maŭ pri kadroj kaj kun fervoro helpis erarintajn kadrojn reveni al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La antaŭa sekretario de la fabrika partia komitato Liu Hua efektivigis la burĝaran reakcian linion por mallonga tempo en la komenca periodo de la granda kultura revolucio kaj direktis la lancpinton de batalo al la amaso, rezulte de kio multaj revoluciaj oficistoj kaj laboristoj estis maljuste atakitaj.

Sub la gvido de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ la revoluciaj laboristoj en tiu fabriko brave ŝturmrompis barikadojn post barikadoj de la burĝara reakcia linio kaj de tiam la amasa movado rapide ekbolis tra la tuta fabriko. Post intensa batalo en sia penso kaj sub la pacienca helpo de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj Liu Hua faris kelkfoje memkritikon antaŭ la amaso kaj paŝon post paŝo venis al kompreno pri siaj eraroj.

JUĜI KADRON ĈIUFLANKE

Post sia depreno de la potenco la proletaraj revoluciuloj de tiu fabriko komprenis, ke estas necese ĝuste trakti kadrojn laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj akcepti ilin en la gvidantaron de "triflanka kombiniĝo" por bone teni la potencon. Do la problemo pri Liu Hua, la antaŭa sekretario de la partia komitato de la fabriko, estis metita en la tagordon.

Apenaŭ la problemo estis levita, tuj komenciĝis akra diskutado en la tuta fabriko. La fokuso de la diskutado estis la demando de kiu komandejo venis Liu Hua. La proletaraj revoluciuloj de la fabriko faris ĉiuflankan, historian kaj klasan analizon pri Liu Hua laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke **"juĝante kadron, ni devas konsideri ne nur lian agadon en mallonga periodo aŭ unu afero, sed ankaŭ lian tutan vivon kaj lian tutan laboron. Tio estas la ĉefa metodo por juĝi kadrojn."**

Liu Hua venis al la fabriko el PLA antaŭ tri jaroj. Li devenis de familio de malriĉkamparano kaj vivis mizere de sia infanaĝo. En 1940 li aliĝis al la revolucia armeo. Dum siaj pli ol 20 jaroj de servado, Liu Hua estis fidela al la afero de la Partio kaj atente studis verkojn de Prezidanto Maŭ en sia laboro. Konsiderante lian malbonan sanstaton, la Partio konsilis lin emeritiĝi, tamen li insistis pri sia daŭra laborado por la Partio. Kvankam li faris certajn erarojn, tamen bona kadro li estas laŭ lia sinteno koncerne al la gravaj politikaj problemoj.

La revolucia komitato de la fabriko publikigis al la amaso la tutan materialon pri li. Post diskuto de la tuta fabriko oni venis al unuanima konkludo, ke Liu Hua ne estas potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, sed kadro, kiu faris erarojn, kaj la problemo pri li apartenas al la kategorio de kontraŭdiro interne de la popolo.

LASU KADRON IRI EN LA AMASON POR SPERTI VENTOJN KAJ PLUVOJN

La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj helpis Liu Hua forĵeti siajn erarajn ideojn kaj helpis lin vere reveni al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kamaradoj de la fabrika revolucia komitato lin avertis: "Kamarado Liu Hua, la radiko de viaj eraroj kuŝas en via disiĝo de la amaso kaj nefido al ili. Vi devas decideme profundiĝi en la amason por sperti ventojn kaj pluvojn."

Liu Hua akceptis la admonon kun danko pro la kamaradeca helpo kaj prizorgo.

Li meminiciate iris labori en la grupo de pakado de ŝtalplata laborejo. Tio estis la unua fojo por li partopreni la fizikan laboron post veno al la fabriko. Li profunde hontis, kiam li pensis, ke li estas komunisto, sed ne aŭskultis vortojn de Prezidanto Maŭ kaj ne persistis pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro. De tiam Liu Hua laboras, vivas kaj lernas verkojn de Prezidanto Maŭ ĉiam kune kun la laboristoj. Tiel mallongiĝis la distanco inter li kaj la laboristoj.

Iun fojon, dum laborpaŭzo aro da laboristoj ĉirkaŭis lin dirante: "Liuĉjo, vi apartigis vin tro fore de ni laboristoj en la pasinteco. Se ni volis vidi vin en la kabineto pro aferoj, ni devis trairi plurajn "gardatajn pasejojn". Aŭ via sekretario diris, ke vi havas aferojn, aŭ la estro de la oficejo diris ke vi estas tro okupata. Sed kio rezultiĝis, se vi tutajn tagojn vin tenis for de la laboristoj? Ne eblis por vi ne erari, se vi tutajn tagojn klinis vian orelon for de aŭdado de vortoj de ni laboristoj!" Tio, kion diris la laboristoj, forte kortuŝis Liu Hua. Kiom intimaj kaj varmaj estis tiuj signifoplenaj vortoj de sincereco kaj bonvolo por Liu Hua!

Kompreneble, rigora kaj serioza estis la helpo al Liu Hua fare de la proletaraj revoluciuloj de la fabriko. Foj-refoje ili kuraĝigis lin hardiĝi en la ventoj kaj pluvoj de batalo de la amaso. Por ke li aŭskultu kritikajn analizojn de la amaso pri liaj eraroj, ili multfoje organizis kunvenojn kun malsama skalo. Ankaŭ la membroj de la revolucia komitato ofte havis koran interbabilon kun li.

Tio, kio plej kortuŝis Liu Hua, estis interparolo kun Giang Ĉongging, laboristo kaj konstanta komitatano de la fabrika revolucia komitato. Giang Ĉongging plej frue leviĝis por ribeli en la granda kultura revolucio de la fabriko. Sed li ricevis diversajn persekutojn pro tio, ke Liu Hua sekvis la burĝaran reakcian linion. Malgraŭ tio, meminiciate li babilis kun Liu Hua korverŝante: "Liuĉjo, la amasoj kritikis vin absolute ne por verŝi personan malamon kaj sin venĝi. Ni tion faris pro tio, ke vi deviis de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Tio, kion ni malamas, estas viaj eraroj. Ni esperas, ke vi rapide liberigos vin de eraroj kaj fariĝos bona kadro de Prezidanto Maŭ." Tion dirante li donis al Liu Hua kolekton da materialoj inter kiuj estis instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj aliaj gvidantoj de la Centra Komitato de la Partio kaj ankaŭ kritikaj artikoloj pri la ĉina Ĥruŝĉov. Kaj li diris krome: "Bone studu la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kuraĝu tuŝi vian animon ĝis la plejprofundo."

Kiam Liu Hua deprenis la materialojn el la manoj de la laboristo, kiun li iam atakis, li neniel povis sin deteni de larmoj.

En la pasinteco, ne komprenante la revolucian amasan movadon, Liu Hua sin taksis pli alte ol la proletarajn revoluciulojn. Li ĉiam konsideris sin pli saĝa ol la amaso. Sed fakte li mem jam nekonscie deviis de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, dum la proletaraj revoluciuloj firme defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Post ilia veno al la potenco arde iras la revolucio, pliiĝas la produkto de la fabriko tago post tago, kaj senprecedence bonega situacio regas la tutan fabrikon.

Antaŭ tiuj faktoj, ŝanĝiĝis la opinio kaj sento de Liu Hua pri la proletaraj revoluciuloj.

SURIRI LA NOVAN BATALPOSTENON

Post stariĝo de Liu Hua tuj sekvis nova problemo: Kiel oni devas uzi lin?

En la komenco iuj ne konsentis meti lin sur gravan lokon, argumentante ke li estis la unua el la ĉefoj kaj faris nemalmulte da eraroj, do oni ne povas senskrupule konfidi al li gravan oficon. Dum interŝanĝo de opinioj oni montris, ke tiu skrupulemo fakte estas superflua. Se ni kuraĝas helpi kadron stariĝi, ni ankaŭ devas kuraĝi lin surpostenigi. Sekve oni unuvoĉe akceptis lin en la revolucian komitaton kun "triflanka kombiniĝo" de la fabriko kaj elektis lin kiel konstantan komitatanon.

HINHUA:

Antaŭ la Nova "Ekzameno"

PAROLANTE pri "ekzameno", oni kutime ligas ĝin kun la "ekzamenaj paperoj". Tamen la diplomitoj de la Pekina Instituto de Poŝto kaj Telekomuniko sukcese trapasis neordinaran ekzamenon.

NOVA "EKZAMENO"

La diplomitoj devis plenigi tabelon pri sia laborelekta deziro antaŭ ol la ŝtato metis ilin sur laboran postenon. Oni kutime tion faris en la pasinteco. La diplomitoj jam antaŭe havas sian kalkulon pri la elekto de institucio kaj regiono de la venonta laboro, do kia malfacilo kuŝas en tio?

Tamen, hodiaŭ, kiam la granda proletara kultura revolucio jam akiris decidan venkon kaj Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon **"kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon"**, la afero statas tute alie. Lastatempe, la proletara komandejo estrata de Prezidanto Maŭ donis al la diplomitoj novan mobilizan ordonon: Iru al fabrikoj, kamparo kaj bazaj organizoj, al la lokoj, kie urĝe bezonas vin la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La diplomitoj diris: Kiel trakti la labor-asignadon estas nova ekzameno por ni!

AL LA LOKO KIE LA REVOLUCIO URĜE BEZONAS MIN

La epoko antaŭenmarŝas, la historio impetas. Ĉu oni povas plenumi tiun novan ekzamenon per la rutina respondo antaŭ la granda proletara kultura revolucio?

Kun profunda klasa amo al Prezidanto Maŭ kaj la Partio, Liu Hua suriris la novan batalpostenon. Ne vanigante la konfidon de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj, li aktive faris proponojn kaj donis konsilojn al la junaj revoluciaj ŝturmantoj en kunvenoj de la revolucia komitato. Li longtempe kaj loĝas kaj manĝas en la fabriko kaj ĉiam estas preta rapidi tien kie li estas bezonata. Li ne plu fermas sin en la kabineto kiel antaŭe. Kaj en laborejoj kaj ĉe kunvenoj oni povas ofte trovi, ke tiu ĉi maljuna komunisto kvindekjara estas kune kun la amasoj.

La fajrego de la granda kultura revolucio forbruligis la "burokratan sintenon" de Liu Hua. "Ŝanĝiĝis Liu Hua," diris laboristoj, "nun li ligiĝas kun ni laboristoj koro al koro." Kaj Liu Hua diris emociplene: "Ho Prezidanto Maŭ, estas vi, nia amata, kiu donis instruojn kaj serion da novaj instrukcioj, kiuj donis al mi senlimajn saĝon kaj forton, kaj dank' al tio mi denove stariĝis kaj revenis al via revolucia linio. Mi nepre aŭskultos viajn vortojn por ĉiam kaj sekvos vin revolucii por la tuta vivo!"

"Ne!" kun firma decido respondis studentino.

Tiu ĉi junulino devenis de familio malriĉkamparana. Konsiderante pri la laborelekto post diplomiĝo antaŭ la granda kultura revolucio, ŝi ĉiam metis "egoismon" sur la unuan lokon. Tio, kion ŝi foje-refoje pensadis, estis nenio alia krom la individuaj interso, emo kaj estonteco. La senprecedenca granda proletara kultura revolucio tamen akrigis ŝiajn okulojn kaj klare vidigis al ŝi, ke tiu egoisma konsidero ĝuste estas rezultigita de la reviziisma eduka linio praktikita de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en iuj institutoj. Tial, metante "kolektivismon" sur la unuan lokon, ŝi decideme forlasis la malnovan respondon en la ekzameno kaj firme skribis sur la tabelo ideografiaĵojn en fortaj strekoj: Al la loko kie la revolucio urĝe bezonas min!

Ke la studentino, en nur iom pli ol unu jaro, jam ĝustigis sian sintenon al la laborelekto, montris la ĉielskuan grandegan ŝanĝiĝon de nia epoko kaj la grandan triumfon de la granda proletara kultura revolucio de nia lando. Sub la nutrado de la senlime brila penso de Maŭ Zedong, granda amaso da daŭrigantoj de la proletara revolucia afero spertis batalan hardon de la senprecedenca granda proletara kultura revolucio kaj forte ŝanĝis sian spiritan fizionomion.

FORTE BATALI KONTRAŬ EGOISMO

Ni prenu iun junan respondeculon de revolucia amasa organizo en la klaso kiel alian bonan ekzemplon. Vidu, kion li pensis pri la laborelekto. En pli-ol-unu-jara granda kultura revolucio, strikte sekvante la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, li kune kun la revoluciaj junuloj de la tuta instituto forte ribelis kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Sed, ĉe la labor-asignado ekfulmis en la kapo de tiu ĉi revolucia junulo, kiu kuraĝas pensi kaj sturmi, la ideo: "La gvidantaro eble aparte 'favoras' min per laborposteno en Pekino pro mia aktiva agado en la granda kultura revolucio!" Tamen, la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon"** baldaŭ avertis lin: "Kial mi esperas apartan 'favoron' de la gvidantaro? Ĉu mi partoprenis la grandan kulturan revolucion ne por elradiki reviziismon, preventi la kapitalisman restaŭron en nia lando, sed male por ĉasi miajn individuajn interesojn?" Li miris pri la ekfulmo de tia ideo kaj sentis honton antaŭ nia granda epoko kaj penton antaŭ la plej estimata granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Li decidis ekpafi kontraŭ sia "egoismo" en tiu ĉi nova ekzameno per la revolucia ribela spirito de brava sturmo en la granda kultura revolucio! Tiamaniere, anstataŭ la plej idealan Pekinon, li surskribis Hingiang, Junnan



La revoluciaj profesoroj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Tongi-Universitato en Ŝanhajo partoprenas laboradon en la konstruejo por trovi konkretan vojon al revolucio de edukado.

kaj Hejlonggiang, la tri plej malproksimajn provincojn en la labor-asigna projekto, kiel sian deziron.

En tiu ĉi labor-asignado, la diplomitoj kreive studis kaj aplikis la "tri popularajn artikolojn" por forte elradiki "egoismon" kaj energie starigi "kolektivismon", kaj tiel ili skribis en la tabelo por laborelekta deziro jenajn vortojn "obei al la asigno de la patrio", "decideme obei al la bezono de la revolucio". Jen la deziro de la diplomitoj!

PREZENTI REVOLUCIAN RUĜAN KORON AL PREZIDANTO MAŬ

Tamen, kiel tiuj lakonaj frazoj povas plene esprimi iliajn revolucian heroecon disradiantan en la granda proletara kultura revolucio kaj la grandan ambicion por flirtigi la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong super la tuta Ĉinio kaj la tuta mondo!

Vidu folion post folio da pretigitaj tabeloj plenaj de revolucia patoso! Legu, kiel la baldaŭ ekmarŝontaj diplomitoj esprimis al la patrio kaj popolo sian deziron en la spaco por noto!

Iu studento skribis: "Sen la gvido de Prezidanto Maŭ, sen la nutrado de la penso de Maŭ Zedong, ne estus mia hodiaŭo. Mi apartenas al la Partio kaj la popolo. Mi senkondiĉe obeos al la asignado de la patrio."

Alia skribis: "Mi havas nenian individuan deziron krom la bezono de la Partio, popolo kaj revolucio."

Anstataŭ sian propran eksplikon iuj transskribis en la tabelon la valoran instrukcion de vicprezidanto Lin Biaŭ: "Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj estu liaj bonaj batalantoj."

Iuj citis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **"Kio estas laboro? Laboro estas batalo. En tiuj lokoj estas malfaciloj kaj problemoj, kiuj bezonas esti solvataj de ni. Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj."**

Kaj aliaj enskribis heroajn poemojn por prezenti sian revolucian ruĝan koron al Prezidanto Maŭ.

Ĉu tio estas io simila al la plenigo de la laborelekta tabelo por diplomitoj? Ne, tio estas ĵurado! Tio estas ĵuro al la patrio, al la popolo kaj al nia plej plej estimata granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

La instruistoj kaj studentoj de la Pekina Arbarscienca Instituto lernas de la laboristoj de la Pekina Lignaĵa Fabriko kaj irigas lecionojn en ligo kun produktado.





La Situacio de la Granda Kultura Revolucio Fariĝas Ĉiam Pli Bona

Kara amiko F. R.:

Ni konfirmas la ricevon de via letero sendita en novembro kaj vin dankas pro via subteno kaj prizorgo al nia granda proletara kultura revolucio. Tion ni klare vidas el via letero. Ĉar vi "senpacience atendas informojn rekte el Ĉinio" kaj "ĉiam soifas ricevon de nova numero de EPĈ", ni rapidas paroli en tiu ĉi letero iom pri la situacio de la granda kultura revolucio.

La granda proletara kultura revolucio, iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, jam akiris decidan sukceson. La tuta situacio estas pli bona ol iam ajn antaŭe. La grava signo de la bonega situacio konsistas en tio, ke la popolamasoj estis plene mobilizitaj. Neniu el la pasintaj amasmovadoj atingis tian vastecon kaj profundecon en mobilizado kiel la nuna. De Pekino, la centro de la granda proletara kultura revolucio, ĝis malproksimaj limregionoj, de urboj ĝis kamparo, de fabrikoj kaj institucioj ĝis trupoj kaj lernejoj, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj popolamasoj aktive kaj rapide levis altan tajdon de amasa lernado kaj amasa aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj de revolucia amasa kritiko kun **"batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo"** kiel la ĉefĉenero. La revoluciaj popolamasoj en nombro de centmilionoj kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, prizorgas la ŝtatajn aferojn kaj diskutas la problemojn de la granda kultura revolucio.

En la kamparo, kun la profunda disvolviĝo de la granda kultura revolucio, la penso de Maŭ Zedong estas disvastigita en senprecedence granda skalo. La vastaj amasoj de komunumanoj, precipe la malriĉaj kaj malsuperaj mezkamparanoj, senlime amas kaj senlime adoras la penson de Maŭ Zedong kaj estas senlime fidelaj al ĝi. Ili ofte studas kaj propagandas fervore la penson de Maŭ Zedong en diversaj formoj. Iuj starigas por tio kursojn aŭ vesperajn lernejojn, aliaj organizas studrondojn aŭ propagandajn trupojn. Ili ĉiam utiligas la tempetojn antaŭ aŭ post kunvenoj kaj de laborpaŭzoj por amase studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj propagandi lian penson. Apud la vojoj, ĉe la vilaĝoj, ĉie staras ruĝaj tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ. En ĉiuj domoj oni povas vidi sur la muroj portretojn de Prezidanto Maŭ kaj kopiojn de liaj vortoj. La revoluciaj popolamasoj plej ŝatas legi verkojn de Prezidanto Maŭ. Nun, en miloj kaj miloj da familioj de komunumanoj jam stariĝis la sistemo de ĉiutaga studado de liaj verkoj. Ili uzas la tempojn antaŭ aŭ post manĝo kaj antaŭ enlitiĝo por tiu celo aŭ por kunveni por interŝanĝi siajn spertojn en studado kaj aplikado. Nuntempe, de maljunuloj kun aĝo de 70-80 jaroj ĝis infanoj 6-7-jaraj, preskaŭ ĉiuj povas parkere reciti kelkajn, dekkelkajn aŭ kelkdekajn eldirojn de Prezidanto Maŭ kaj kanti kantojn kun tiaj tekstoj. Multaj povas eĉ parkere reciti la brilajn verkojn *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*. Ili aplikas la penson de Maŭ Zedong en produktado por solvi renkontitajn problemojn. Viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj, ĉiuj zorgas pri la ŝtataj aferoj kaj aktive partoprenas en la revolucian amasan kritikon kaj diskutadon. Verkoj de Prezidanto Maŭ fariĝis nemalhavebla spirita nutraĵo por ĉiuj. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diras: "La verkoj de Prezidanto Maŭ estas trezoro por revolucio, kion oni neniam povas lasi."

Kiam la vastaj revoluciaj popolamasoj disvolvas revolucian amasan kritikon sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong por ĝisfunde likvidi la diversajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov de restarigo de kapitalismo en la kamparo, ili samtempe batalas kontraŭ sia propra egoismo por starigi en si kolektivismon kaj likvidi la malnovajn ideojn, malnovan kulturon, malnovajn morojn kaj malnovajn kutimojn hereditajn de jarmiloj. Ĉar la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la revoluciaj amasoj kaj kadroj rigardas la batalon kontraŭ egoismo, kritikon al reviziismo kaj tutkoran sindediĉon al kolektivismo kiel la normojn de siaj agadoj, aperis en la kamparo alta tajdo de revolucio kaj ankaŭ de produkto. Kiam la penso de Maŭ Zedong estas posedata de la vastaj amasoj, ĝi tuj fariĝas giganta materia forto por reformi la socion kaj la naturon. Sube ni prezentu al vi du ekzemplojn.

Al la domo de la estro de iu produkta brigado, la amaso algluis nombron da dazibaŭoj por kritiki liajn mankojn kaj erarojn en la laboro. Por akcepti tion li ne povis konvinki sin mem kaj tial intencis forlasi sian laboron. Lia 13-jara filo rimarkis tion de flanke. Iutage, la familio studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiam la filo finlegis parkere la artikolon *Servu al la Popolo*, li kritikis sian patron: "Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke ni devas **'tutkore'** kaj **'ĝisfunde'** servi al la popolo. Sed, vi ne volas plu labori kiel brigadestro, tio signifas ke vi ne agas laŭ lia



Ĉiuj estas kritikantoj. Jen la ruĝaj soldatetoj de la Tria Elementa Lernejo de Kingdaŭ kritikas la ĉinan Ĥruŝĉov pri liaj krimoj de oponado kontraŭ Prezidanto Maŭ.

instrukcio. Vi havas egoismon en via kapo, kontraŭ kio vi devas energie batali. La patro diris tre kolerigite: "Kion vi knabo scias? Estas nenio koncernanta vin!" Sed la filo refutis: "Ne! Mi devas interveni, ĉar tio ne estas familia bagatelaĵo. Tio estas ŝtata afero, pri kio ĉiuj devas zorgi. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vin fidas. Ili esperas ke, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, vi gvidu ilin bone revolucii kaj produkti. Sed vi volas forlasi vian laboron. Tio estas nenio alia ol forgeso de via deveno!" La vortoj de la filo profunde tuŝis la patron. Sub la helpo de la tuta familio, la brigadestro korektis sian sintenon en rilato al la kritiko de la amaso kaj aktive gvidis la amason teni la revolucion kaj akceli la produkton. Poste, en kunveno de la brigado li malkovris siajn egoismajn pensojn kaj dolore diris: "Mi vanigis la esperon de Prezidanto Maŭ kaj de miaj fratoj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. De nun mi fidele sekvos Prezidanton Maŭ por revolucii ĝis mia lasta spiro. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj devas nepre teni kaj uzi bone nian potencon."

En Kicun, Ŝanhi, la juna milicanino Vang Jin-e ribelis la unua en sia loko en la nuna kultura revolucio kaj suferis ĉirkaŭatakon instigitan de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Tamen, ĉiuj persekutoj ne povis ŝanceli ŝian decidon defendi Prezidanton Maŭ. Apogante sin al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj la vastaj amasoj, ŝi unuiĝis kun la lastaj kaj akiris fine venkon. Poste, ŝi estis elektita de la amaso laŭvice kiel membro de la revolucia komitato de gubernio, subprovinco kaj provinco, kaj ricevis aŭdiencon de Prezidanto Maŭ. Preninte sur sin tian gravan gvidan laboron, ŝi neniam izolis sin for de la amaso, konservas sian naturan koloron de laborulo kaj revolucia sturmulo laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"esti 'ŝtata oficisto' kaj ankaŭ simpla popolano"**. Antaŭ malfaciloj ŝi tuj elpaŝas la unua, antaŭ honoro ŝi tuj lasas la lokon al aliaj, de progresintoj ŝi lernas, kaj al postrestintoj ŝi helpas. Kiel en la pasinteco, ŝi ĉiam postulas sin agi laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"tutkore"** kaj **"ĝisfunde"** servi al la popolo. Kiel ajn okupita ŝi estas, ŝi ĉiam laboras, lernas kaj vivas kune kun la amaso. En ĉiu tempo, ŝi zorgas pri la vivo de la amaso kaj regule solvas, kune kun kadroj kaj milicanoj, malfacilojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj por familianoj de martiroj kaj armeanoj. Ĉien ajn ŝi venas, ŝi faras bonan aferon. La amaso ŝin laŭdas kiel "indan aktivan studanton de verkoj de Prezidanto Maŭ" kaj "bonan filinon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj". En la vasta kamparo, homoj de nova generacio, kia Vang Jin-e, rapide kreskas sub la flegado de la penso de Maŭ Zedong. Kaj ili formas la estontecon de nia patrolando.

Kara amiko, ni devas ĉesi nun pro manko de spaco. El nia mallonga skribaĵo vi povas vidi, ke la penso de Maŭ Zedong jam pli profundiĝis en la koron de nia popolo ekde la granda kultura revolucio. Ĝia ĝenerala disvastiĝo estas la baza garantio por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon kaj certigi ke nia lando neniam ŝanĝos sian koloron. Samtempe, ĝi ankaŭ enkondukis grandan novan epokon, en kiu laboristaj kaj kamparanaj amasoj en nombro de centmilionoj rekte posedas marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong.

Senĉese kresku kun la tempo nia revolucia amikeco!

La Redakcio


La Ĉina Plej Granda Ekipaĵo por Varmtraktado per Industria Frekvenco

EN la granda proletara kultura revolucio, la ĉina plej granda ekipaĵo por varmtraktado per industria frekvenco fabrikiĝis en la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko, je la plej granda rapideco, plej bona kvalito kaj plej malalta produktokosto.

Kun la disvolviĝo de industrio de nia lando, urĝe bezoniĝas gigantaj malvarm-laminatiloj. Kaj la longa, kolosa kaj pezega rulilo de tia maŝino devas esti tre malmola. Por hardi la surfacon de tia rulilego, ordinare oni unue ĝin varmigas en "puto-forno" kaj poste metas en oleo- aŭ akvo-basenon por hardado. La teknologio de tiu procedo estas komplika kaj malfacile mastrebla, dum la sukcesa procento estas malgranda, la proced-periodo estas longa kaj la produktokosto estas alta. La tekniko de varmtraktado per industria frekvenco estas nova. Ĝi ebligas la procedojn de varmigo kaj hardo iri paralele, dum ĝia teknologio estas simpla, la sukcesa procento estas granda, la produktaĵoj estas bonkvalitaj, la proced-periodo estas pli mallonga je duono kaj la produktokosto estas nur triono de la dirita.


Kvankam en nia lando tiun metodon unue aplikis la Ŝenjang-a Pezmaŝina Fabriko en varmtraktado de ruliloj, tamen tia ekipaĵo por hardi gigantajn rulilojn kun diametro de du metroj ne nur ne troviĝis en nia lando, sed estas malfacile trovebla ankaŭ en la mondo.

La naskiĝo de la granda varmtrakta ekipaĵo per industria frekvenco estas nova venko de la senlime brila penso de Maŭ Zedong. En la sen-precedence granda proletara kultura revolucio, la laboristoj de la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la



La plej granda instalaĵo por industri-frekvenca varma prilaboro en nia lando, nove konstruita de la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko

produkton. Laŭ la sperto de la Anŝana Ferŝtala Uzino, ili lanĉis amasan kampanjon, plene aŭskultis la proponojn kaj konsilojn de la laboristoj dum la tuta periodo de projektado kaj fabrikado, entreprenis la projetadon kaj fabrikadon samtempe kaj evitis multajn kurbirojn. Dank' al tio, oni uzis nur mallongajn dek monatojn de la ekprojektado ĝis la fininstalo.



Laboranto de la observatorio analizas kaj studas la aktivecojn de la suno.

Sukcese Konstruiĝis la Plej Granda Suna Radio-teleskopo de Ĉinio

LA plej granda suna radioteleskopo de nia lando jam estas sukcese instalita kaj reguligita ĉe la Pekina Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tio ĉi estas grava sukceso atingita de la proletaraj revoluciuloj de la dirita institucio dank' al firma plenumo de la granda direktivo de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** en la granda proletara kultura revolucio.

La suno estas kolosa radiemisia fonto. Kiam en la suno okazas eksplodo, la mallongonda komunikado sur la tero ofte estas interferata aŭ eĉ interrompita, kio forte malhelpas la mallongondan telekomunikon en nacidefendo, aviado, navigado ktp. Suna radioteleskopo estas instrumento por esplori kaj pristudi la aktivadon de la suno. Ni povas ĝin utiligi en servado al la nacidefendo kaj socialisma konstruado de la patrolando. La sukcesaj instalado kaj reguligo de la suna radioteleskopo projektita kaj fabrikita de nia lando mem provizis novan potencan rimedon al la astronomiaj laborantoj de nia lando por esplorado kaj pristudo de la suna aktivado, kaj precipe por tia laboro en la kulmina jaro de sunaktivado de 1967 ĝis 1968.


La suna radioteleskopo diferencas de la ordinara optika teleskopo per tio, ke ĝi esploras la sunon

ne per la lumradioj sed per la elektraj ondoj emisiitaj de la suno. Per tiu ĉi instrumento oni povas prezenti al si iujn sunajn fenomenojn, kiujn oni ne povas vidi per optika teleskopo. La parabolreflekta antenaro eksterdoma transdonas la kaptitajn malfortajn elektrajn ondojn el la suno al la ricevilo endoma, kaj la lasta ilin amplifikas kaj registras. Laŭ la registrita materialo oni povas studi la aktivadon de la suno, koni ĝian regulon kaj esplori ĝian influon al la terglobo.

Jam tiel frue kiel dum la granda antaŭensalto en 1958, revoluciaj sciencaj laborantoj jam proponis studi kaj provfabriki tian sunan radioteleskopon, respondante al la granda alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"Eliminu superstiĉojn kaj kuraĝu pensi kaj iniciati".** Sed la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la sciencaj rondoj aktive praktikis cent-pocente sklavisman, limakiran kaj likvidisman linion de reviziismo en scienca esplorado, tiel ke oni ne povis fari senbare studon kaj provfabrikadon de tia instrumento.

En la senprecedence granda proletara kultura revolucio, la proletaraj revoluciuloj de la Pekina Observatorio kaj la Ĉina Akademio de Sciencoj leviĝis en ribelo kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj deprenis de ili la regpotencon. Ili firme decidis konduki esploradon kaj provfabrikon laŭ la luma vojo montrita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la instalado kaj reguligado de la instrumento, ili ĉiam observis la direktivojn de Prezidanto Maŭ: strebi peneme, konstrui la landon kun laboremo kaj ŝparemo, sin apogi sur la propraj fortoj kaj labori energie por prosperiĝo. Ili iris el siaj studejoj sur la konstruejon kaj kune kun la laboristaj amasoj ili studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kune kritikis la reviziisman linion de scienca esplorado, interkonsiliĝadis kun ili, kune kun ili laboris kaj vivis, kaj rapide kaj bone instalis kaj reguligis la radioteleskopon kaj plenumis la taskon de fundamenta konstruo per sia duonjaro da tagnokta batalado kontraŭ diversaj malfaciloj kaj dank' al forta helpado de aliaj institucioj.

La parabolreflekta antenaro de la suna radioteleskopo



HINHUA:

Triumfa Kanto de la Granda Proletara Kultura Revolucio

POST bapto de pli ol unujara batalado de la granda proletara kultura revolucio, Kantono, la suda pordo de nia lando, montriĝas pli ĉarma, pli juna.

En la tempo de la decida venko akirita de la proletara kultura revolucio, la Aŭtuna Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio de 1967 okazis en Kantono ekde la 15-a de novembro ĝis la 15-a de decembro. Amikoj el komercaj rondoj de diversaj landoj de la kvin kontinentoj, transmaraj ĉinaj elmigrintoj, samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen arope venis al tiu ĉi urbo plena de revolucia freŝeco por viziti la internacian foiron kun granda skalo, nova fizionomio kaj riĉa enhavo.



La albanaj batalamikoj aĉetas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj bildlibrojn en la Foiro.

Pro sia ĝisosta malamo al la proletara kultura revolucio de Ĉinio, la imperiistoj, modernaj revizistoj kaj reakciuloj de diversaj landoj freneze bojis kontraŭ la foiro kaj faris malicajn kalumniojn. Sed ilia laŭdezira kalkulo vaniĝis, la sukceso de la foiro donis pezan baton al la malamikoj.

LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO AKCELAS FLUGAN DISVOLVIĜON DE NIA SOCIALISMA KONSTRUADO

La granda spirita forto de la centmiliona amaso de laboristoj kaj kamparanoj ŝprucanta en la senprecedenca proletara kultura revolucio akcelas la flugan progresadon de la industrio, agrikulturo kaj nacidefenda konstruado de nia lando. La proksimume 30,000 specoj de varoj kaj ekspoziciaĵoj de la grandskala foiro vive spegulis la novajn atingojn de niaj industrio kaj agrikulturo kaj la grandan frukton de la proletara kultura revolucio de nia lando.

En la ekspoziciejo oni povis vidi la novan fizionomion de niaj petrola kaj kemia industrioj. La petrola produktkvanto en 1966 multe plimultiĝis ol tiu en la jaro 1965, la produktkvanto en la unuaj 9 monatoj de 1967 plue superis tiun en la sama periodo de 1966. Inter la pli ol 330 kemiaj produktaĵoj montritaj en la koncerna halo pli ol 90 estis novaj. Ankaŭ la specoj de maŝinoj kaj aparatoj ekspoziciitaj ĉifoje estis pli multaj ol antaŭe. Du trionoj de la ekspoziciitaj maŝinoj estis produktaĵoj nove projektitaj, provfabrikitaj aŭ grave plibonigitaj dum la kultura revolucio. En la meĥanika halo viciĝis ilmaŝinoj por diversaj celoj kaj ekipaĵoj grandaj, precizaj kaj en kompletoj. Inter ili troviĝis iu altpreciza ĵtornilo; la glateco de la surfaco de objektoj prilaboritaj per tiu maŝino povas atingi la 12-an gradon, tiel ke la surfaco glatas kvazaŭ spegulo. Tiu ĉi maŝino kun monda progresinta nivelo estas projektita kaj elfabrikita de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Ŝanhaja Mezurinstrumenta Fabriko dum la proletara kultura revolucio.

Estis montritaj ankoraŭ pluraj aliaj novaj produktaĵoj kun monda progresinta nivelo krom la menciita.

En 1967, la agrikultura produkto de nia lando akiris ĝeneralan riĉan rikolton. La ekspoziciaĵoj en la agrikultura halo spegulis duoblan venkon en la revolucio kaj en la produkto, akiritan de la centmilione nombrantaj kamparanoj kaj revoluciaj kamparaj kadroj, kiuj, alte tenantaj la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ĝisfunde kritikas la reviziisman linion de la ĉina Ĥruŝĉov



Svarme eniras la Foiron komercistoj kaj ĉinaj elmigrintoj el diversaj mondpartoj kaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen.

sur la agrikultura fronto kaj firme plenumas kaj efektivigas la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton".** En 1967, senĉese disvastiĝadis ĝojigaj informoj pri riĉaj rikoltoj en agrikulturo, forstado, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝado de nia lando. Ambaŭ la someraj kaj aŭtunaj grenoj havis en la jaro kompare grandan riĉan rikolton. Sojo, arakido, kolzo kaj aliaj vegetalinaj plantaĵoj ĉiuj okulfrape pliproduktiĝis; kotono ree akiris riĉan rikolton en 1967, post kvarjara sinsekva granda pliprodukto. Ankaŭ la produktkvanto de juto kaj similaj fibraj plantoj, kokono, sukeraj plantaĵoj kaj tabako havis grandan kreskon. Aparte rimarkinda estas tio, ke ne malmultaj inter la specoj de grenoj kaj agrikulturaj produktaĵoj ekspoziciitaj venis de la lokoj, kiuj unuafoje liveras al la ŝtato eksportajn varojn. Tio montras, ke ankaŭ regionoj kun kompare



Kun respekto, la maristoj el Cipro rigardas la verkojn de Prezidanto Maŭ ekspozatajn en la Foiro.

malbonaj produktaj kondiĉoj kaj malalta produkta nivelo spertis gravan ŝanĝiĝon en la kultura revolucio.

LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO PLENE DISVOLVIS LA SAĜON KAJ KREAN POVON DE LA AMASOJ

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La popolamasoj posedas senliman krean povon."** La pluvego kaj ŝtormo de la proletara kultura revolucio tute renovigis la spiritan fizionomion de la popolo de nia lando kaj plene disvolvis ilian saĝon kaj krean povon. Multaj ordinaraj junaj laboristoj kaj junaj teknikistoj ĵus forlasintaj lernejojn ribelis kontraŭ la burĝaraj akademiaj "aŭtoritatuloj" kaj lanĉis atakon kontraŭ la sklavismo de blinda kredo al libroj kaj fremdlandanoj. Multaj novaj produktaĵoj en la ekspozicio fabrikitaj en la kultura revolucio ja estis kristaliĝo de tia revolucia spirito. Inter la pli ol 90 ekspoziciataj kuracaj ekipaĵoj troviĝis la ĉefaj operaciiloj por replanti detranĉitan fingron, kio sukcesis unue en nia lando, kaj ultrasona diagnoza aparato uzebla dum rondira kuracado en kamparo. La kvalito kaj kapableco de multaj ordinaraj eksportaj kuracaj ekipaĵoj atingis mondan progresintan nivelon. Elektrona sangglobeta nombrilo, kiun la imperiismaj landoj malpermesas eksporti al ni, jam estas fabrikita de la junaj laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Kuracinstrumenta Fabriko post malfacila penado kaj estas liverata por eksporti. Estis ekspoziciitaj la unuan fojon en la foiro ankaŭ la artefarita globforma membrano de dupinta klapo de koro, kiu prezentas unu el la plej novaj sukcesoj en kuracarto de nia lando, kaj fotoj pri ĝia aplikado dum operaciado. Ĝin sukcesis elfari iu hospitalo de nia Popola Liberiga Armeo en la jaro 1966 post du jaroj kaj tri monatoj da provado. Nun tiu ĉi novaĵo en kuracarto jam estas disvastigata kaj aplikata tra la tuta lando.

ALTE TENANTE LA RUĜAN STANDARDON DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG, NI FIRME IRAS NIAN PROPRAN VOJON


Ankaŭ la tradicia metiarto de nia lando grave ŝanĝiĝis en la proletara kultura revolucio. El la produktaĵoj liveritaj de Ŝanhajo, Pekino, Tiangin, Liaŭning, Ŝandong, Giangsu kaj aliaj lokoj al la foiro, 90% estis de novaj specoj projektitaj dum



Du trionoj el la maŝinoj kaj aparatoj elmontrataj en la Foiro estas novaj produktoj, kiujn oni sukcesis projekti kaj fabriki dum la granda proletara kultura revolucio.

Fremdlandaj amikoj kaj niaj samlandanoj el Hongkong kaj Aŭmen rigardas la altklasan aŭtomobilon "Ruĝa Flago".





Aŭstria gasto aprezas niajn novajn produktojn dum la granda proletara kultura revolucio.

la kultura revolucio. Tiuj produktaĵoj estis tute liberigitaj de feŭdismaj kaj kapitalismaj koloroj kaj elmontris sian tute novan fizionomion.

En la daŭro de pli ol unu jaroj, aperis multaj elstaraj produktaĵoj en nia metiarto, kiuj entuziasme prikantas la aktualan vivon de la nova Ĉinio en la granda epoko de Maŭ Zedong, spegulas la spiritan fizionomion de progresemaj personoj el la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj de revoluciaj herooj. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝis diversaj skulptaĵoj kaj grandaj brodaĵoj prikantantaj Prezidanton Maŭ, la plej plej ruĝan sunon en la koro de nia popolo, kaj ankaŭ metiartaĵoj esprimantaj heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kreivan studon kaj kreivan aplikon de verkoj de Prezidanto Maŭ fare de progresemaj personoj. La longan historion havantaj eburaj, jadaj, konkaj kaj ŝtonaj skulptaĵoj, brodaĵoj kaj aliaj metiartaĵoj, ĉiuj forskuis de si feŭdisman feĉon kaj disradias novan brilon sur la larĝa vojo de nacieco kaj revolucieco.

AKLAMO AL LA ENIRO DE LA MONDO EN LA NOVAN EPOKON KUN LA PENSO DE MAŬ ZEDONG KIEL STANDARDO

En la halo por libroj de la foiro troviĝis verkoj de Prezidanto Maŭ grandnombre eldonitaj en diversaj lingvoj. Pere de la foiro tiuj verkoj distribuiĝos tra la tuta mondo por kontentigi la bezonon kaj sopiron de la revoluciaj popoloj de la mondo.

La senlime brila penso de Maŭ Zedong estas la plej potenca kaj plej efika ideologia armilo de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo por batali kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj. La revoluciaj popoloj de la mondo tre sopiras la ruĝe brilantajn, trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Nun verkoj de Prezidanto Maŭ jam estas tradukitaj kaj eldonitaj en dekoj da fremdaj lingvoj. *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* jam estas tradukita kaj eldonita en 24 lingvoj kaj vendita en 128 landoj kaj regionoj je 13,300,000 ekzempleroj.

La rapida disvastiĝo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong en la tuta mondo estas grava signo de la nuna bonega internacia situacio.

En la halo por libroj oni povis legi multajn leterojn plenajn de revolucia entuziasmo de amikoj el diversaj landoj en la mondo. Iu japana amiko skribis: "Mi varme ĝojkrias 'Vivu, vivu, vivu longe Maŭ Zedong' pro la granda disvolviĝo kaj glata irado de la proletara kultura revolucio. Mia koro preskaŭ elsaltas pro ĝojego, kiam mi ekpensas, ke la granda proletara kultura revolucio, gvidata persone de unika genio el jarcentoj, la granda Prezidanto Maŭ, estas akceptata de la tutmonda popolo kiel trezoro."

Iu novzelanda amiko skribis: "La koro de la monda revolucio batas en Ĉinio. Ni festas kune kun vi pro tio ke marksisma penso estas disvastigata inter la vastaj popolamasoj, kaj ke la popoloj profunde komprenas kaj posedas la penson de Maŭ Zedong."

Iu usona amiko diris en letero: "Ni tre deziras akiri la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* por ke ni pli bone sekvu tiun ĉi grandan personon, gvidanton kaj instruanton, kaj pli bone dediĉu nin al la movado gvidata de Maŭ Zedong por ŝanĝi la mondon en tiun apartenantan al la popolo. Por akiri *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* mi pretas pagi ĉian prezon kaj oferi ĉion. Vivu Prezidanto Maŭ kaj lia instruo!"

Liu Tiange

(Bildrakonto)

Kamarado Liu Tiange estas batalionestro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj aktivulo en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Dum la pli ol 20 jaroj post sia aliĝo al la armeo, li brave batalis kontraŭ la malamiko en diversaj partoj de la lando kaj faris foj-refoje meritoplenajn kontribuojn al la popolo.

Li havas profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj senlime fidelas al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En la granda kultura revolucio, li ne sidas en sia gloro, sed aktive subtenas la vastajn maldekstrajn popolamasojn kaj faris novajn kontribuojn.



1. Li neniam forgesas la klasajn suferojn kaj firme memoras la sangajn krimojn de la klasaj malamikoj, ofte rememoras pri la amaraj tagoj en la pasinteco kaj pensas pri la hodiaŭa dolĉo, por preventi la korodon de reviziismo kaj eventualan degeneriĝon. Per ĉio ĉi tio li stimulas sian batalspiriton, por ke li ĉiam restu en la revolucia juneco.



2. "El la pafilo venas ŝtatpotenco." Batalante en diversaj partoj de la lando sub la gvido de Prezidanto Maŭ, li faris tri glorajn meritojn por la popolo.



3. Sesfoje kamarado Liu Tiange savis aliajn je risko de sia propra vivo. Foje, kiam okazis akcidenta eksplodo de mangrenado, li denove elsaltis por savi siajn kvin batalkamaradojn kaj estis honorita kiel unua-grada meritulo.



4. Tute prave diris la batalantoj: "Kiom da koto troviĝas sur nia korpo, tiom ankaŭ sur la korpo de la batalionestro." Kamarado Liu Tiange partoprenas fizikan laboron kune kun la batalantoj kiel ordinara soldato.



5. "La Popola Liberiga Armeo devas aktive subteni la vastajn maldekstrajn popolamasojn." Trifoje li prokrastis sian enhospitaliĝon kaj iris sur la plejfronton de subtenado al la maldekstruloj.



6. Li profunde penetris en la ministajn amasojn, prenis la laboristojn kiel siajn instruistojn, serioze propagandis la signifon de la granda kultura revolucio kaj montris senliman fidelecon al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.



7. En la revolucia amasa kritikado, revolucia amikeco stariĝis inter li kaj la laboristoj. Kun senlima indigno kontraŭ la komuna malamiko, ili kondukis ĝisfundan kritikon al la ĉina Ĥruŝĉov.



8. Lia koro ligiĝas kun tiu de la batalantoj. Kune kun la batalantoj, li studas verkojn de Prezidanto Maŭ, malkaŝas sian penson, kaj luktas kontraŭ sia egoismo por serioze reformi sian mondkoncepton.



9. Kamarado Liu Tiange studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas liajn instruojn kaj agas laŭ liaj instrukcioj. Jen li avide legas verkon de Prezidanto Maŭ.



10. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, Liu Tiange sencede batalas kontraŭ sia egoismo, forte kritikas reviziismon kaj ĉiam revolucias en strikta sekvado de Prezidanto Maŭ.

Heroe Batalas la Vjetnama Popolo

VJETNAMIO estas la loko, kie iras nun plej intense la internacia klasbatalo. La heroa vjetnama popolo staras sur la plej antaŭa fronto de armita batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ili jam akiris grandajn sukcesojn kaj daŭre akiros ankoraŭ pli grandajn.

LA EFEKTIVA FERA BASTIONO

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Kio estas efektiva fera bastiono? Ĝi estas la amasoj, amasoj el milionoj kaj milionoj da homoj, kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion. Tio estas efektiva fera bastiono, nefrakasebla, absolute nefrakasebla per kia ajn forto. La kontraŭrevolucio ne povas nin frakasi, sed ni frakasos la kontraŭrevolucion."**

Ĝuste la granda batalo, entreprenata de la Vjetnama Popola Armeo kaj milionoj kaj milionoj da vjetnamaj popolanoj kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion, faras ĉiun colon de la tero kaj aerspaco de la norda Vjetnamio tombejo por usonaj agresantoj.

En septembro kaj oktobro 1967, kiam la usonaj pirataj aviadiloj intensigis sian bombadon al Hajfongo kaj Hanojo, la armeo kaj popolo de norda Vjetnamio ree frakasis en unu monato centon da malamikaj aviadiloj, tiel ke la nombro de usonaj aviadiloj faligitaj en norda Vjetnamio hontinde "eskaladis" ĝis 2389.

Multaj el ĉi tiuj "feraj korvoj" de Usono estis faligitaj per malpezaj armiloj de milicanoj. En la provinco Thanh Hoa estas taĉmento de milicaninoj, kiu faligis usonan jeton per 27 pafoj de kontraŭaviadila mitralo. En la provinco Hoa Binh oni povas vidi la restaĵon de usona jeto, kiun milicanoj faligis per pafoj de tri fusiloj; la usona pirato, kiu pereis kune kun tiu ĉi "fera korvo", estis sperta oficiro de alta rango!

Unu el la ĉefaj celoj, kun kiuj la usonaj pirataj aviadiloj freneze bombadas kontraŭ norda Vjetnamio, estas rompi la tiean trafikon por malhelpi la subtenon de norda Vjetnamio al siaj sudaj fratoj. Sed ĉi tiu "laŭdezira kalkulo" de la usonaj piratoj bankrotis.

Mobiliza kunveno antaŭ operacio de iu trupo de la Popola Liberiga Armeo de suda Vjetnamio



En Thanh Hoa estas granda fervoja kaj ŝosea ponto super la rivero Song Ma kun longeco de ĉ. 250 metroj. Ĝi interligas la sudon kaj la nordon kaj estis finkonstruita en 1963 de vjetnamaj kamaradoj kun la helpo de ĉinaj specialistoj. De pli ol du jaroj, la usonaj agresantoj uzas ĉiujn diablajn rimedojn por detrui ĝin. Ili bombis ĝin pli ol tricent fojojn per diversaj modernaj bombaviadiloj, uzante grandajn nombrojn da bomboj, raketoj kaj telestirataj misiloj. Iatempe ili bombis amase per dekoj da aviadiloj, alitempe ili faris kaŝatakojn vespere en grupetoj; iatempe ili faligis minojn en la supran parton de la rivero, alitempe ili bombardis de sur la maro... Pasis jam pli ol du jaroj, miloj da tunoj da bomboj falis en la riveron kaj kalvigis la montsuprojn ĉe ambaŭ riverbordoj, sed Johnson ne sukcesis atingi sian kriman celon. Male, la armeo kaj popolo de norda Vjetnamio jam faligis tie 92 usonajn aviadilojn kaj kaptis dekojn da vivaj usonaj piratoj. Kaj la pontego daŭre staras fiere super la rivero Song Ma, simbolante la nevenkeblecon de la heroa vjetnama popolo.

Ĉi tiu heroa pontego Ham Rong nun estas konata kiel "Ponto Ĉiamvenka".

PAFILO EN UNU MANO KAJ MARTELO EN LA ALIA

La usonaj bomboj ne povas teruri la vjetnaman popolon. Ankaŭ fiaskis la intrigo de Johnson kaj similaj por detrui la industrion kaj agrikulturon de norda Vjetnamio.

En Nam Dinh de la provinco Nam Ha, la bombado de la usona imperiismo jam detruis grandan parton de tieaj domoj, kaj tio ankoraŭ daŭras ĝis nun. Ĉar ĉi tie restas ankoraŭ ne malmultaj laboristoj, kiuj persistas en produktado kaj batalado, kvankam plejparto de la fabrikoj jam estas alilokitaj for el la urbo. Ni vizitis iun malgrandan fabrikon de agrikulturaj instrumentoj. La laborejo troviĝas duone sub la tero, kun pajla tegmento je du metroj elstaranta super la tero. La torniloj estas lokitaj en kontraŭ-aera tranĉeo el cemento. Laboristoj streĉe laboras tie sub la lumo de lampeto. Ekstere, malpeza mitralo staras en duhoma ŝirmejo, kie du sindefendaj trupaninoj serĉas okule usonan aviadilon. Ili havas siajn litojn en la fortike konstruita kontraŭaera ŝirmejo tuj apude. Se okaze venas malamikaj aviadiloj, la maŝinpafilo ekstere tuj eljetas kolere sinsekvojn da kugloj, kaj interne la torniloj daŭre moviĝas rapide kiel antaŭe. Kun tia sentima revolucia spirito de "pafilo en unu mano kaj martelo en la alia", la vjetnamaj laboristoj kaj batalas kaj produktas, defendante la produktadon per batalo kaj servante al la batalo per produktado.

Sub la bombado de la usona imperiismo, la loka industrio en ne malmultaj provincoj de norda Vjetnamio iagrade disvolviĝis. Ekzemple, la provinco Thanh Hoa jam povas produkti iujn ĉiutagajn konsumaĵojn, kiaj cigaredoj, sapoj, alumetoj ktp. kaj krome disvolviĝis tie malgrandaj fabrikoj por produkti paperojn kaj agrikulturajn instrumentojn kaj maŝinojn.

Pli kaj pli disvolviĝas ankaŭ la agrikultura produkto en norda Vjetnamio. La membroj de agrikulturaj kooperativoj elmetis brave la sloganon: "plialtigi la produktkvanton sur la bombkavoj". Nun multaj kooperativoj kaj subdistriktoj kaj iuj provincoj kaj gubernioj jam atingis sian celon de produkto de kvin tunoj da greno en ĉiu hektaro.

La ŝtala linio de transportado formita de la popolo de liberigitaj areoj de suda Vjetnamio



31-miliona popolo de Vjetnamio ĉiam memoras la imponan eldiron de Prezidanto Ho Chi Minh: **"La milito povus daŭri kvin, dek, dudek jarojn aŭ pli longe, Hanojo, Hajfongo kaj aliaj urboj kaj tieaj entreprenoj povus esti detruitaj, sed la vjetnama popolo neniam estos terurita! Nenio estas pli kara ol sendependeco kaj libereco. Kiam venos la tago de triumfo, nia popolo rekonstruos sian patrolandon pli majesta kaj pli grandioza!"**

PSEŬDOPACON ILI NE AKCEPTOS

Antaŭ la heroa popolo de Vjetnamio, la usona imperiismo mizere



La virinoj de liberigita areo de suda Vjetnamio kudras militajn uniformojn por la batalantoj en la fronto.

malsukcesis ĉu en batalo en la sudo aŭ en bombado en la nordo. En konfuziĝo kaj embaraso, la usonaj agresantoj tamen ne volontas rekoni sian malvenkon. Unuflanke, ili seninterrompe "eskaladas" en la milito kaj, aliflanke, daŭre trompas per logo al "paca intertraktado". La "laŭdezira kalkulo" de Johnson kaj similaj estas: ĉasi ĉe la tablo de intertraktado kion ili ne sukcesis akiri sur la batalkampo.

Tiurilate, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetio donis grandan helpon al la usona imperiismo, kaj tio plene ĝin malkaŝis kiel la plej hontindan perfidulon de la internacia komunisma movado kaj la plej insidan malamikon de la kontraŭusona, nacisava afero de la vjetnama popolo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Ni devas havi klaran kapon, inkluzive, ne kredi la 'belajn vortojn' de imperiismo kaj ne timi ĝiajn minacojn."**

La vastaj revoluciaj amasoj de Vjetnamio jam travidis la esencon de la trompa "paca intertraktado" proponata de Usono kaj Sovetio. La usona imperiismo de komence ne rajtas okupi la sudan parton de Vjetnamio, nek bombi kaj bombardi ĝian nordan parton. La sola vojo por solvi la problemon de Vjetnamio estas ke la usonaj agresantoj ŝovu sian voston inter la krurojn kaj forruliĝu el suda Vjetnamio. La usona imperiismo povus ankoraŭ fari diversajn proponojn pri "paca intertraktado", sub la helpo de la reviziisma gvidanta kliko de Sovetio, tamen ĝi ne ŝanĝos sian celon por ĉiam okupi sudan parton por plue invadi la nordan parton de Vjetnamio. Nune, la usonaj agresantoj provas ĉiurimede malhelpi la popolon de norda Vjetnamio subteni siajn fratojn en la sudo. Ĉu tiun ĉi insidan kondiĉon akceptos la vjetnama popolo? Ne! Tute egale, kiu ajn elpaŝos kun tia "projekto", ĉu Johnson aŭ Kosigin aŭ iu alia, la vjetnama popolo absolute ne konsentos al ĝi!

La vjetnama nacio formas integran tuton. La popolo de ĝia suda parto kaj la popolo de ĝia norda parto estas fratoj kvazaŭ sango kaj karno de la sama korpo. Ili estas interligitaj koro kun koro kaj en ĉiu spiro. "Ne havos pacon la nordo sen liberiĝo de la sudo!" diris vjetnamaj kamaradoj.

Antaŭ nelonge, Prezidanto Ho Chi Minh solene deklaris: **"Bomboj absolute ne povos teruri niajn samlandanojn. Nek povos ilin trompi ruzaj paroloj. Ni vjetnama popolo batalos firme ĝis ne troviĝos plu eĉ ombroj de la usonaj agresantoj sur la tero de nia amata lando."** Jen estas solena ĵuro kaj fera volo de la 31-miliona popolo de Vjetnamio.

Antaŭen, heroa popolo de Vjetnamio! Malgraŭ la usona imperiismo ankoraŭ kombinos diversajn intrigojn kaj artifikojn, kaj la reviziisma gvidanta kliko de Sovetio faros diversajn subfosajn kaj perfidajn agojn, kaj la vjetnama popolo ankoraŭ renkontos multajn malfacilojn sur la vojo de sia antaŭenmarŝo, tamen la fina venko nepre apartenos al la popolo de Vjetnamio, kiu kuraĝas batali kaj kuraĝas venki.



Batalantoj de iu regimento de la Popola Liberiga Armeo de suda Vjetnamio, kiu faris multajn meritojn en la milito, embuskas kontraŭ la malamiko apud grava komunika´linio.



La usonaj kaj pupaj armeanoj, kiuj suferas pezan baton de la sudvjetnama popolo

VEJ LIESI:

Kia Varo Estas la "Nova Ekonomia Sistemo"?

LA tiel nomata "nova ekonomia sistemo", kiun la sovetunia reviziisma kliko intense efektivigas, estas ekonomia sistemo kapitalisma de la kapo ĝis la piedoj, kiu formas gravan paŝon por kompleta restarigo de kapitalismo en la kampo de ekonomio.

La kerno de tiu ĉi "nova sistemo" estas kuraĝigi la industriajn entreprenojn ĉiurimede ĉasi profiton kaj stimuli produktadon per materio. Ĝi plivastigas la memstarecon de la entreprenoj en administrado, energie efektivigas la sistemon reguligi produktadon laŭ la kurso de la merkato, kaj pligrandigas la povon de la respondeculoj de entreprenoj en dungo kaj maldungo, premiado kaj punado de oficistoj kaj laboristoj. Tiuj aranĝoj ŝanĝis la socialismajn entreprenojn de tutpopola posedsistemo en entreprenojn kapitalismajn kaj anstataŭigis la planan ekonomion de socialismo per la libera konkurenco de kapitalismo. Ĝis 1967 la entreprenoj, kiuj efektivigis la "novan sistemon", nombris pli ol 5,500, kaj ilia produktkvanto konsistigas trionon de la totalo de la industriaj produktoj. Laŭplane, ĉiuj industriaj, transportaj kaj aliaj entreprenoj fundamente efektivigos la "novan sistemon" en 1968.

La "nova sistemo" efektivigata de la sovetunia reviziisma kliko jam alportis seriozajn sekvojn al la ekonomio de Sovetunio. Ĝi kaŭzis ne nur malordon en produktado, malboniĝon de la kvalito de produktaĵoj, kaj neeblon de plenumo de produktaj planoj, sed ankaŭ fortan ventadon de spekulacio kaj ŝtelo kaj pluan intensigon de klasa polariziĝo.

PROFITĈASADO KAJ TROMPADO

Por gajni pli da profito, la fabrikoj kaj entreprenoj ĉiuj reguligas sian produkton laŭ la kurso de la merkato, kaj la konfliktoj inter la provizo kaj la disvendo ĉiam pli akriĝas. La administracio de komerco pri botoj kaj ŝuoj en Kazaĥo decide postulis en la komenco, ke la industria organizo de la respubliko produktu botojn el delikata felto, kaj promesis, ke ili disvendos jare 600,000 parojn, sed poste, kiam aperis novaj produktaĵoj en la merkato, la komercaj laborantoj meminiciate malpliigis la disvendan kvanton preskaŭ je duono de la antaŭa mendkvanto, rezultigante amasan akumuladon de tiuj botoj.

Por ĉasi profitojn, ne malmultaj el la respondeculoj de entreprenoj devigis la laboristojn falsi kaj trompi, priŝteli sian laboron* kaj uzi malpli bonan materialon, por kaŝe aŭ aliforme plialtigi la prezon. Iu vestofabrika respondeculo donis al siaj laboristoj malsekan ŝtofon longan je 40 metroj, kiu estis plilongigita je 2-3 metroj post streĉado kaj sekigo. Kiam la vestoj estis pretigitaj kaj venditaj, ili ŝrumpis post enakvigo kaj fariĝis tiel malvastaj, ke ili ne plu taŭgis por la portantoj. La kemia sterko produktita de kelkaj fabrikoj fariĝas blokoj, kiam ĝi venas en la manojn de la konsumantoj kaj, laŭ la ĵurnaloj de Sovetunio, "kelkfoje la bloko estas tiel granda kiel vagono". Duono de la produktaĵoj de la Maŝinfabriko de Briansk estas fuŝaĵoj neuzeblaj, kaj la samo okazas al tiuj en Rusio.

Multaj entreprenoj krome starigis sekretajn fabrikojn por spekulacii kaj ĉasi neleĝajn profitojn. La ĉefinĝeniero, vicfabrikestro kaj laborejaj estroj de la Fruktaĵa Fabriko de Alma-Ata faris komploton inter si, kontraŭleĝe falsis foruzitajn kvantojn de materialoj kaj tiamaniere ricevis grandajn kvantojn da sukero, oleo kaj lakto. Poste ili vendis tiujn materialojn helpe de siaj kunkomplotantoj en komerca reto kaj ŝtelis al si pli ol milionon da rubloj. La direktoro de iu konstruejo en Taĝiko komplotis kun siaj intimuloj por proprigi al si grandajn kvantojn da konstrumaterialo, utiligante sian oficon, per rimedoj de falsado de la kvantoj de foruzitaj materialoj kaj de komercaj atestaĵoj, kaj poste vendis ilin. En unu jaro li akiris pli ol 10,000 rublojn per vendo de tiuj ŝtelitaj materialoj. La ĉefinĝeniero de iu kudra kaj trika fabriko starigis en komploto kun la fabrikestro sekretan fabrikon, rezervis materialojn kaj ŝtofojn neregistritajn en kontlibro, per tiuj fabrikis siajn proprajn produktaĵojn kaj vendis ilin. Ili posedis propraĵojn en Odeso kaj Sverdlovsk, valorantajn centmilojn da rubloj.

Diversaj entreprenoj ne nur libere negocas pri siaj produktaĵoj, sed ankaŭ laŭplaĉe vendas produktajn rimedojn por plialtigi la "profitopocenton" kaj tiel trompe akiri por si "premion". La reviziisma kliko de Sovetunio publike deklaris, ke la plana provizado de produktrimedoj "jam elmodiĝis", kaj difinis, ke la entreprenoj povas vendi aŭ luigi la tiel nomatajn "superfluajn, neuzatajn instalaĵojn aŭ ilojn".

Multaj entreprenoj, pretekstante "eviti superfluon de ekipaĵoj", memdecide "forstrekis el sia inventaro" kaj "forvendis" grandkvante la tiel nomatajn "eluzitajn" kaj "superfluajn" ekipaĵojn. En la pasinta jaro, la traktora fabriko de Taŝkent memdecide "eliminis el la inventaro kiel eluzitajn ekipaĵojn", valorantajn 216,000 rublojn, kaj vendis kiel "superfluajn", valorantajn 127,000 rublojn.

SUBPREMO KAJ EKSPLUATO PEZAS SUR LA LABORISTOJ

Utiligante sian oficon kaj povon, la respondeculoj de entreprenoj faris kruelan subpremon kaj ekspluaton al la laboristoj. Ili laŭplaĉe maldungas laboristojn, retenas iliajn salajrojn, proprigas al si pli da "premio" kaj akaparas la laborfruktojn de la oficistoj kaj laboristoj.

Por plialtigi la "profitpocenton", kvin aŭtomobilaj kompanioj en Moskvo kaj Leningrado maldungis kaj malpliigis el siaj dungitaroj, en la daŭro de kvin monatoj, 239 laborantojn, kiuj formas 4 pocentojn de la tuta personaro. Post efektivigo de la "nova sistemo", la ŝtala kaj fera fabriko "Ruĝa Oktobro" decidis forigi du laborejojn kaj maldungis 730 laboristojn por akiri pli da profito. Kelkaj entreprenoj dungas multajn laboristojn dum la tempo plena de laboroj kaj forigas grandan nombron da laboristoj dum la tempo de malmulta laboro per la rimedo doni al ili nefiksitan "libertempon", tiel kaŭzante senlaborecon al multaj laboristoj kaj moviĝon de grandkvanta laborforto.

Samtempe kun la amasa maldungo de laboristoj, kruela ekspluatado al metilernantoj kaj infanlaboristoj jam fariĝas ĝenerala fenomeno en entreprenoj de Sovetunio. La respondeculoj de multaj entreprenoj devigas la metilernantojn kaj infanlaboristojn fari la saman laboron kiel, kaj kelkfoje eĉ pli penigan laboron ol, la plenkreskaj laboristoj.

Laŭ la kondiĉoj de la "nova sistemo", tre granda parto de la profito de la entreprenoj iras rekte en la poŝon de plenmano da elementoj el privilegia tavolo, kiaj la gvidantoj kaj inĝenieroj de la entreprenoj, aŭ servas al tiu privilegia tavolo en iu aŭ alia formo. La direktoro de Industrio-Konstrua Trusto de Lipeck akiris sepfoje premiojn en unu monato, sume pli ol 1,300 rublojn, kaj tiu sumo superas dujaran salajron de ordinara laboristo. La gvidantoj de iuj entreprenoj prenas 60 pocentojn de la tuta premio. Tiuj de aliaj entreprenoj akiras premion en ĉiu okazo kaj ĉiu monato, dum parto de la laboristoj ne ricevas el premio eĉ unu kopekon. La laboristoj de multaj entreprenoj ne nur ne ricevis premion, iliaj salajroj eĉ multe malpliiĝis. La salajroj de la helplaboristoj de du aŭtomobilaj garaĝoj en Leningrado, kiuj estas memrespondecaj pri la propraj profito kaj perdo, reduktiĝis je 9 pocentoj, dume la salajroj de la gvidantoj plialtiĝis je 40 pocentoj.

La entreprenaj gvidantoj ricevas ne nur altajn salajrojn kaj multajn premiojn, ankaŭ la "bonstatigaj aranĝoj" de tiuj entreprenoj fakte servas nur al la plenmano da privilegiuloj kaj estas akaparitaj de ili mem. Ili havas apartamentojn kaj vilaojn je sia uzado kaj ricevas senpagajn medicinajn kaj sanigajn zorgojn, dum la laboristoj loĝas dense kaj vivas malfacile, por ne paroli jam pri kulturaj kaj bonstatigaj prizorgoj.

OPONAS LA REVOLUCIA POPOLO KAJ HURAAS LA MALAMIKOJ

Dum sia efektivigo, la "nova sistemo" renkontis fortan kontraŭstaron kaj malkontentecon de la sovetunia popolo. Post kiam oni iniciatis tiun nigran varon en 1962, jam multaj homoj malkaŝis ĝian reakcian esencon, kompletan restarigon de kapitalismo. Ili montris, ke la nacia ekonomia ekvilibro estas serioze detruita, la plana ekonomio nuliĝos, kaj la socialisma frukto de la Oktobra Revolucio perdiĝos, se tiuj aranĝoj estos aplikataj. Kun indigno la sovetunia popolo diris: "Nun la rublo decidas ĉion!" La sovetuniaj laboristoj, kiuj havas gloran tradicion de revolucia batalo prave diris: "Nova sistemo? Ĝi signifas nur, ke ni laboristoj laboru pli multe por ili!" Tiu sola rimarko malkovris la reakcian esencon de la "nova sistemo".

La aktiva efektivigado de la "nova sistemo" kun celo de kompleta restarigo de kapitalismo fare de la sovetunia reviziisma reganta kliko, tamen, gajnis aplaŭdegon de imperiismo kaj la reakciuloj en diversaj landoj. La *Wall-strata Ĵurnalo*, organo de la monopola financa grupo de Usono, diris en granda ĝojo: "Ni bonvenigas la aliĝon (de la sovetunia reviziisma reganta kliko) al nia klubo." Ankaŭ la kortegaj instruituloj de la burĝaro rimarkis kun kontenteco: "Sovetunio nun revenas al la kapitalisma epoko, kiu reguligas la ekonomiajn rilatojn pere de merkato." La aklamo kaj laŭdo de la malamikoj plue malkovris la fakton, ke la "nova sistemo", kiun distrumpetas la sovetunia reviziisma reganta kliko, estas la sama varo kiel la profita principo de kapitalismo, kiu ĉasas nur monon.

Antaŭ dek jaroj Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"La proletaro certe povos venki la burĝaron, socialismo certe povos venki kapitalismon kaj la subprematej nacioj certe povos venki imperiismon. Kompreneble, antaŭ la popolo ankoraŭ kuŝas malfacilaĵoj kaj zigzagoj. Sed Lenin prave diris antaŭ tridek ses jaroj: 'Kio gravas, estas ke la solida glacio estas jam rompita, la navigacia linio estas jam malfermita, kaj la vojo estas jam montrita.'"** Kie troviĝas subpremado kaj ekspluatado, tie estas kontraŭstaro kaj batalo. Kiajn ajn artifikojn la sovetunia reviziisma reganta kliko faros kaj kiajn ajn belajn vortojn ili uzos por ornami sin, ili ne povos trompi la vastajn amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de Sovetunio. La sovetunia popolo absolute ne lasos sin turmentadi senage; ĝi certe leviĝos ribeli kaj komplete frakasos ĉiajn katenojn, kiujn la sovetuniaj reviziistoj uzas por restarigi kapitalismon.

---

* *Ne labori laŭ regula procedo por ŝteli tempon.*

HONG LIANGBING:

La "Humaneco" de la Hinda Ĉefministrino



Hindiaj fuĝantoj

ĴURNALA Trusto de Hindio en Nova Delhi, fama kiel disvastiganto de klaĉoj, mensogoj kaj flavaj novaĵoj, raportis lastatempe pri eksterordinare stranga kuriozaĵo, ke la ĉefministrino de la Respubliko de Hindio Indira Gandhi funebre ĉeestis la enterigan ceremonion de "Mielo", hundo amata de ŝia patro Nehru antaŭ lia morto.

Sed, ĝuste kiam "feliĉe" ĝuas sian eternan ripozon la mortinta hundo, kiu finis sian vivon en la glora kaj riĉa domo de ĉefministro, la popolo de Hindio dume trovas sin en abismo de suferoj. Rezulte de tio, ke la reakcia registaro de Hindio, estrata de Indira Gandhi, praktikas enlande reakcian politikon de protekto de feŭdismo kaj disvolvo de monopola kapitalismo kaj eksterlande politikon de sindependigo al la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo, la agrikultura produkto de Hindio estas grave difektita. La senprecedence serioza manko de grenoj puŝas la hindan popolon al la rando de morto. Nutraĵo mankas al proksimume tricent milionoj el la kvincent milionoj da hindaj popolanoj, kaj ĉiujare dek milionoj mortas pro malsato.

Kiel teruraj estas eĉ la raportoj de la burĝara gazetaro, videble jam multe falsitaj por malpligravigi kaj kaŝi la veron! "Malsato senkore minacas la tutan landon de Kerala en la sudo ĝis Bihar en la nordo." "La plej serioza malsato de la nuna jarcento kaŭzas ke milione nombraj homoj malgrasiĝis kvazaŭ irantaj skeletoj!" Kiel mizera sceno formita el sango kaj larmo! "Pro abundo putras vino kaj viand' en grandaj domoj, dume pro malsato kuŝas mortaj ĉe vojrando homoj."



En la okuloj de la hinda ĉefministrino, hundo indas pli da atento ol la hinda popolano.

Kiel do tiu "molkora kaj sentema" ĉefministrino de Hindio sintenas antaŭ la malsato kaj mortado de milionoj kaj milionoj da hindaj popolanoj? Ŝi provis senskrupule kovri la okulojn kaj orelojn de la mondo, dirante per malhumana tono ke la morto pro malsato de dekmiliono da homoj ĉiujare en Hindio "estas kaŭzita de maljuneco, malbona farto, malsano kaj aliaj", kaj ŝi ankaŭ mensogis, ke la manko de grenoj en Hindio rezultiĝas el la grandnombro de loĝantoj, la troabundeco de musoj, bovoj kaj simioj....

Tio estas ĝuste tiu ĉefministrino de Hindio, kiu kun sia ŝvelinta hundamo eĉ postulis, ke la hinda popolo, kiu nutras sin per herbradikoj, arbŝeloj, jutfolioj kaj mangosemoj, "ŝanĝu sian manĝokutimon por akomodi sin al la nivelo de la agrikultura produktado".

En la sama tempo la reakcia registaro de Hindio, estrata de Indira Gandhi kaj reprezentanta la interesojn de la grandaj bienuloj kaj grandaj kapitalistoj, pli intense ekspluatas la hindan popolon per sennombraj impostoj por elsuĉi iliajn lastajn gutojn de sango kaj medolo frapante la ostojn.

Al la hinda popolo Indira Gandhi estas tiel venena kaj kruela kiel serpento kaj lupo, sed por la mortinta hundo kaj la hunde avidaj raŭaoj, nobeloj, bienuloj kaj kapitalistoj, ŝi ja havas tiel profundan korsenton. Kiel akra estas la kontrasto!

Ĥruŝĉov de Sovetunio, la Ĥruŝĉov de Ĉinio kaj la malgranda grupo de iliaj sekvantoj senfine babilas kaj grumblas por distrumpeti la tiel nomatajn "humanecon", "homamon" kaj "humanismon". Vidu! Ĉu la agoj de Indira Gandhi ne donis bonegajn klarigojn pri tiuj terminoj de la burĝaro?

Perzidanto Maŭ diris: **"En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo, nek senkaŭza malamo."** Ĉu ĉe la ekspluataj klasoj troviĝas ia "humaneco" aŭ "homamo" por la ekspluatataj klasoj? Ĉiuj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj absolute ne povas dependigi sian liberiĝon al la "prudento" kaj "bonkoreco" de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Oni povas akiri venkon nur per batalo. El sia sanga instruo la revolucia popolo de Hindio jam travidis la artifikojn kiaj "gandhiismo", "paca transiro", "parlamenta vojo" ktp. En la vespero de la 27-a de novembro 1967, la reakcia centra registaro superregata de la Hinda Nacia Kongreso ordonis la malorganizon de la registaro de Okcidenta Bengalo. Tio klake vangfrapis la hindajn reviziistojn pro la absurda teorio de "paca transiro". La revolucia popolo de Hindio ĉiam pli profunde komprenas la nekontesteblan veron de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong: **"El la pafilo venas ŝtatpotenco."**

Revoluciaj Proverboj

★Ĉiam kreskas sur sama tigo la melono kaj folio, neniam disiĝas la popolo kaj la Kompartio.

★En la oriento leviĝas la aŭroro, de Pekino venas la varmo en nia koro.

★Plej altas la ĉielo, plej profundas la maro, plej bonas nia nova epoko sen komparo.

KURANTAJ AFEROJ

POR PLI BRILE, PLI FAJNE PRESI PORTRETOJN DE PREZIDANTO MAŬ

Speco de tre brile kaj tre fajne presitaj koloraj portretoj de Prezidanto Maŭ aperis en nia ĉefurbo je granda ĝojo de la vastaj revoluciaj amasoj. Ili estas presitaj sur altgrade fajna glacea papero.

Tiun fajnan glacean paperon sukcesis produkti la proletaraj revoluciuloj de la Pekina Paperfabriko kun senlima varma amo al Prezidanto Maŭ en la granda proletara kultura revolucio, post multfoja eksperimentado kaj venkado de multaj malfaciloj. Per tiu papero, ekstreme glata kaj brila kaj tre taŭga por presado, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ofseta Fabriko de Pekino produktis la supre diritajn fajnajn kolor-portretojn de Prezidanto Maŭ.

50 KURACAJ TAĈMENTOJ DE ĜEGIANG EN MONTREGIONOJ KAJ FIŜEJOJ

Lastatempe, la revoluciaj amasaj organizoj de medicinaj institucioj de Ĝegiang-provinco kaj la urbo Hangĝoŭ organizis pli ol 800 medicinajn laborantojn en pli ol 50 kuracajn taĉmentojn por servi al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj fiŝistoj en diversaj montregionoj kaj fiŝejoj de Ĝegiang.

Veninte al la vilaĝoj kaj fiŝejoj, la membroj de tiuj taĉmentoj energie propagandas inter la amasoj la penson de Maŭ Zedong kaj la gravajn direktivojn de Prezidanto Maŭ pri medicina laboro. Kaj dum siaj kuracaj aktivadoj, ili vaste enketis kaj kolektis la opiniojn kaj postulojn de la amasoj por eltrovi pli bonan manieron por pliapaŝe movi la gravitan punkton de la medicina laboro al la kamparo.



Li Servos al la Afrika Popolo eĉ kun Sola Brako

En la antaŭ-urbo de Dar-es-Salaam, la ĉef-urbo de Tanzanio, plen-vapore progresas la konstru-ado de la moderna ŝpin-teksa* kaj prestinktura* fabriko "Amikeco" sub la helpo de Ĉinio. En tiu konstruejo, oni ofte vidas ĉinan sol-brakan laboriston, kun il-sak-eto pendanta de lia ŝultro, en labor-vesto plena de kot-* kaj gras-makuloj*. Energie li laboras kune kun la tanzaniaj laboristoj. Li estas k-do (kamarado) Ĝaŭ Ĝenŝeng, kiu glore vundiĝis en akcidento dum laboro en tiu konstruejo.

Ekde la tago, kiam k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng forlasis sian patrolandon, kio ĉiam okupas lian kapon, estas la instruo de Prezidanto Maŭ: **"La spirito de k-do Bethune, lia kompleta sin-dono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, el-montriĝis en lia ekstreme* respond-ec-ema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu komparti-ano* devas lin imiti."** Kaj k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng agas ĝuste laŭ tiuj vortoj. Iun tag-mezon en la dua tag-deko de oktobro, 1966, malfunkciis iu cement*-miks-maŝino manipulata* de iu tanzania laboristo sur la konstruejo. Rimark-inte tion, alte laboranta en la aero, k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng tuj venis malsupren por helpi. Dum li kunigis sian tutan atenton en ripar-ado de la maŝino, subite falis la 300 kilogramojn* peza en-verŝ-ilo, kaj la metala* ŝnur-ego* tranĉ-vund-egis lian maldekstran brakon. Kvankam la kuracistoj faris ĉion por lin savi, tamen la brako estis tro grave vundita, ili devis ĝin fortranĉi. Kiam k-do Ĝaŭ informiĝis pri tiu decido, li restis tute trankvila kaj diris senhezite: "Mi estas preta en mia penso for-doni mian vivon por la afrika popolo. Kiel ĉina laboristo armita per la penso de Maŭ Zedong, mi servos al la afrika popolo eĉ kun sola brako." Lia sin-forgesa spirito kaj forta revolucia volo kor-tuŝis multajn ĝis larmo.

Kiam k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng rekonsci-iĝis post la fortranĉo de la brako, la unua afero, kiun li pripensis, estis la konstruado de la fabriko. Li diris al la kamaradoj, kiuj venis vidi lin en la hospitalo: "Diru al la kamaradoj, ke ili ne venu al mi, ĉar nun estas multaj laboroj en la konstruejo, oni ne devas prokrasti la laboron pro mi."

En zorgo pri lia sano, la gvidantoj intencis sendi lin al la patrolando, sed li insiste volis resti por plue labori por la tanzania popolo. "K-do Bethune estis fremdulo," li diris, "kaj tamen li fordonis sian vivon por la revolucia afero de Ĉinio. Mi nur vundiĝis, tio estas nenio. Mi ankoraŭ povas servi daŭre al la afrika popolo." Tion li skribis al sia edzino en la patrolando kaj ricevis de ŝi aprobon kaj kuraĝigon.

Neniu el la tanzaniaj amikoj, kiuj kontaktis kun k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, ne estis kortuŝita de lia nobla spirito. En la hospitalo, li ricevis varman prizorgon de la kuracistoj, fleg-istinoj* kaj aliaj malsanuloj, kaj ĉiutage multaj nekonataj tanzaniaj amikoj venis por lin vidi en la malsanula ĉambro. Ili ĉiuj varme laŭdis, ke li estas bona laboristo alsendita de Prezidanto Maŭ. "En la pas-int-eco, mi ne havis okazon kontaktiĝi kun ĉinoj," diris unu el ili, "tamen hodiaŭ mi vidas en li la bonajn kvalitojn de la ĉina popolo." "La ĉinaj specialistoj," diris alia, "estas niaj veraj amikoj."

Kiam k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng revenis al la konstruejo, la tiea tanzania re-prezent-anto diris al li: "Ni neniam forgesos la kontribuojn, kiujn vi faris por la amikeco inter la popoloj de Tanzanio kaj Ĉinio."

Nia Vortareto

akcidento — malfeliĉa ne-atendita okazaĵo

cemento — griza pulvoro uzata en konstruado miksita kun sablo, ŝtonetoj kaj akvo

ekstreme — ĝis plejeco

flegi — prizorgi malsanulojn

kilogramo — pez-unuo egalanta al mil-ono de tuno

kompartio — komunista partio

koto — tero miksita kun malpura akvo de stratoj aŭ vojoj

makulo — malpurigita loko

manipuli — funkciigi aparaton per manoj

metalo — komuna nomo de fero, kupro kaj similaj, kiuj kondukas varmon kaj elektron

ŝnuro — longaĵo el kun-aranĝitaj fadenoj por ligi ion

ŝpini — elfari fadenon el kotono, lano k. s.

teksi — produkti ŝtofon interkruc-igante fadenojn

tinkturi — kolorigi teksaĵojn aŭ fadenojn per fluaĵo



Kara kamarado M. Sakai,

Ni ricevis la malĝojigan sciigon pri la martiriĝo de k-do Jui Ĉunosin per sinbruligo je la 12-a de novembro por protesti kontraŭ la vizito al Usono fare de la japana reakciulara ĉefo kaj pro-usona kaj naciperfida ĉefministro Eisaku Sato kaj kontraŭ la barbara agreso de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio. Ni sendas al vi kaj pere de vi al la familianoj de k-do Jui Ĉunosin nian koran kondolencon.

K-do Jui aktive klopodis por disvastigi EPĈ en Japanio kaj faris sian kontribuon por la akcelo de la kultura interfluo kaj amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.

La usona imperiismo estas la plej feroca komuna malamiko de la tutmonda popolo. La moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma gvidanta kliko kiel sia centro estas la ĉefa kunkrimulo de la usona imperiismo. La modernaj reviziistoj estas renegatoj, kiuj perfidis la proletaran internaciismon kaj la revolucian aferon de la tutmonda proletaro, distrumpetas "pacan kunekziston", "pacan konkurson" kaj "pacan transiron", riverencas antaŭ la usona imperiismo kaj kune kun ĉiuj plej reakciaj fortoj de la mondo formis la novan "sanktan aliancon" kontraŭ marksism-leninismo, kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, kontraŭ Ĉinio, kontraŭ la popolo kaj kontraŭ revolucio. La modernaj reviziistoj kolportas ĉie la reviziisman opion por anestezi la popolon kaj subfosi la marksism-leninismajn partiojn kaj la revolucian batalon de la tutmonda revolucia popolo kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Sekvante la sovetunian modernan reviziismon, la reviziisma kliko de Mijamoto en komunista mantelo disvastigas la kontraŭrevolucian renegatan filozofion, perfidas la japanan popolon, ludas kiel kunkrimulo de la reakcia Sato-registaro, kun la vana espero strangoli la revolucian batalon de la japana popolo. Por oponi imperiismon oni nepre devas kontraŭbatali la modernan reviziismon.

Nun, bonega estas la revolucia situacio en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj tiu en la tuta mondo. La granda penso de Maŭ Zedong pli kaj pli profundiĝas en la korojn de la subpremataj popoloj kaj nacioj tra la mondo. La usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo dronis en malfacilegoj en- kaj ekster-lande. Nek la kruela subpremo kaj freneza atako nek la subaĉeto kaj trompo de reakciularoj povas savi ilin el la sorto de pereo, male, tio povas nur pluapaŝe akceli la revolucian konsciiĝon de la diverslandaj popoloj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"La japana nacio estas granda nacio. Ĝi absolute ne povas lasi la usonan imperiismon longtempe rajdi sur ĝia nuko. La seninterrompa disvastigo de la patriota unuiĝa batalfronto de ĉiuj socitavoloj de Japanio por oponi la agreson, subpremon kaj kontrolon de la usona imperiismo en la lastaj jaroj estas fidinda garantio por la venko de la patriota batalo de la japana popolo kontraŭ la usona imperiismo. La ĉina popolo profunde konvinkiĝis, ke la japana popolo certe forpelos la usonajn imperiistojn el sia patrolando kaj la volo de la japana popolo por sendependeco, demokratio, paco kaj neŭtraleco certe realiĝos."** La morto de k-do Jui plene montras, ke nun flamegas la indigna fajrego de ĉiuj socitavoloj de Japanio kontraŭ la agreso, subpremo kaj kontrolo de la usona imperiismo kaj la perfida sekvado de la reakcia Sato-registaro al la usona imperiismo. Ni kredas, ke la granda japana popolo kuraĝas batali kaj venki. La japana popolo absolute ne povas toleri la usonan imperiismon tretadi siajn patrolandon kaj nacian dignon, kaj certe forpelos la usonan imperiismon. La ĉina popolo firme subtenas la revolucian batalon de la japana popolo. La nacia kaj demokratia revolucia batalo de la japana popolo certe gajnos la finan venkon.

Certe triumfos la batalo de la japana popolo por gajni la nacian sendependecon kaj popolan liberiĝon!

Certe triumfos la nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo!

Certe malvenkos la usona imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiulandaj reakciularoj!

ĈEL

Karaj kamaradoj!

Nun mi rapidas. Gravan anoncon!

En la vespero de la 11-a de novembro nia kamarado, k-do Jui Ĉunosin, eksperanto de "El Popola Ĉinio" sinbruligis protestante al la vizito de ĉefministro Sato al Usono, antaŭ la pordo de la ĉefministrejo. Kaj post 23 horoj, je la 3-a p.m. de la 12-a k-do Jui mortis. Ĝuste en la sama tempo, kiam ĉefministro Sato ekflugis de Haneda al Usono, k-do Jui finis la spiron.

Hodiaŭ mi finis, ĉar nun mi rapidas.

Kun kamarada saluto!

M. Sakai



DETRUI KAJ DIFEKTI 50 MALAMIKAJN AVIADILOJN EN KVIN MINUTOJ

La 30-an de oktobro pasintjare, la Popola Liberiga Armeo de Quangnam-provinco en suda Vjetnamio faris fulman atakon al aerodromo ĉe An Hoa sude de Da Nang. Nur en kvin minutoj ili detruis kaj difektis 50 usonajn aviadilojn, mortigis kaj vundis 316 usonajn agresantojn.

La aerodromo ĉe An Hoa estas grava bazloko de la usona marinfanterio. La popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio jam lanĉis ok atakojn al ĝi, kaj entute detruis kaj difektis 287 aviadilojn, mortigis kaj vundis 2209 agresantojn, el kiuj la plejparto estis teknikistoj kaj pilotoj.

DEVALUTO DE BRITA PUNDO

En la fino de 1967, sur la merkato de fremda valuto de Londono, la kurzo de sterlinga pundo kontraŭ la usona dolaro jam falis ĝis la plej malalta nivelo dum la lastaj 15 jaroj. Tio montris, ke la profunda kaj longdaŭra financa krizo de Britio jam atingis ekstreme seriozan gradon. Laŭ la informo de londona ĵurnalo, la politiko de deflacio de la brita registaro ne sukcesis kovri la britan internacian pagdeficiton, sed male, eble aperos plua deficito en 1968, kaj tial, la publiko ĝenerale zorgas pri la stabileco de la pundo.

BANKROTO DE GRANDA NOMBRO DA MEZAJ KAJ MALGRANDAJ ENTREPRENOJ EN JAPANIO

Laŭ informo publikigita de la japana "Teikoku Ko Sin Sio", en la tuta lando la nombro de entreprenoj bankrotintaj, kiuj ŝuldis po pli ol 10,000,000 enojn, jam atingis 865 en oktobro de 1967, t. e., ĝi pligrandiĝis 45.9% kompare al tiu en la sama periodo de 1966. Tio estas la plej alta rekordo pri la bankroto de mezaj kaj malgrandaj entreprenoj en Japanio depost la Dua Monda Milito.

Enciklopedieto

Dekpunkta Decido kaj **23-punkta Decido** aludas pri la *Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri Kelkaj Problemoj en Nuna Kampara Laboro* (aŭ: la *Dekpunkta Ðecido*) (1963) kaj *Kelkaj Problemoj Nun Elmetitaj en la Socialisma Eduka Movado en la Kamparo* (aŭ: la *23-Punkta Decido*) (1965), kiujn Prezidanto Maŭ persone ellaboris. En tiuj du grandaj marksism-leninismaj dokumentoj, Prezidanto Maŭ difinis serion da ĝustaj principoj kaj politikoj por la socialisma eduka movado. La dokumentoj montras, ke en tiu granda movado de socialisma edukado, oni devas firme teni klasbatalon kaj la batalon inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo kiel ĉefĉeneron por solvi la kontraŭdiron inter socialismo kaj kapitalismo, kaj ke oni devas senrezerve mobilizi la amasojn, konduki la batalon ĉefe kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj pluapaŝe plifortigi la diktaturon de la proletaro, por preventi la restaŭron de kapitalismo. Sub la kondukado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la kampara socialisma eduka movado en Ĉinio atingis grandajn venkojn.

Kvar liberoj estas la libero de uzuro, libero de dungo de laboristoj, libero de vendo kaj aĉeto de tero kaj libero de privataj entreprenadoj, kiujn la Ĥruŝĉov de Ĉinio energie pledis en la kamparo por disvolvi tie la kapitalisman ekonomion.

Tri pliigoj kaj unu fikso Ĉirkaŭ la jaro 1961, kiam Ĉinio alfrontis provizorajn malfacilojn en sia nacia ekonomio, pro la subfosado de la sovetia reviziista grupo kaj la naturaj katastrofoj sinsekve okazintaj en la daŭro de tri jaroj, la ĉina Ĥruŝĉov, en kunordiĝo kun la atakoj faritaj kontraŭ Ĉinio de la en- kaj eksterlandaj demonoj kaj diabloj, malice atakis la tri ruĝajn flagojn de la ĝenerala linio de socialisma konstruado, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo kaj pledis por pliigo de parceloj por privata uzo, pliigo de liberaj merkatoj kaj pliigo de entreprenoj mem respondantaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj por la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado. Per tio li intencis levi nigran venton de individua mastrumado por disfaligi la socialisman ekonomion kaj lasi kapitalismon libere etendiĝi en la kamparo.

Taŭjuan-a sperto Por praktiki sian reakcian burĝaran linion, la ĉina Ĥruŝĉov sendis en 1963 dum la socialisma eduka movado sian edzinon Vang X X, burĝan elementon, al Taŭjuan-brigado de Luovangĝuang-komunumo, Hebej-provinco, por tie labori kaj akiri sperton. Taŭjuan-a sperto, kiu estas kontraŭ-partia, kontraŭ-socialisma kaj kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, estas la nigra sperto, kiun ŝi resumis el sia laboro. Ĝi karakteriziĝas per freneza opono kontraŭ revolucia amasmovado, kovro de klasbatalo, direktado de la lancpinto de batalo kontraŭ malriĉaj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kontraŭ bonaj aŭ kompare bonaj kadroj, kaj protekto al la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj al la kapitalismaj fortoj en la kamparo.

Sur la kovrilo

La klasaj fratoj interligîgas koro kun koro, kaj tiel estas k-do Liu Tiange inter la batalantoj. Li estas batalionestro kaj unu el la aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ de la pekinaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li firme tenas en sia kapo la instruon de Prezidanto Maŭ pri kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem. De pli ol dudek jaroj li zorgas pri la batalantoj en ĉiuj detaloj kaj sesfoje riskis sian vivon por savi batalantojn kaj popolanojn.

Sur la dorskovrilo

La junaj sturmantoj el ŝanhajaj ruĝaj gvardioj manifestacias sur la strato por kondamni la krimojn de la Ħruŝĉov de Ĉinio.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (116) 1968

Ĉefa Enhavo

Gratula Telegramo de Prezidanto Maŭ al Prezidanto Nguyen Huu Tho

La Trezoraj Libroj de Prezidanto Maŭ en la Tuta Mondo

Revoluciaj Esperantistoj Amas la Trezoran Libron

Amasa Eldonado de Verkoj de Prezidanto Maŭ en Esperanto

Ho Vivu, Onklo Maŭ! (*poemo*)

La Batalo inter la Du Vojoj en la Ĉina Kamparo

La Revolucia Amasa Kritiko en la Kamparo de Ĉinio

Ni Sekvas Prezidanton Maŭ sur la Vojo de Socialismo

La Socialisman Vojon Ni Iros Definitive!

Familia Kunsido por Kontraŭbatali Egoismon kaj Kritiki Reviziismon

Batalionestro Liu Tiange, Kiu Tutkore Dediĉas Sin al la Revolucio

Varme Helpi Kadrojn Revolucii super Si Mem

Antaŭ la Nova "Ekzameno"

La Ĉina Plej Granda Ekipaĵo por Varmtraktado per Industria Frekvenco

Sukcese Konstruiĝis la Plej Granda Suna Radio-teleskopo de Ĉinio

Triumfa Kanto de la Granda Proletara Kultura Revolucio

Liu Tiange (*bildrakonto*)

Heroe Batalas la Vjetnama Popolo

Kia Varo Estas la "Nova Ekonomia Sistemo"?

La "Humaneco" de la Hinda Ĉefministrino

Vivu, Vivu Prezidanto Maŭ




La Tutmondaj Popoloj Varme Amas Prezidanton Maŭ!



Propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de iu trupo de ĈPLA, profundiĝinta en paŝtregionan komunumon, propagandas la penson de Maŭ Zedong kaj prikantas la grandan venkon de la proleta revolucia linio.

Ŝafaro de bonrasa brutbredejo de Silingol-ligo en prospero


La Ruĝa Suno Prilumas la Stepon de la Interna Mongolio!





Milicanoj de paŝtregiono serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

Jen abunda rikolto — maizspikoj monte amasiĝantaj sur draŝejo de Majhutukomunumo de Liangĉeng-gubernio, Ulanĉap-ligo







世界报《人民中国》报道特刊一九六八年第二期（总第十五期）